

Sten Johansson

Dis!

© Sten Johansson, 2000

Dua reviziita eldono bitlibre 2015.

La unua eldono aperis ĉe FEL en 2001.

Enhavo

Antaŭparolo	3
1. Aprila inundo	4
2. En fojnamaseto	12
3. Simultana kapacito	28
4. Subtera eksterlandano	43
5. Pri ŝnuro ne parolu	56
6. Petveturi kun metaforo	65
7. Kanto de baleno	75
8. Al viro farendas, kio farendas al viro	83
9. Ruĝaj tagoj	100
10. Senmotore vojaĝi	124
11. Du inoj enlite	131
12. Librojn legu la verkisto	144
13. Dis!	153
Glosaro	156

Antaŭparolo

Ĉi tio estas fikcia verko.

Kio do diable estas fikcio?

Fikcio prezentas paralelan mondon, kie homoj teksitaj el alia ŝtofo ol la nia faras niajn erarojn kaj plenumas niajn revojn. Verki fikcion signifas konstrui veron el mensogoj – aŭ eble mensogon el veroj. Nur ni mortemaj homoj kapablas krei fikcion, la senfortaj dioj povas nur verki palan realon.

En la realo troviĝas trompoj, malveroj, miskomprenoj, blagoj, fuŝprezentoj, maleblaĵoj. Nur en fikcio ĉio veras kaj ĉio eblas. En fikcio ĉeestas paralele ĉiuj verbaj tempoj, sed nur unu modo. Tiu modo nomeblas *imaginativo* – antaŭ ĉiu frazo eblus aldoni la vortojn *”Ni imagu, ke...”* Aŭ ĉu nomi ĝin *ŝajnigativo* – *”Ni interkonsente ŝajnigu, ke...”*? Iamaj fabelrakontistoj proponis al siaj aŭskultantoj tian interkonsenton per la enkondukaj vortoj *”Estis iam...”* Simile faras la romanverkisto, tamen sen aparta vorta formulo. Kiam aŭtoro prezentas al leganto sian tekston, broŝuritan aŭ binditan inter ledaj kovriroj, li aŭ ŝi efektive sugestas la samon: *Ni ambaŭ supozu, ke la jeno efektive veras!*

Sed veran fikcion ne kreas sole aŭtoro por transdoni pretan kaj kompletan al la leganto. En vera fikcio ankaŭ la leganto devas kontribui, aldoni el siaj spertoj, pensoj, asociadoj, kunkreante la rakonton. La verkanto estas fiŝisto, kiu per sia reto levas elakve diversajn fiŝojn; kiel gustos la mara plado, dependas ankaŭ de la leganto.

*La aŭtoro.
Stensdalen 25 sept 2000.*

1. Aprila inundo

”Sepdek kvin kronojn! Pripensu nur! Jen amaso da mono!”

”Ne urĝu! Ĝi venu kiam ĝi venos!”

”Nature. Tamen la doktoro ja diris la dudekkvinan.”

”Sed tio estas nura takso. Mi sendube rimarkos, kiam estos tempo.”

”Mi diras nur, ke vi jam transpasis tiun takson je pluraj tagoj. Do ne povas esti danĝere marŝi supren-suben laŭ kelkaj ŝtuparoj. Sepdek kvin kronoj, tio sufiĉus por amaso da aferoj, kiujn ni bezonas.”

”Ja ni ne havas ŝtuparon. Kaj neniam mi suriros la ŝtupetaron!”

”Tamen ni povus iri viziti mian fratinton, ĉu ne?”

”Kial do ni iru eksterdomen en ĉi tiu blovado? Cetere, ĉe via fratino kaj bofrato estas nur *unu* ŝtuparo. Mi entute en la proksimaĵo konas neniun domon kun pli ol du etaĝoj.”

”Sed vi povus paŝi supren-suben kelkfoje laŭ ilia ŝtuparo.”

”Ili pensos, ke mi freneziĝis.”

Miaj ontaj gepatroj vivis kun kvarjara filineto en verda ligna dometo apud la Balta maro. Ĉirkaŭe loĝis parencoj kaj aliaj najbaroj, fiŝistoj, laboristoj, diversspecaj metiistoj. La familio, kiu atendis min, estis ordinara juna familio, tamen ankaŭ neordinara. Miaj gepatroj estis aktivuloj en la loka Esperanto-klubo, kaj kvankam nia hejmo estis vere miniatura duĉambra dometo, ne malofte dormis sur la sofo iu fremdlanda Cseh-instruisto aŭ preleganto kun diapozitivaj.

Hazarde, ankaŭ je la okazo de ĉi tiu rakonto, la dometo

havis gaston – la faman Esperanto-poeton João Carlos Sebastião Machado da Silveira e Coutinho el la fora Riodejaneiro, aŭ "Onklo Johano", kiel li konserviĝis en la memoro de mia pliĝa fratino. Ne facilas diveni, kiom Onklo Johano kaptis el la streĉa diskuto inter miaj ontaj gepatroj, tamen li devus dedukti, ke ĝi iel rilatas al la ventrego de Panjo.



Finfine Paĉjo sukcesis venigi kun si Panjon inter la dometoj ĝis Angila strato, kie loĝis miaj ontaj geonkloj en flava domo duetaĝa. Sed li ne povis devigi ŝin laŭiri la ŝtuparon pli ol unufoje supren kaj unufoje suben. Jen eble la kaŭzo, ke mi festas mian naskiĝtagon ne la 31-an de marto, sed la 1-an de aprilo.

La geonkloj tute ne pensis, ke Panjo freneziĝis. Sed ili ne komprenis la aferon pri sepdek kvin kronoj.

"Ĉu vi ne konscias tion, vi, kiuj jam havas du idojn?" Paĉjo demandis. "Se la infano naskiĝos hodiaŭ antaŭ noktomezo, ni ricevos infanan subvencion jam ekde la unua kvaronjaro, aliokaze nur ekde la dua kvaronjaro. Ĉu vi vere pensas, ke ni ĵetu sepdek kvin kronojn en la Baltan maron? Ja nun estas ĝusta tempo, do ni volas nur iomete subteni la naturan ordon..."

"Frato mia, vi ĉiam estadis sufiĉe avara", lia fratino opiniis, "tamen ĉi tio jam superas ĉion. Nun ni anstataŭe sidiĝu trankvile por trinki tason da kafo! Espereble vi ankoraŭ toleras kafon, bofratino?"

"Avara? Facilas por vi diri tion", mia patro grumblis. Per tiu duona frazo li volis aludi, ke la onklino, kiel la sola el sep gefratoj, edziniĝis al knabo el solide mezklasa familio de nia urbo. Ĉi tiun tiklan temon oni tamen ne plu tuŝis, laŭ mia memoro.



Kiel mi povas scii ĉion ĉi? Ja mi troviĝis en la centro de la interparolo, ĉu ne? Kaj mi estas bona aŭskultanto. Eĉ se mi tiam havis neniun sperton de tio, kion eblas akiri per sepdek kvin kronoj, kaj eĉ se mi ne sciis, kiel la Balta maro diferencas de tiu akvo, en kiu mi mem plaŭdadis de naŭ monatoj, mi tamen aprezis esti objekto de tiom da atento. En mia spirito – se naskoto havas tian – interbatalis du sentoj: la deziro resti por ĉiam en la mola, sekura utero, kaj la aspiro je libero. Mi decidis provizore resti kvieta kaj ĝisatendi la evoluon de aferoj. Eble venos pli favora oferto?

Kiam miaj ontaj gepatroj kaj mia kvarjara onta fratino luktis al si vojon hejmen post kelkaj horoj, la vento eĉ plifortiĝis, sed neniu naskodoloro anoncis sin. Nun jam de semajno blovdas forte kaj senĉese elsude. En la markolo inter Smolando kaj la insulo Oelando la glacio disrompiĝis kaj amasiĝis, ŝtopante la plej mallarĝan kolon norde de nia urbo. La vento kaj malalta aerpremo pelis amason da akvo en la malprofundan markolon. La akvo jam superis ĉiujn konatajn markojn je duonmetro, kaj vespere la vento transiĝis en tempeston el sudoriento. Frumatene la unuan de aprilo nia eta fiŝista haveno aspektis kiel subakviĝinta Venecio miniatura. Nur fostoj elstaris, kie varfoj kutime vidiĝis, la fiŝistaj budoj staris meze de ŝtormpelita maro, kaj la retsekigejo plenis de fluganta marŝaŭmo. Nasa strato, la gruzo vojeto ĉe kiu ni loĝis, nun unuafoje meritis sian nomon, ĉar oni povus facile kapti angilojn per nasoj en ĝia malprofunda akvo. Malsupre en la fiŝhaveno la kuzoj de mia patro luktadis provizi la barkojn per provizoraj kromaj flankŝirmiloj, kio ne estis facila tasko, kiam la rando de la varfo estis kaŝita sub kelkaj decimetroj da ŝaŭma akvo.

Mi preskaŭ krevis pro scivolemo pri la tuta tohuvabohuo, kaj eĉ se mi ne certis, ke ĉio ĉi vere okazas nur pro mi, tamen

nun ŝajnis al mi, ke jam temp' está.

Jam post la unuaj naskodoloroj de Panjo, mia patro telefone alvokis taksion. Li klare memoris la antaŭan fojon. Antaŭ kvar jaroj mia patrino estis naskonta sian unuan infanon, tio estas mian grandan fratinon. Ŝi alvenis meze de la postmilita bebolavango. En la akuŝejo de nia urbo tri virinoj samtempe estis pretaj naski sur la du akuŝlitoj. Mia patrino, se mi rajtas nomi ŝin *mia* kvar jarojn anticipe, estis unuafoja naskontino, dum la du aliaj virinoj estis renaskontinoj. Tial oni petis mian patrinon reteni la idon, dum la alia duopo elŝutos la siajn. Panjo estis bonkonduta filino de etfarmisto el arbara paroĥo, kiu kutimis kontentiĝi per restaĵoj, do ŝi obeis, sekve de kio mia fratino naskiĝis en la necesejo. Bonvolu pardoni ĉi tiun ekskurson, kiu eble povas klarigi la urĝon de mia patro mendi taksion.

La taksio venis, vidis la akvon sur Nasa strato, kaj retroiris por provi el alia direkto. Dume Paĉjo nerve tretadis sur la sojlo de nia dometo, kiu ankoraŭ situis almenaŭ decimetron super la maro. Post kelka tempo najbaro plaŭde alkuris vokante, ke la taksio atendas nin sur Haringa strato. Ni devos marŝi tien, tio estas: Patro kaj Patrino marŝos, dum mi surfos.

Baldaŭ montriĝis, ke la plaŭdado antaŭen laŭ *Canal Grande* ankoraŭ pliintensigis la naskodolorojn de Panjo, kaj restis sufiĉe longa vojo ĝis la taksio. Oni haltis por rapida interkonsiliĝo, kaj poste oni alvokis du najbarojn kaj Onklon Johano, prunteprenis du stangojn el la retsekigejo kaj lokis malnovan pleŭronektan reton inter la stangojn. Sur tiu improvizita kaj svingiĝanta brankardo la najbaroj, onklo Johano kaj Patro portis Panjon, kiu siavice portis min. Sed la balanciĝado de la brankardo estis nenio kompare kun la furioza ondado, en kiu mi ĵetiĝis tien-reen, kaj unuafoje sed ne lastfoje en mia vivo mi spertis veran marmalsanon.

En la angulo de Nasa strato kaj Haringa strato okazis

incidento. Onklo Johano, la esperantopoeto, kiu portis la antaŭan maldekstran angulon, malbonŝance tretis en kavon per sia liva poeta piedo, kaj perdis la stangon. Kiel pleŭronekto sopiranta al la libero, kvankam ne same plata, mia patrino glitis de la pleŭronekta reto kaj plaŭdis en la malklaran akvon. Nun mi tamen finfine trovis, ke ĉi tiu surfado kaj hulado jam sufiĉas. La utero ne plu ŝajnis al mi sekura hejmo. Logis min la vastaj horizontoj, pri kiuj mi havis ĝis nun tre nebulan imagon. Per efika forta frapo de la dekstra ringofingro mi truis la tenacan amnian membranon, tiel ke la feta akvo elfluis, kaŭzante eĉ plian inundon. Mia feta akvo kaj la ŝvelinta Balta maro miksiĝis formante supon leĝere salitan. Mia patrino ekkaŭris pro intensaj naskodoloroj, kaj post kelkaj fortaj elpuŝaj doloroj ni disiĝis kaj ekiris laŭ malsamaj vojoj. Mi elnaĝis en la glacie malvarman akvon kaj tuj direktis min suden. Bedaŭrinde mi misjuĝis kaj trotaksis, kiel oni ja ofte faras, mian ĵus gajnitan liberecon. Post nur kelkaj naĝmovoj mi sentis, ke oni haŭlas min, kiel moruon kaptitan per longa hokfadeno, helpe de mia umbilika ŝnuro. Kaj kvazaŭ ĉi tio ne sufiĉus, poste Onklo Johano, alinome João Carlos Sebastião Machado da Silveira e Coutinho, kun ĉasista mieno, kvazaŭ kaptante piranjon meze de Kopakabano, levis min supren el mia natura elemento, supren en la sterilan, ŝtorman, sekan aeron. Jen mia vivo estis trudita sur tute malĝustan vojon. Kiel eblis, ke mi tiel misvagis? La tuta Balta maro etendiĝis antaŭ mi, kaj trans ĝi aliaj markoloj, riveroj, kanaloj kaj maroj. Sed male, supren en la aeron oni trudis min, vindis min per diversaj rapide demetitaj vestaĵoj, kaj poste portis min, mian patrinon kaj la katenon inter ni foren kontraŭ la malfermita taksia pordo.

Volonte mi pagus la perditajn sepdek kvin kronojn eĉ pluroble por ŝanĝi mian vivovojon ekde ĉi tiu punkto. Kial oni ne povus konservi la monon kaj anstataŭe ĵeti min en la Baltan maron? Se tiel okazus, mi eĉ hodiaŭ naĝadus en mia propra feta akvo, ja iomete diluita kaj poluita, tamen mia akvo!

– ... Bone do. Jam survoje. Per iom da kubutumado mi sukcesis akiri sidlokon antaŭe, dekstre. Mi vidos la ŝoseon antaŭ mi. Kvankam nun, malfrue aŭtune, baldaŭ mallumiĝos, tamen mi vidos almenaŭ lumojn de la renkontataj aŭtoj. Jam krepuskas, sed ĉi tie en la urbo estas sufiĉe hele. La motoro basvoĉe zumas. Baldaŭ ni estos eksterurbe. Eniros la grandan arbaron. Ĉe ni ĉio estas nur etaj maldensejoj en la arbarego. La tajgo. Nu, feliĉe mi ne iros Siberien. Tri horoj da aŭtobusado jam tute sufiĉas al mi. La kioman fojon mi iras? Mi ne volas kalkuli. Kiomfoje ankoraŭ? Nu, se mi sukcesos konservi ĉi tiun rilaton, povos esti multaj, ĉar ŝi ne intencas migri al civilizita loko. Kaj per kio mi vivtenus min en ŝia vilaĝo? Kolektado de torfberoj? Ne, mi sendube devos frotadi la sidlokojn de ĉi tiu aŭtobuso. Se mi ne fuŝos la aferon. Ĝis mi fuŝos la aferon. Ne, oni ne pensu tiel. Ja oni lernas, dum oni vivas, ĉu ne? Mi devus baldaŭ esti preta ekzameniĝi. Pri kio? Ne pri amado. Certe ne pri amindumado. Eble pri disiĝado. Licenciulo pri disiĝoj. Lic. dis. Eble mi verku dis-ertacion. Aŭ ĉu fondi konsult-buroon? Ja troviĝas multaj konsilantoj pri kiel plibonigi la geedzan vivon. Plifeliĉigantoj, kiel diras Piron. Ĉu ne troviĝus merkato por disiĝa konsultejo? Plidisiganto. Iam oni ja havis helpon de svatantoj kaj parigistoj por trovi kunvivanton. Hodiaŭ certe la mala bezono pli ofte sentiĝas. Post edzperanto sekvas desperanto... Aŭ ĉu desperanto?

Nu, en ĉi tiu buso ŝajne ne estus multe da laboro por disiganto. Ĉi tie ĉiuj jam sidas kiel eble plej dise. Ŝajne nur soluloj aŭtobusas. Kun unu-du esceptoj sidas po unu persono sur ĉiu duopo da seĝoj. Kelkaj eĉ metis sian sakon aŭ vestaĵon sur la duan lokon, por klare montri, ke ne bonvenas apudsidanto. Tio cetere ne necesas, ĉar dum ankoraŭ restas iu libera seĝo-duopo, neniu kuraĝus sidiĝi apud iun nekonaton. Neniu, escepte de alkoholulo aŭ alilandano. Ja ankaŭ mi metis mian

jakon sur la apudan seĝon. Tio estas plej praktika. Plej klare tamen manifestacias tiuj, kiuj sidiĝis ne ĉefenestren, sed sur la apudpaŝejan sidlokon, metante siajn posedaĵojn sur la apudfenestran seĝon. Por atenci tian fortikaĵon oni vere devas esti kuraĝulo – aŭ malprudentulo.

Nun la ŝoforo ŝaltas la radion. Aŭ ĉu kasedilon? Ne, ŝajne estas ia radiostacio kiu dissendas jam eksmodajn furorkantojn el mia junaĝo. Ĉu ĉi tio ne estas... Ne, mi ne memoras, tamen ĝi memorigas al mi tiun tempon. La amojn... La festenojn... Nu, tio estis bela epoko. La tuta estonteco ankoraŭ restis onta... Ĉiuj iluzioj ankoraŭ perdotaj, ĉiuj revoj disŝirotaj. Kvankam mi ne estis vera naivulo, tamen preskaŭ nenio disvolviĝis tute tiel, kiel mi pensis kaj esperis.

Jen komenciĝas nova kanto. Mi bone memoras ĉi tiun enkondukon, sed diable, kio ĝi estas? Ha, jes, ĉi tiu de John Lennon! El la disko "Imagu". "Mi ne volis vundi vin, estas mi nur ĵaluzul'!" Tiun mi iam ofte aŭskultadis. Jam pasis jaregoj de kiam lastfoje... Kial mi ĉesis aŭskulti ĝin? Ĉu mi laciĝis? Ne, nun mi memoras. Ĝi estis unu el tiuj, de kiuj mi disiĝis... –

2. En fojnamaseto

”Kial vi prenas tiun? Ĝi estas la mia!”

”Tute ne. Komuna.”

”Sed vi neniam aŭskultas ĝin!”

”Do ekde nun mi aŭskultos.”

La vizaĝo de Karina disradiis surprizon kaj teruron, pro tio ke ŝi perdos sian plej ŝatatan gramofondiskon. Evidente ŝi tute ne atendis tiel ruzan movon. En mia brusto senfunda nigra truo dum momento iomete malpli grandiĝis. La vivo dum sekundo ne plene malhelis.

Ĉirkaŭ mi la ĉambro estis plena de mebloj kaj aliaj aĵoj, kiuj ĵus formis nian komunan hejmon. Jen du vimenaj foteloj, kiujn ni kune aĉetis. Jen la tablo, alportita el ŝia gepatra hejmo. Kaj jen la kurtenoj, kiujn ni kune tinkturis. Mi metis la diskon, kiun mi tute ne deziris, sed pri kiu mi sciis, ke ŝi deziras ĝin arde, en mian aron. Ni sidis en nia onte eksa gehejmo disdividante tiujn gramofondiskojn, kiujn ni posedis kune, kaj kiuj baldaŭ estos ekskomunaj. Ni divorcigis la muzikaĵojn elektante sinsekve po unu. Kompreneble ŝi komencis elekti diskojn, kiujn ŝi preferis. Tial mia elekto aperis al ŝi ŝoke neatendita.

Sed baldaŭ ŝi komprenis mian taktikon, kaj komencis elekti *miajn* preferatajn diskojn. Tiel ni separis diskojn kaj kreskigis malamon. Fine ni sidis ĉiu kun aro da diskoj, kiujn ni ne deziris. Tamen, konsole, ni sciis, ke ankaŭ la alia malhavos sian ŝatatan muzikon.

Kiu ĝuo pli grandas – ricevi siajn preferatajn muzikaĵojn, aŭ scii, ke la eksamato ne ricevis la siajn?

Antaŭ du semajnoj mi ne sciis, ke tia demando fareblas. Morgaŭ mi scios la respondon.

Eble la respondo estas jena: Dum la disdividado plej grandas la ĝuo malutili al la alia. Poste tiu ĝuo forvaporigas, kaj restas stako da neludotaj diskoj, kiuj krome tro multe memorigas pri ŝi.

Povas esti, ke mi sentis apartan bezonon vidi ŝian vizaĝon konsternita antaŭ mi. Ĉar ĉi tiu disiĝo, disloĝiĝo, disdivido de onte ekskomunaj aĵoj, trafis min ŝoke, konsterne. Tiun konsternon mi tamen neniam montris al ŝi. Mi ne deziris al ŝi tian ĝojon.

Ja estis vere, ke ni de kelkaj monatoj iom ĝisiritiĝe frotis unu la alian. Kiam mi devis staĝi kelkatempe en alia loko, ni interkonsentis, ke tio povus esti saniga paŭzo. Ja nur paŭzo, ĉar nia rilato ja restos, nia komuna loĝejo ja restos, eĉ se Karina provizore dormos tie sola.

Mi eĉ ne suspektis, ke ŝi tie nek dormos, nek solos.

Post kelkaj semajnoj mi ricevis leteron de ŝi. Leteron! Kial do ne telefoni? Kredeble jen la unua letero, kiun ŝi verkis al mi. Unua kaj lasta. Senpacience kaj kun idiote naiva antaŭĝojo mi malfermis ĝin per tranĉilo vespermanĝante omleton kun spinaco. Legis mi, ke mi bonvolu veni hejmen vendrede je la kvara posttagmeze por subskribi la malluon de nia apartamento. Ŝi jam akiris por si mem novan ĉambron.

Neniu klarigo estis aldonita, kaj neniu ja necesis. Mia vespermanĝo perdis sian allogon. Longe poste omleto kun spinaco gustis al mi vomige.

Pro tiu letero ni do sidis ĉi tie, disdividante la havaĵon komune akiritan dum tri jaroj. Mi jam kelkfoje tranoktis en la eksnia apartamento, sed ŝi dormis aliloke. Kie, ŝi ne informis, kaj mi ne demandis.

Kaj sidis ni alifoj – post ankoraŭ du semajnoj, eble – babilante en kafejo, ĉe tablo apud fenestro. Antaŭ mi troviĝis

taso da kafo kaj peco da kuko. Ŝi portis tiun molan bluzon, kiu tiel belformis ŝiajn mamojn, kun kolumo kiu karesis ŝian kolon. Ŝian kolon, kie la fenestra lumo nun montris ruĝan ovalaĵon. Miaj okuloj gluiĝis al tiu marko. Ne! Ne eblas! Kion ŝi faraĉas dumnokte? Ĉu ŝi umas kun iu stulta aknoplana dekkelkjarulo, kiu bezonas kismarki ŝin? Kial ne ankaŭ mordi markon en ŝia orelo, kiel al bovino? Nekredeble!

Evidente ŝi vidis mian gapadon al ŝia kolo kaj konsciis la kaŭzon, ĉar ŝi levis la ŝultrojn kaj turnis sin duone for, por kaŝi la amsignon. Kaj poste ŝi rapidis for de la kafejo. Baldaŭ poste mi vidis la ulon, kies buŝaĉo supozeble suĉis tiun peceton da mola kolo ĝis ruĝiĝo. Kaj kiu ulo! Li devus mem ruĝiĝi! Tiu idioto, tiu ridinda Gotenburgano, kiu ĉiam ŝajnis tiel nervoza kaj parolis tiel rapide, ke ĉiu dua silabo glutiĝis. Ja nun mi memoris, ke ŝi iam menciis lin, nomis lin amuza. Ĉu do, kiam knabino trovas ulon amuza, tio signifas ke ŝi intencas enlitiĝi kun li? Kial diable mi naskiĝis tiel tede malamuza? Nu, li vere estis iom komika. La makslenisto! Ja li estis politike radikala, samkiel ni, kaj li ĉiam ripetis silabglutitajn verojn pri la "makslenismo". Kia kreteno! Kaj kun tiu ŝi ruladis sin sur niaj littukoj!

Ne helpis, kiom ajn mi pentris al mi tiun ulon ridinda. Ponardon li enŝovis en mian bruston, eble eĉ mem ne sciante tion. Kaj daŭros ankoraŭ, dum tiu ponardo restos kaj pikos al mi la koron je ĉiu renkontiĝo kun ŝi, je ĉiu penso pri ŝi, je ĉiu komparo kun ŝi.

Ankaŭ mi devis lui propran studentan ĉambron, hazarde ne tro malproksime de la ŝia. De mia fenestro mi foje vidis ŝin preteriri. Kio nun? Ĉu jam kun la brakoj plektitaj ĉirkaŭ nova ulo? Adiaŭ Gotenburgo – saluton Helsingburgo! En nia universitata urbo vivis studentoj el ĉiuj anguloj de nia lando. Se ne paroli pri aliaj landoj. Ĉu ŝi ne direktis humidan rigardon al tiu eta iranano en ŝia studenta domo?

Nu, la vivo ja ruliĝis plu – ne, nek ruliĝis nek fluis, sed eble

treniĝis. Pluis studoj, diskutoj, renkontiĝoj. Foje mi partoprenis en politika kunveno ĉe Eva, rufa sveltulino, kaj hazarde restis tie sola kun ŝi. Pri kio temis? Sendube pri marksismo. Aŭ feminismo. Kredeble pri la rilato inter marksismo kaj feminismo. Nu, io restis por esplori pri tiu rilato, ŝi proponis tason da teo, ni poste foriros kune al iu tasko, sed unue ŝi devis duŝi sin. Mi atendis, kaj baldaŭ ŝi reaperis, volvita en bantuko. Mi helpis ŝmiri ŝiajn ŝultrojn per haŭtkremo. Kaj la lentuge punktitan dorson. Ŝi havis tute alispecan korpon. Dum mia am... mia eksulino estis mola, rondeta, Eva elaste maldikis. Ŝiaj skapoloj elstaris. Same la koksostoj. Ŝiaj mamoj estis multe malpli grandaj ol tiuj de... mia eksulino. Kaj, strange, kvankam ŝia hararo brulis akre rufe, la pubharoj malhelis.

Ŝi krome movis sin tute alimaniere ol mia amatino. Ol mia eksa, kompreneble. Dum Karina kutime luktis, baraktis, ŝvitis, ĝemis, kriis, prefere supre, rajdante sur mi, Eva kuŝis surdorse, firme tenante permane la litan finon transkape, reciprokante ĉiun mian movon per forta kontraŭmovo, kun nur rapidaj spiradsonoj.

Kion diable mi faras ĉi tie?

Koitas. Kopulacias. Ko to poas. Kun ĉi tiu rufa, svelta Eva, kiu cetere estas tre alloga, kaj kiun sendube multaj uloj envidus al mi. Sed kial? Jes ja, la rilato inter marksismo kaj feminismo. Ĉu vere devas esti tia rilato? Ĉu ili ne povas simple esti geamikoj?

La taso da teo proponita neniam surtabliĝis. Kaj ni ne foriris de tie kune. Ni fajfis pri la farota tasko, kio ajn ĝi povis esti. Disdoni flugfoliojn pri iu maljustaĵo, kredeble. Sed mi ankaŭ ne restis ĉe ŝi. Rajtus mi resti, sed mi ne povis. Kion diable mi faris tie? Mi fuĝis.



Lujare, frusomere, Karina kaj mi ekskursis en orienta Skanio. Tio okazis en la komenco de nia kunvivado. La verda, ondanta pejzaĝo de tiu regiono vere estis bela. Ni haltis en la vilaĝo Ravlunda, kaj eniris la etan, blankan, mezepokan preĝejon de tipe Skania aspekto. Ravlunda ja estis rava, tamen sur tabuleto apudpreĝeja oni informis, ke la signifo de tiu nomo estas Sukcena Arbareto, kaj ke ĝi situas proksime al tiuj Baltmaraj strandoj, kie post orienta ŝtormo oni efektive povas trovi sukcentojn.

Ni rigardis la ĉarman preĝejon, kies volboj portis simplajn pentraĵojn, kaj poste supreniris en ĝian turon, por eble okulkapti ekbrilon de la sukkena marbordo. Veninte kelkajn ŝtuparojn supren, Karina trovis malfermitan pordeton, kiu kondukis en la plej strangan ejon, kiun mi iam vizitis. Granda, obskura subtegmentejo, kie anstataŭ paŝi sur ebena planko, ni devis rampi mane-piede laŭ grizaj morteraĵoj. Kvazaŭ en sonĝo ŝi logis min eniri tien, ĝis mi subite ekkomprenis, kie ni troviĝas. Sur la volboj! Supre, sur la reversa flanko de la bele pentritaj mezepokaj volboj, inter la ligna tegmento kaj la masonita supro de la preĝeja navo. Kvazaŭ en ia transa mondo! Mi frostotremis kaj vokis al Karina, ke ni reiru. Kio okazus, se la volbo rompiĝus sub nia pezo? En terura polvonubo kaj bruego ni falegus kaj mortbatiĝus kontraŭ la ŝtona planko de la preĝejo, kvazaŭ faligitaj anĝeloj, lasante post ni neripareblan truon en la mezepoko. Racie pensante mi ja devis supozi, ke tio ne okazos. Se la volboj jam de sescent jaroj portas sin mem, ili facile portos krome du etajn homajn pedikojn. Tamen, mi preskaŭ ekpensis, ke eble Dio neniam intencis, ke oni paŝu sur la reverso de volboj starigitaj je lia gloro, kiam mi subite rememoris, ke mi ja tute ne kredas je Dio. Fakte, ĉi tiu paŝado komencis ŝajni al mi iom tro metafora. Se la volboj kun siaj religiaj, edifaj pentraĵoj reprezentis la kredon, ni do similis du nekredantojn, kiuj profanante penetris super kaj trans la kredon, por treti sur ĝin kaj esplori ĝian obskuran malantaŭan flankon.

”Mi ne ŝatas ĉi tion”, mi ripetis al Karina. ”Estas nenature. La volboj estas kiel la ĉielo kun ĝiaj nuboj. Ni kvazaŭ rigardas la ĉielon de supre. Prefere ni reiru suben.”

”Tute ne! Estas amuze!” ŝi respondis. ”Rigardi la ĉielon de supre, tion oni ja faras ĉiufoje, kiam oni vojaĝas aviadile!”

Ŝi eble pravis. Tamen tiu argumento ne konvinkis min. Mi ĉiam timis iri aviadile. Ŝajnis al mi, ke se Dio kaj Darwin intencus, ke ni flugu, ili donus al ni flugilojn anstataŭ altec-vertiĝon.



”Kial ni ne povas iri tien kune, Karina?”

”Ni ja faras *ĉion* kune!”

”Tute ne! Nur estas tiel, ke ni havas komunajn preferojn. Kaj krome mi ŝatas esti kun vi.”

”Jes ja, en ordo, tamen ni ne estu *senĉese* kune! Foje faru ion sola, ankaŭ vi!”

”Mi ne volas.”

”Iru al kinejo kun iu alia, ekzemple.”

”Sed nun *hazarde* mi volas spekti tiun filmon de Fellini. Kaj *hazarde* vi volas spekti la saman. Do, kial ne fari tion kune?”

”Ĉar mi interkonsentis kun Lisa.”

”Nu, tio ne ĝenas. Ni iru kune, la triopo!”

”Preslitere: ĉi-foje ne, Peter! Mi volas foje fari ion sen vi.”

Ni povus tiel daŭrigi senfine. Karina ne eldiris la krudan veron – ke mi sufokas ŝin, ke ŝi sentas sin prizonulo en nia rilato. Kaj mi ne diris la gravaĵon – ke mi timas perdi ŝin, ke mi volas ĉiel konservi nian kunecon, fliki al ĝi ĉiun ŝiraĵon.

Ne eblis diri, ke ŝi pravis, dirante ke ni faras ĉion kune. Sed vere estis, ke de kelka tempo mi emis pli kaj pli rezigni la proprajn, sen-Karinajn agadojn, dum ŝi male serĉadis tiajn momentojn de aparteco. Ĉion ĉi mi notis, sed mi ne konsideris tion minaco al nia rilato. Ja temis nur pri *kiom* kunesti. *Kiam* ni kunestis, ni ankoraŭ tre amemis, ŝajnis al mi.

”Kia humiligo! Ĉu vi ne hontas?”

”Pri kio?”

”Spioni pri mi!”

”Trankviliĝu, Karina! Kial mi spionus? Mi simple volis spekti tiun saman filmon... Ja mi jam diris tion.”

”Neniam antaŭe mi tiel embarasiĝis! Kaj Lisa devas pensi, ke vi estas komplete freneza!”

”Ĉu tion ŝi diris?”

”Kompreneble ne, sed ŝi sendube pensas tiel. Aŭskultu: vi povas spekti la filmon de Fellini kaj ĉiujn aliajn filmojn ĉiam ajn, nur ne kiam mi iras al tiu sama kinejo kun amikino!”

”Do, ŝajne vi hontas pri mi...”

”Kial ne, se vi kondutas tiel idiote?”

Mi ne sciis, kion respondi. Iel mi ja sentis, ke ŝi eble pravus, tamen ĉu mi ne rajtas fari kion mi volas, iri kien plaĉas al mi, kiam ŝi evidente faras tion? Ja estis nur hazardo, ke mi havas la saman guston pri filmoj kiel ŝi. Preskaŭ nura hazardo...

Tiuvespere ni enlitiĝis en silento, kaj se nia komuna lito ne estus tiel firme konstruita – fare de mi mem, cetere – ŝi sendube disŝirus ĝin por klare vidigi la fendon inter ni.

Kaj ĉi tiom da malkvieto pro filmo de Fellini!



Stranga, vere stranga, nia konduto dum tiu Esperanto-renkontiĝo! Estus interese scii, kiel la aliaj partoprenantoj perceptis ĝin. Sed tiam ni ne oferis al tiu demando eĉ unu solan penson. Ni tute fajfis pri la programo kaj pri la aliaj ĉeestantoj. Aŭ – ĉu mi kontentiĝu atesti nur pri mi mem? Do, *mi* fajfis pri ĉio cetera, kaj ankaŭ ŝi ŝajnis tion fari. Strange, sendube.

Oni eĉ povus diri, ke ni agis iom aplombe, fieraĉe. Nu, por mi tio ne estis aparta strangaĵo. Ja mi okupiĝis pri Esperanto ĉefe por renkonti ŝin. Sed por ŝi devus esti alie. Ĉu ŝi ne kutimis viziti Esperanto-aranĝojn? Efektive mi neniam demandis ŝin, tamen mi supozis, ke eble jes. Sendube ŝi havis konatojn, eĉ amikojn, eble eksamatojn, amase inter la kongresanoj, sed tiujn ŝi plene neglektis, dividante sian tempon ĉefe kun mi. Kion ili pensis? Eble ili indulge simple konstatis: "Nu, Karina refoje enamiĝis, do ni ne atendu de ŝi normalan konduton".

Antaŭ unu jaro mi unuafoje renkontis ŝin dum kunveno de SEJU en iu junulargastejo. Ni kantis *Mariŝa kisu min*, kaj ŝajnis al mi, ke ŝi rigardis ĝuste min dum tiuj vortoj. "Nur neniu junuleto amas min", kantis Karina ĵetante al mi petegan rigardon, ŝajne. Pli malfrue ŝi klarigis al mi, ke ŝi rigardis min nur por provi distingi la vortojn de la kanto, kiujn ŝi ne perfekte memoris. Stranga klarigo, se konsideri, ke mi sciis ĝin eĉ malpli bone. Tamen mi rapide lernis la kanton. Ja mi ĉiam rapide lernas – almenaŭ kantotekstojn...

En la dua tago oni disdividis taskojn. Mi akceptis la respondecon verki flugfolion pri lingva diskriminado, disdonotan al svedaj gejunuloj. Hazarde ankaŭ Karina anoncis sin kiel volontulon por tiu sama tasko. Aŭ ĉu ŝi unue, kaj mi nur poste anoncis min? La detaloj jam delonge kaŝiĝis sub la polvo

de forgeso. Ĉiukaze ni sidis en la ĝardeno, sub ĉerizarbo plena de rikanantaj pigoj, kun paperoj kaj skribiloj, kune kovante tiun komunan taskon. Mi cerbumis zumkantante gajan melodion, kiu eknestis en mia kapo. Eskapis el inter miaj lipoj iuj vortoj: ”Karina kisu min, sen peto al patrin’...” Ŝi ridis – kaj obeis. Mi reciprokis. Ĉu tiu informfolio entute iam iĝis preta? Sendube ne. Jen eble la kaŭzo, ke la lingva diskriminado ne ĉesis.

Kiam ni jam iĝis firma duopo, kaj mi ĉesis frekventi SEJU-kunvenojn, mi komprenis, ke Karina estas vera movadulo. Malkiel mi, ŝi ne uzis la Esperantomovadon nur por renkonti iun, sed aktivis plu en diversaj organizaj funkcioj, kaj plu vizitadis kunvenojn, seminariojn, kongresojn, ŝajne negrave ĉu kun aŭ sen mi.



Mirinde, kiel la memoro funkcias. Kiel povas duona sekundo tiel ĉiziĝi en la konscion, ke eĉ post jardekoj ĝi restas kun klara lumo, precizaj koloroj kaj intenseco de la sentoj. Kaj tamen mankas al ĝi ĉia drameco kaj graveco.

Mi sidis en Smolanda vilaĝo kun Karina kaj ŝia amikino Daniela. Kiel kutime ni ferie bicikladis laŭ vojetoj, tendumante en arbaretoj kaj paŝtejoj. La sola nekutima afero estis, ke Karina de du jaroj jam estis mia eksulino. Nu, mia ĵaluzo jam forpasis, mi nun rigardis ŝin kun bonvolo sendezira. Eĉ la perditaj gramofondiskoj jam eksmodiĝis. Cetere, ankaŭ Daniela estis nur amikino.

En ĉi vilaĝo ni vizitis kafejon por vigligi nin per matena taso da kafo. Tiu vere estis bezonata, ĉar jam la tagmezo alproksimiĝis. Estis bela somera tago, la suno brilis el blua ĉielo, kaj leĝera vento de temp’ al tempo susurigis betulajn foliojn

ĉirkaŭ ni. Ni sidiĝis ĉe ĝardena tablo, mi kun la vizaĝo al la suno, malkiel la du amikinoj, kies vizaĝoj post kelktaga biciklado jam lumis helruĝe kiel du papavoj.

Post duontrinkita taso da kafo mi per distrita rigardo notis, ke ĉe kradpordeto kondukanta al la strato antaŭ mi staras interparolante du junaj virinoj. Unu el ili ne aparte fiksiĝis en mia memoro. La dua estis svelta, eble tridekjara, kaj portis malpezan someran robon, kredeble el kotono, hele verdan. El mia direkto ili staris rekte sub la radiantanta suno.

Nun okazis, ke je mia dua preskaŭ indiferenta ekrigardo al tiu duopo, ventpuŝo ĝuste streĉis kaj disetendis tiun helverdan kotonan robon, kaj pro la sunlumo radiantanta tra ĝi, la ŝtofo iĝis el mia angulo travidebla. Mi vidis la senzonajn mamojn, platan ventron, blankan kalsoneton kaj brunajn, sveltajn femurojn de la nekonata vilaĝanino. Mi eĉ imagis vidi la etajn, blondajn lanugojn sur ŝia ventro kaj femuroj. Kaj jen la ventpuŝo pasis. Ĉio daŭris certe nur duonan sekundon. Dum tiu mi vidis nenion, kion mi ne povus dum horoj studadi sur ĉiu plaĝo, tamen tiu ono de sekundo penetris en min kvazaŭ korode, vekis mian imagpovon, kiel neniu alia vidaĵo. Neniu alia homo ion vidis aŭ rimarkis. Ŝi mem nenion konsciis; miaj amikinoj nenion notis, krom eble ke mi dum momenteto iom spirite forestis eĉ pli ol kutime. Mi poste ĵetis vicon da ekrigardoj – ne plu indiferentaj – al la nekonataj virinoj, kontraŭ la suno, sed venis neniu plua ventpuŝo kun la precize konvena forto por streĉi robon.

Kiel ofte okazas en nia norda lando, post bela varma tago sekvis sennuba malvarmeta nokto. Ankaŭ la vento iom intensiĝis kaj flirtigis la tolon de niaj tendetoj, en kiuj ni nokte dormis apud arbara lageto. Iam post noktomezo mia eksulino forlasis sian amikinon kaj venis al mi en mia solula tendo, plendante pri malvarmo. La afero estis, ke antaŭ kelkaj jaroj ni aĉetis paron da dormsakoj – jes, ĝuste paron. Ili estis tiel tajlitaj, ke eblis kunzipi ilin, formante unu grandan, dupersonan

dormsakon. Nu, de post tiu aĉeto la dormsakoj ja divorcis, tamen la zipoj ankoraŭ konvenis unu al la alia. Kaj ne nur la zipoj, cetere. Mi do faris mian eksulan devon, varmigante ŝin laŭ kapablo. En iuj socioj ja seksumado antaŭnupta estas tabua, sed ĉe ni oni ne ĉiam respektas eĉ la postdisiĝan tabuon. Do, duone aŭtomate mi amoris kun Karina, iomete kiel revenante sur la stratojn de l' junaĝo, kie la korpo mem scias la ĝustan vojon. Enkape tamen mi vidis ne Karinan, sed la verdobulinon de la ĝardena kafejo. Ĉi tiu fojo estis la unua, tamen ne la lasta, kiam mi dum kunestado kun iu virino reaperigis en mia imago tiun nekonatinon ĉe vilaĝa kradpordeto, kies robon mi travidis dum duona sekundo.



Longe post kiam mi lastfoje vidis Karinan, mi konstatis, ke ŝi verkas kolumnojn en mia ĉiutaga ĵurnalo. De temp' al tempo mi ĉe matena teo kaj buterpano legis ŝiajn personajn komentojn pri diversaj aktualaĵoj aŭ eterne homaj demandoj. Estis stranga sento, post tiom da jaroj denove dum matenmanĝo dividi ŝiajn opiniojn pri la plej diversaj temoj. Nu, intertempe ŝajnis, ke ŝi jam iomete prudentiĝis...

En iu kolumno, pri temo kiun mi jam forgesis, ŝi menciis pretere sian apartan kutimon dormi en plej strangaj lokoj. Ŝi donis du aŭ tri ekzemplojn, inter kiuj estis *Transilvania fojnamaseto*. Neniu plua klarigo sekvis.

Tiu mallonga mencio tuj vekis miajn pensojn kaj demandojn. Do, *ŝi* tie dormis. Bone. Prave. Sed diable, kial ne menciis, ke ŝi efektive ne sola dormis tie? Ja ankaŭ mi kuŝis en tiu sama fojnamaseto! Fakte, kvazaŭ tio ne sufiĉus, ni eĉ ne estis duope. Ja krome Urseto...

Nu, eble mi eku dekomence. La komenco estis, ke Karina,

mi kaj amiko kutime nomata Urseto planis kunan vojaĝon.

Nia lasta ago antaŭ la vojaĝo estis iri al kinejo por vidi vampirfilmon de Roman Polanski, kun li mem kiel la nervoza studento Alfred, kaj Sharon Tate kiel la filino de Transilvania gastejestro. Kiel tiu eta kinejo ĉe la suda ĉefstrato de nia urbo povis plani sian sezonan programon kun konsidero al nia vojaĝo, estis mistero. Sed decidinte vojaĝi al Transilvanio, oni eble devas akcepti kelkajn neklarigeblajn koincidojn.

Tamen la Polanska miksaĵo de komiko, teruro kaj kapturnaj filmkulisoj ŝajnis malproksima, kiam ni staris en koridoro sur la nokta trajno de Budapeŝto kontraŭ Bukureŝton. La trajno kuregis antaŭen tra mallumo. Mi ŝovis fenestron malsupren kaj eligis la kapon. La nokto estis densa, nigra kaj varmega. Sentiĝis kvazaŭ mi ŝovus la kapon en sekan varmegon de bakforno. Envagone la aero plenis de odoroj, kompreneble de ajlo – ĉu iu ekvojaĝus kontraŭ Transilvanion sen preventilo en formo de ajlo? – sed krome de malnova karbofumo, ŝvito kaj ia agaca desinfektilo. Tiel ne odoris Sharon Tate, etendante sian rozan anatomion en bankuvo, dum la kojnodentoj de grafo Dracula minace glimis tra tegmenta fenestro.

Post limkontrolo, kie pistake verdajn uniformojn sekvis viole bluaj, ni devis malfruigi la horloĝon je unu horo. Ni eniris alian tempnan zonan.

Post mallonge ni forlasis la trajnon en apudlima urbo. Veni de la ekstera mallumo kaj silento, kaj eniri en la stacidomon je la dua horo nokte, estis sonĝosimila sperto. Ekstere – neniu sono, preskaŭ neniu lumo, neniu homo. Interne – homoj. Amaso da homoj. La aero estis saturita de la elspiraĵo de homoj, kaj krome de penetrema odoro de kamforo. Kiam ni enpaŝis, tri blondaj gejunuloj, kun ŝortoj kaj dorsosakoj, dudek, tridek, kvardek homoj kolektiĝis ĉirkaŭ ni. Ili rigardis nin. Iliaj vizaĝoj impresis glate, serioze, trankvile, nek gaje nek ĉagrenite, nek bonvenige nek minace. Ili nenion diris. Ili nenion faris. Neniu rideto, neniu

palpebrumo, neniu sulkita frunto – nenio. Nur tiuj klaraj, brunaj okuloj kiuj rigardis rekte en niajn bluajn okulojn. Rigardis, en trankvila atendo, ne cedante, ne palpebrumante. Ni cedis per la rigardo, sed troviĝis neniu rifuĝo, ĉar ĉie brilis aliaj brunaj, klaraj, firme rigardantaj okuloj. Penso kiel fulmo trairis mian kapon: ”Jen Transilvanio!”

La unuan nokton en Transilvanio ni pasigis en tiu stacidomo, inter amaso da homoj, starante, paŝante, poste sidante sur niaj dorsosakoj.

La fojnamaseto tamen apartenis al nia dua nokto en Transilvanio. Tiam ni jam estis pli norde, en or-mina urbo de la provinco Maramureș. Dum kelkaj vesperaj horoj ni travagis la urbon serĉante noktejon, kaj en ĝia periferio, sur ĵus falĉita herbejo, ni trovis fojnon kunrastitan en amasetojn. Sur unu tia kuŝiĝis Karina, Urseto kaj mi, farante al ni komfortan dormejon. Do, ni estis triopo en tiu fojnamaseto. Pli ĝuste, kiam ni vespere enfojniĝis, ni estis triopo, sed matene vekigante, ni jam estis kvaropo. Al la tri svedaj vagabondoj aliĝis nekonato, transilvania migrulo.

Se esti eĉ pli preciza, vekigante ni jam estis pli multaj. Tion ni tamen rimarkis nur post du tagoj. Tiam ĉie sur niaj korpoj la haŭto komencis jukadi, kaj ĉiumatene ni vekigis kun novaj mordoj. Ĉu pro tiu nekonato iu el ni jam vampiriĝis kaj nun nokte atakas la aliajn, suĉante nian sangon? Sed kiu el ni kulpas? Ja ni ĉiuj suferis de tiuj mordoj. Cetere surprizis nin, ke la vampiraj mordoj estas tiel malgrandaj, similaj al la piko de kulo.

Ni devis alfronti la banalan veron: Evidente aliĝis al ni en tiu fojnamaseto ankaŭ familio da pedikoj. Dum nia tuta plua vojaĝo ni vane luktadis kontraŭ ili. Eĉ kiam ni escepte havis okazon lavi nin, ni ne povis samtempe lavi ĉiujn niajn vestaĵojn. Kaj en ĉi tiu kazo eĉ ajlo ne helpis nin disiĝi de la noktaj mordemuloj.

Do, mi komprenis, ke Karina evitis mencii la sango-suĉantajn pedikojn en sia ĵurnala kolumno. Ili vere forprenus iom el la romantikeco de la nomo Transilvanio. Fakte, ankaŭ mi preferus forgesi ilin. Eĉ tion, ke ŝi ne menciis Urseton aŭ la transilvanian vagabondon, mi povus pardoni. Sed tio, ke ŝi ŝajne forviŝis el sia memoro kune kun la pedikoj ankaŭ min, tio efektive pikis min.

– ... *Ŝajne la ŝoforo fine laciĝis de antikvaj furorkantoj. Li serĉas ion alian. Novaĵojn. Hokean matĉon. Svedan dancmuzikon. Ne, li malŝaltas. Dankon! Mi tre aprezas ŝoforojn, kiuj ne devas nepre aŭskultadi radion dum la veturo. Plej ĝenas sporto. Ĉiufoje, kiam mi preskaŭ endormiĝas, iu faras golon, kaj estiĝas diabla kriado. Sed nun jam estas modela silento en la buso. Sendube mi povos iom dormeti. Se nur tiuj maljunaj geedzoj oblikve malantaŭ mi ĉesus babili senĉese. Pro la motora bruoj mi malofte distingas la vortojn, sed la monotona melodio de ilia dialogo iel incitas miajn nervojn. Fakte temas ĉefe pri ŝia monologo, pli precize. Li nur de temp' al tempo mallonge murmuris kiel olda urso-patro. Kaj poste ŝi rekomencas. Mirinde kiel tiu virino povas babili. Ili aspektas, kvazaŭ ili kunvivus jam de kvardek jaroj. Kio povas resti preparolinda post kvar jardekoj? Mi ne imagas. Nu, tion mi neniam spertos. Ĉu ili ne jam diris ĉion direblan? Kredeble jes, sed nun temas pri la ripetaj disaŭdigoj. Jen kial li scias en la ĝustaj lokoj kaj momentoj murmuri adekvate. De jardekoj li sentas, kiam necesas mhmmm hmhm, kaj kiam sufiĉas nura hmhm.*

Strange, kiel povas funkcii geedzeco. Ĉu ŝi vere kredas, ke li partoprenas en ilia interparolo? En ŝia intern-parolo... Eble ŝi ŝokiĝus, se li en iu hela tago subite dirus ion senchavan anstataŭ tiu murmurado. Aŭ se li petus ŝin silenti. Aŭ simple dirus, ke li ne plu aŭskultos ŝin. "Ne plu". Kvazaŭ li nun aŭskultus... Mirinde, ke ili ambaŭ povas kontentiĝi per tia ŝajna interparolo. Mi neniam kapablus tion.

Cetere, eble ŝi eĉ scias deĉifri veran sencon el liaj murmuroj. Laŭdire iuloke troviĝas fajfa lingvo, do eble murmura lingvo ne estus tro stranga. Mi tamen pli emas kredi, ke neniu nova informo estas komunikata inter ili. Sendube nenio nova estas bezonata; ĉio iras glate laŭ konata trako.

Nu, mi fajfas pri lia murmura lingvo. Des pli ĉar ankaŭ vera

interparolo povas foje esti tro postula... –

3. Simultana kapacito

”Tio signifas, ke ne estos vi kaj mi!”

Mi kuŝis kvazaŭ trafita de fulmo, sed de fulmo frostiga. Ŝia diraĵo estis neatendita, tamen logika. Kion mi diris, por provoki tian definitivan distondon de la fadeno inter ni? Mi ne plu memoris precize. Mi tro dormemis. Ja ĝuste tio estis parto de la problemo, kaj supozeble mi ankaŭ menciis tion. Ke mi dormemas. Ke kelkhora interparolado en la komuna lito, malfrue vespere aŭ nokte, post kunestado sukcesa pli aŭ malpli, ke tio por mi simple troas.

Komuna lito, jes ja. Fakte temis pri du litoj. Ja mi estis viro kun spertoj. Ĉi-foje mi konstruis du litojn, taŭgajn por kunmeti kaj uzi kiel komunan geliton. Mi ne refaris la unuafojan eraron, kun Karina, kiam mi konstruis pezegan dupersonan monstron, kunnajlitan surloke en la dormoĉambro, tiel pezan, ke ĝi ŝajnis masiva. Kiu unufoje dissegis eksan geliton en du pecojn, en du sollitojn, en du duon-gelitojn, tiu ne refaras la eraron.

Tiu ne refaras la saman eraron. Kiun eraron mi ĉi-foje faris? Kiel komenciĝis ĉio ĉi?

Ĉio komenciĝis Kristnaske. Kristnasko en mia lando estas familia afero. Sed mi neniam tre talentis pri familia vivo, kaj fojfoje mi klopodis anstataŭe aranĝi Kristnaskan festadon kun amikoj. Tiaj planoj kutime tre prosperis, dum la Kristnasko ankoraŭ malproksimis je almenaŭ du monatoj. Jam en novembro la afero malpli glate iris, kaj ĉirkaŭ la mezo de decembro unu post alia la partoprenontoj de la amika Kristnasko je sia granda surpriziĝo trovis, ke ili havas ankaŭ parencojn kaj familianojn.

Unufoje, nur unufoje, la planoj efektiviĝis, sed ankaŭ tiuokaze pluraj partoprenontoj forlasis la entreprenon. Fine

restis nur Paŭla, Nadja, Lapenna kaj mi. Paŭla estis amikino de amikino de mia eksamatino Karina. Nadja estis amikino de Paŭla. Lapenna estis la longhara melhundo de Paŭla, kaj mi estis... mi estis... nu, vi jam konas min, ĉu ne?

Semajnon antaŭ Kristnasko mi hazarde renkontis mian eksulinon. Ŝi montris al mi rideton pli ol ordinare koran kaj deziris al mi bonan sukceson. Aldone kaj pretere ŝi komentis: ”Ja vi scias, ke ili estas lesbaninoj, ĉu ne?”

Kia estus la vivo sen tiuj mirakle efikaj virinaj informkanaloj?

”Kompreneble”, mi respondis, ”sed ni nur festos Kristnaskon kune, do tio certe ne gravas.” Sed interne mi iom surpriziĝis. Ĉefe pro tio, ke mi mem ne faris la saman konkludon, kvankam mi kredeble disponis pri la samaj faktoj, do pri preskaŭ nenio. Sed eble temas pri tio, kion oni nomas la sesa senso. Aŭ ĉu la seksa senso? Ja mi parte suspektis, ke Paŭla estas tiaulino, aŭ eble ambaŭulino, do povus ŝajni kredinde, ke ankaŭ la amikino samemas. Aliflanke Karina ja estis amikino de alia amikino de Paŭla, kaj mi neniam rimarkis, ke ŝi pli ol necese lesbas. Troviĝis momentoj, kiam mi eĉ malbenis ŝian mallesban konduton. Sendube ia hoko estis en la ezoko.

Paŭla, Lapenna kaj mi renkontiĝis kun Nadja en Stokholmo survoje al luita dometo en Alando. Jam Stokholme mi rimarkis, ke Nadja estas tre speciala virino. Nu, eble ili estas apartaj, tiuj apartulinoj. Nedubeble ŝi posedis ion logan, kaj pri babilado ŝi havis naturan talenton. Nur iom post iom mi ekpensis, ke estas io stranga pri ŝiaj hormonoj. Unu tia okazo estis en la Alanda dometo, kiam mi ĵus duŝis min, kaj ŝi ekhavis la ideon sekigi miajn harojn. Nu, neniuj problemoj, ĉio en ordo inter geamikoj kaj geamikoj, tamen iom surprizis min, kaj pli ol iom ekscitis min, ke ŝi bezonas stari *tiel* proksime al mi dum la viŝado. Mi eĉ estis aŭtomate metonta la manojn ĉirkaŭ ŝiajn sidvangojn, kiam mi rememoris, ke tio eble ne decas, se konsideri ke temas pri

lesbaj sidvangoj.

Ankaŭ Paŭla eble rimarkis ion apartan, ĉar samvespere trafis ŝin terura atako de psikosomataj menstrudoloroj, kiuj komplete paralizis ŝin. Ŝi kuŝis surlite hurlante pro doloro, dum Lapenna grumblante gardokuŝis sub la lito. Nadja kaj mi efektive *devis* enfermi nin en la kuirejo. Tie ni sidis parolante, babilante, interbabilante, kaj jen mi subite rimarkis, ke ni tenas la manojn unu de la alia, kaj mallonge poste ni ambaŭ trovis nin sur la kuireja sofbenko. Tiu mezuris unu metron sesdek kaj estis la plej malkomforta amkuŝejo kiun mi spertis, depost kiam mi klopodis malvirgiĝi en bankuvo, vane, cetere. Nun mi tamen havis iom pli da rutino. Mi memoras, ke trapektante miajn piedojn inter la flankajn kradstangojn de la sofbenko, mi pensis: ”Se ŝi ne pli lesbas ol ĉi tiel, tio estas en ordo laŭ mi.”

En la sekva tago Lapenna mordis al mi la mezan fingron, sed tio estas tute alia historio. Aŭ ĉu eble ne?



Nadja havis apartamenton en postkorta domo ĉe la strato de Sankta Paŭlo. Ĝi situis teretaĝe kun enirejo de asfaltita korto, sed ĝiaj fenestroj ĉiuj rigardis al la najbara korto, kiu situis du metrojn pli alte. Tial la fenestroj situis alte en la ĉambroj, tamen pli-malpli ĉe la grundo de tiu najbara korto, kaj de temp’ al tempo oni vidis piedojn de najbaroj preterpasi. Se mi restus tie pli longe, mi eble lernus rekoni ilin laŭ la ŝuoj, pli ol laŭ la vizaĝoj, kiuj restis nevideblaj alte supre.

La apartamento en si mem do estis ne tre hela, kaj la hejmaranĝa stilo de Nadja igis ĝin eĉ pli obskura. Pro la menciita fenestrosituo ŝi kutime lasis kurtenojn kovri la fenestrojn, kaj en siaj lampoj ŝi uzis maksimume kvardek-vatajn ampolojn. Tiujn ŝi krome kaŝis malantaŭ hejmm-trikitaj

lampŝirmiloj en diversaj malhelaj koloroj. Do, la etoso en ŝia loĝejo estis sufiĉe kaverna.

La origina lito en ŝia dormogroto estis mallarĝa kaj malalta, kun grincantaj risortoj. Vespere, kiam ni gekuŝis en ĝi, mi de temp' al tempo sentis ĝin vibri, dum obtuza murmura muĝado iom post iom kreskis, por poste formorti. Ne, ne temas pri ia amor-metaforo. Tian regulecon kaj frekvencon neniam havis nia seksa vivo. Sed la domo de Nadja estis konstruita senpere super la subtera fervojo, kaj ĝuste en ŝia lito oni ial plej intense sentis la horaron de l' publika trafikado.

Eble la kaŭzo estis, ke tiu lito ne estis tre fortike konstruita. Tion ĝi demonstris kun ŝoka efiko unufoje, kiam vibrigis ĝin ne la subtera trajno penetranta en malluman tunelon, sed nia homa imitado de tiu procedo. En ĉi tiu okazo ni jam longe ŝvitadis kaj baraktadis. Ŝi ŝovis kuseneton sub la postajon, kaptis la litokapon ambaŭmane kaj kunplektis la krurojn super mia dorso, dum mi serĉis piedapogon ĉe la alia litofino. Mi jam aŭdis, ke ŝi proksimas al la finstacio, kaj ankaŭ mi sentis, ke la lokomotivo baldaŭ fajfos, kiam meze de la plej intensa luktado subite aŭdiĝis terura krako, mi falis senprotekte suben, tamen ne en la abismon de volupto, kiel atendite kaj aspirite, sed suben tra la litofundo, sur la plankon. Se la domo de Nadja havus nur iomete malpli fortikan plankon, mi vetus, ke ni ambaŭ falus rekte suben sur la kajon de la subtera fervojstacio de Maria Placo. Nun tamen la vesperaj vojaĝantoj devis malhavi la spektaklon de du genuduloj kraŝantaj inter ilin, kvazaŭ faligitaj anĝeloj. Mi preskaŭ kompatas ilin. Tamen eĉ pli kompatinda estis Nadja, kies unu sidvango, kiu ne plu estis lesba sidvango, se ĝi entute iam ajn estis tia, nun pinĉiĝis inter du risortoj de ŝia disrompita litofundo. Necesis preskaŭ kirurgia operacio por disigi ŝin de la krevinta lito.

Post tiu evento, prave priskribebbla kiel *koito interrompita* en lito disrompita, mi do ofertis mian lignaĵistan lerton por

konstrui novan lito-paron, surbaze de pli fruaj spertoj. Kaj dum mi segis kaj kunnajlis la meblo-duopon, Nadja analizis, interpretis kaj prirezonis la okazaĵon. Kiel ĉiuj lignaj metiistoj, mi tenis faskon da najloj enbuŝe dum la martelado, kio esceptokaze liberigis min de la devo detale partopreni en la diskutado.

Ja modiĝis inter virinoj plendi pri nesufiĉa simultana kapacito de ni viroj. Laŭdire ni ne povas samtempe plenumi du aferojn, des malpli tri aŭ pliajn. Ekzemple ni ne povas promeni maĉante maĉgumon. Aŭ paroli promenante. Se dum promeno oni demandas nin pri io, ni devas halti por povi respondi. Ni eĉ ne povas parolante plenblovi balonon.

Pri virinoj, ŝajnas al mi, estas inverse. Ĉiuokaze tio tutcerte validis pri Nadja. Ŝi nepre *devis* simultane paroli, por povi ion ajn alian plenumi. Se ial ŝi ne povus paroli, ankaŭ ĉiu alia agado haltus. Ŝi parolis ne nur promenante, sed ankaŭ manĝante, legante ĵurnalon, amorante, kredeble eĉ dormante, se entute ŝi iam dormis. Jen eble la kaŭzo, ke mi neniam vidis ŝin plenblovi balonon.



Subite mi vidis la glacipecegon sub mi disfendiĝi, kaj jen mi staris, diskrure, kun unu piedo sur ĉiu peco. "Kuŝiĝu!" mi aŭdis la akompanantojn krii, kaj antaŭ ol mia maldekstra kruro plene sinkis en la Baltmaran akvon glacie malvarman, mi reflekse ĵetis min dekstren, sur la pli grandan el la du pecoj. Ondo da nulgrada akvo plaŭde verŝiĝis al mi. Se estus en julio, ĝi eble refreŝigus min, sed en ĉi tiu griza februara tago mi preferus varman duŝon.

Trans la larĝa fendo senglacia, tie kien mi survojis, mi vidis Nadjan hezite mansigni al mi.

Ni estis deko da sketantoj, kiuj jam kelkajn horojn ekskursis

sur granda glacivasto en la Baltmara insularo. La ideo estis, ke ni ĉirkaŭiru la insulon Husarö por poste returni nin norden. Sed en la koloj inter insuletoj sude de ĝi la glacio iĝis pli kaj pli maldika. Pluraj koloj estis tute senglaciaj, kaj inter tiuj ni serĉis vojon sur glacio, kiu kantis pli kaj pli alte diskante sub niaj sketiloj. Ĉie necesis atenti minace koroditajn truetojn, kie la piedo facile povus trairi. Fine ni devis rezigni kaj retroiri.

Post longa rondirado, evitante fendojn kaj maldikan glacieron, ni alvenis al ĉi tiu larĝa fendego, kie la glacio estis disrompita en pecegojn. Ni jam iris laŭ cirklo, kaj nenie troviĝis sekura glacio. Evidente ni estis izolitaj sur disrompita glaciera areo!

Troviĝis du ebloj. Aŭ pluiri orienten esperante povi surteriĝi sur insulo, kie ni trovos loĝantojn, kiuj povos helpi nin aranĝi transporton per ŝipeto aŭ hidrokoptero. Estus multekoste, kaj krome tre humilige al grupo da sketantoj. Aŭ transiri la fendegon per la glacipecoj. Ni decidis provi la lastan alternativon.

Ni bezonis iom da tempo, sed fine ni trovis pecegon sufiĉe grandan por sekure porti unu personon. Nadja, la plej malpeza el ni, suriris ĝin, kio ŝajnis al mi natura. Mi ĉiam strebis kavalire lasi al virinoj iri la unua, negrave ĉu tra pordo, enlite aŭ sur fragila glacio. Helpe de niaj pikstangoj ni igis la pecegon malrapidege ekmoviĝi kontraŭ la alian glacirandon. Kvankam temis nur pri unu-du metroj, la transiro daŭris plurajn minutojn, tamen fine ŝi povis transpaŝi sur la transan flankon.

Unu post alia ni prame transiris per tiu glacipeco. Mi estis la lasta, kaj ĝis nun ĉio iris glate. Sed nun kompreneble ĉio devis fiaski.

Do, kuŝante sur glacipeco, kiu jam apenaŭ subtenis mian pezon, mi velis plu, jam eksentante leĝeran marmalsanon, bedaŭrinde ne al la transa flanko, sed orienten, en pli vastan akvoareon. Apude sed neatingebla akompanis min la

kunsketantoj, Nadja kaj ok aliaj feliĉuloj.

Oni jam ekdiskutis sendi kelkajn rapidajn sketantojn al Husarö por serĉi helpon, kiam mia glacipecego puŝiĝis kontraŭ alia peco. Tiu estis nur peceto, tamen trans ĝi mi vidis alian, preskaŭ same grandan kiel la mia, kaj trans tiu trian, kiu eble havis kontakton kun la dekstra glacirando. Per mia pikstango mi puŝis la peceton suben, por povi atingi la pli grandan pecon. Fine mi sukcesis, kaj baldaŭ komenciĝis la plej stranga promeno, kiun mi iam faris. Per paŝo longa sed malpeza, almenaŭ tiel mi klopodis troi, mi transiris sur la duan peceton, kiu tuj komencis subakviĝi. Mi tamen ne haltis por sekvi ĝin suben, sed plaŭdante paŝis plu antaŭen sur la trian pecon, kaj de tiu sur la pli-malpli firman glacieron, tamen dekstre de la fendego. Do mi restis izolita de la cetera naŭopo.

Mi estis malseketa pro la akvo, kiu fluetis sur la glacipeco dum mi restis kuŝanta. Fore, trans akvo kaj glacipecoj diversformaj, mi vidis Nadjan levi manon por hezita saluto. Ĝus ni estis kunsketantoj sur glita kaj glata surfaco; nun jam disigis nin netransirebla fendego. La grupanoj transe denove mansignis al mi, ŝajne kun la signifo ke mi sketu orienten. Tiel mi do daŭrigis la jam cirklan ekskurson. Maldekstre de la fendego sketis la grupo, dekstre mi. Nadja kaj mi iris paralele, sen eblo renkontiĝi. En mia kapo aperis malnova memoro el lerneja leciono. Paralelaj estas tiaj linioj, kiuj neniam renkontiĝas, nek interkruciĝas, sed restas eterne disaj.

Sketante tiel, paralele sed dise de Nadja, mi ekpensis pri kelkaj niaj interparoloj. Kelkfoje ankaŭ tiuj ŝajnis al mi paralelaj sed disaj. Mi jam pli-malpli ĉesis fari al ŝi demandojn. Tio apenaŭ plu indus, ŝajnis al mi, ĉar preskaŭ ĉiam ŝi malrespondis ilin per reciproka demando. Povis esti la plej bagatela afero. Foje mi proponis, ke ni vizitu kafejon, kaj ŝi akceptis. Ni sidiĝis ĉe libera tablo, kaj mi iris al la bufedo por mendi ion, dum ŝi restis ĉe table. En la bufedo troviĝis amaso da diversaj kukoj kaj

sandviĉoj, kaj mi repaŝis al Nadja por demandi, kion ŝi deziras. Sed ŝi reciprokis demandante, ĉu mi timas mem decidi. Do mi proponis al ŝi elekti inter kelkaj aĵoj, kiuj eble plaĉos al ŝi. Refoje ŝi rigardis min kun iom oblikva kapo kaj ekzamenis min dirante:

”Peter, ĉu vi neniam pensis pri tio, ke vi bezonus ekzerci vin pri decidoj? Kial tiel angorigas vin la devo elekti? La vivo ja estas tia, ĉu ne? Ĉu vi vere volas trairi la vivon nur atendante, kio okazos al vi, kaj kion aliaj homoj decidos kaj elektos?”

Iel la interparolo do migris al alia temo – for de ŝiaj preferoj pri trinkaĵoj kaj kukoj, ĝis miaj psikaj apartaĵoj. Kiel tio okazis, mi ne plene komprenis. Oni povus opinii, ke la asociado de Nadja estas iom aŭdaca. De aro da kukoj en kafeja bufedo ŝi senhezite saltis al la grandaj demandoj pri esenco de la vivo. Tamen ŝiaj vortoj trafis min kvazaŭ meze de celtabulo. Mi preferus forskui de mi ŝiajn vortojn per ia spritaĵo, sed ŝi kutime ne tre aprezis miajn ŝercojn.

Alia stranga diskuto, kiun mi rememoris sketante plu orienten, estis tiu pri ŝiaj ŝuldoj. Nadja havis kutimon ĉiam prunti monon de amikoj. Kompreneble ŝi prunteprenis ankaŭ de mi, sed tion mi apenaŭ kalkulis, kvankam mi konfesas, ke mi iufoje memorigis al ŝi tiun fakton. Sed iom post iom mi konstatis, ke ŝi jen kaj jen pruntas sumetojn de ĉiuj siaj konatoj. Neniam mi tamen aŭdis, ke ŝi ion repagis. Por mi tio ŝajnis ĝena problemo. Mi mem ne ŝatus tiel dependi kaj ŝuldi al aro da homoj. Tial ŝajnis al mi nature proponi, ke ŝi faru planon pri senŝuldiĝo.

”Kial?” ŝi demandis. ”Ĉu ĝenas vin miaj ŝuldoj?”

”Ne, tute ne. Tamen devas esti embaraso por vi, ĉu ne?”

”Kial do? Kio igas vin pensi, ke ŝuldo al amiko estas embaraso?”

”Nu, tio ja estas natura”, mi opiniis. ”Se oni ŝuldas al iu, oni ankaŭ dependas de tiu.”

”Kial vi diras *oni*? Ĉu temas pri vi aŭ pri mi? Cetere, ĉu tiel malplaĉas al vi dependi de aliaj homoj? Ĉu tio ne signifas havi rilatojn al ili? Ĉu vi preferas vivi sen rilatoj al aliaj homoj?” ŝi demandis.

”Kompreneble ne! Sed nun ja temas ne pri amikeco, sed pri mono. Pri monaj ŝuldoj!”

”Kion do mono pruntita de amiko signifas al vi? Ĉu vi timas, ke tia prunto kreas tro intiman rilaton?”

Mi konsterniĝis. Kiel ŝi povis kunligi monon kun intimeco? Mi ne sciis, kion respondi, tamen ŝi pluis:

”Kial ĝenas vin, ke mi havas rilatojn al amikoj? Ĉu vi volas izoli min? Ĉu monopoligi nian rilaton?”

Mi ne plu sciis, kion diri, kaj jam apenaŭ memoris, kiel komenciĝis la diskuto. Pro mia prudenta propono fari planon de senŝuldiĝo mi trafis sub pluvegon el demandoj, kiuj ŝajne temis pri mi. Ĉio kvazaŭ forglitis ekster mian region, same kiel nun Nadja kaj ŝiaj amikoj forglitis trans la glacia fendo, dum mi sola sketis plu sur mia flanko.

La fino de ĉi tiu malseka kaj malvarma ekskurso kompreneble estis humiliga. La grupo pluriris orienten ĝis la insulo Husarö, kaj mi akompanis ilin tiel longe kiel eblis. Post unu malvarma horo da atendado, mi fine ekaŭdis la bruegon de hidrokoptero, la stranga veturilo kiu povas suriri glacieron, lozajn glacipecojn, eĉ senglacian akvon, kiam necesas. La fiŝisto kiu savis min eĉ ne ridis pri mia fiasko. Ankaŭ mi ne.



”En tiu foto vi aspektas, kvazaŭ vi ŝajnigus esti iu alia”, mi diris.

Nadja rigardis min kun mieno de surpriziĝo. Poste ŝi levis la ŝultrojn, faris senkulpigan grimacon kaj diris:

”Jen precize kion mi tiutempe volis. Strange, ke tio videblas eĉ laŭ la pasporta foto.”

Ŝi uzis sian pasporton kiel identigilon en la banko, kaj atendante mi rigardis la foton. Tie ŝi havis longajn harojn kaj rigidan rideton, dum tiu Nadja, kiun mi antaŭ nelonge ekkonis, estis mallonghara kaj kutime montris mienon seriozan aŭ leĝere ironian.

”Sed mi trovis, ke mi tute vane klopodis por aperi alia ol mi efektive estas. Oni ja povas kaŝi parton de si mem, sed ne eblas transformiĝi en iun alian. Kaj se mi tiel plaĉus al aliaj homoj, ili ja ne ŝatus *min*, sed iun alian, neekzistantan personon.”

Mi konsentis, dum momento forgesante, kiom mi mem ofte strebadis por ne montri al homoj mian veran memon.

”Krome mi konstatis, ke estas tia peno ĉiam ŝajnegadi. Estas multe pli ripozige esti si mem.”

”Pardonu?” diris la bankoficistino, ĉar nun Nadja jam atingis la giĉeton. Ŝi transdonis la pasporton kaj slipon por elpreni monon, demandante:

”Ĉu vi bonvolus kontroli, kiom da mono mi havas en ĉi tiu konto?”

La bankistino klavis, kaj el la aparato aperis slipeto kun kelkaj ciferoj. Ne tre multaj, efektive.

”Cent okdek du kronojn kaj kvindek kvin oerojn.”

”Do mi elprenos cent okdek du.”

”Ĉu vi volas fini la konton?”

”Tute ne. Eble mi iam havos monon.”

La bankistino komencis duonan rideton, kiu ŝajnis esprimi

nekredemon, sed vidante la seriozan vizaĝon de Nadja, ŝi rezignis tiun kaj nur transdonis la monbiletojn kaj monerojn.

Ni aĉetis vinon kaj bovan viandon. Mi prove proponis ion pli malmultekostan, sed la filozofio de Nadja estis:

”Ĉar mi malriĉas, pli bone estas tuj aĉeti ion, kion mi vere deziras, antaŭ ol la mono elĉerpiĝos.”

Kaj ŝi vere estis malriĉa. Ĉiam mankis al ŝi mono, sed kutime ŝi ne multe parolis pri tio. Kion ŝi kontraŭe senĉese pribabilis, tio estis homaj interrilatoj kaj interna vivo. Ne nur *nia* rilato, sed ŝiaj rilatoj al aliaj homoj, miaj rilatoj al aliaj, kaj la interrilatoj de diversaj konatoj. Ŝi analizadis kaj penadis por kompreni la kaŭzojn kaj motivojn, kial homoj agis tiel aŭ ĉi tiel. Nenio estis tro bagatela por meriti ŝian atenton kaj intereson. Dum horoj ŝi povis pritrakti la eblajn motivojn de la ĵaluzo de la nova kunulino de la eksulo de ŝia amikino Margareta. Plej profunde ŝi tamen pritraktis siajn aferojn – ŝiajn kaj miajn. Kaj iom post iom mi alkutimiĝis same diskuti, analizi, serĉi kialojn kaj kielojn, provi kompreni la homan agadon.

Iuvespere ni survojis al ia festeneto kun kelkaj ŝiaj amikoj. Estis varma kaj humida vespero en la fino de majo, kaj la stratoj plenis de promenantoj, kiuj ŝajnis feliĉaj. Ial mi tamen mishumoris – mi poste ne sciis kial kaj kredeble eĉ tiam ne certis pri la kaŭzo – kaj subite decidis ne kuniri. Alia homo ol ŝi eble kolerus, aŭ klopodus persvadi min, aŭ malĝojus. Nadja tuj surstrate komencis esplori mian eblan subkonscian motivaĵon.

”Aŭskultu, Peter! Mi pensas, ke vi nur volas esti pli rimarkita”, ŝi diris.

”Tute ne”, mi protestis. ”Eĉ male. Mi preferus nur kaŝiĝi.”

”Ĉiuokaze la efiko estos, ke vi vekos pli da atento. Ju pli vi rezignos partopreni, des pli vi ĉeestos.”

”Tion mi ne kredas. Viaj amikoj certe ne zorgas pri mi.”

”Aha, do jen kion vi timas. Kaj nun vi certigos ke ili ja zorgu. Troviĝas diversaj manieroj okupi vastan spacon. Vi faros tion per via foresto!”

En tiu momento mi trovis ŝian rezonadon pli-malpli freneza. La diskuto tamen fiksiĝis en mia memoro, kaj poste mi jen kaj jen dum la paso de jaroj konstatis, ke fojfoje vere estas tiel. Iu neĉeestanto dominas kunvenon per sia foresto. Silentulo silentas tiel laŭte, ke oni surdiĝas. Kaj ne malofte mi mem estis tia forestanta silentulo.

Ĝis la tago, kiam mi renkontis Nadjan, mi ĉiam en mia vivo simple agis aŭ ne agis, ĝojis aŭ koleris, amis aŭ malamis. Neniam – aŭ tre malofte – mi demandis min *kial*, aŭ *kio igis min* tiel agi aŭ senti. Sendube mi faris amason da stultaĵoj senintence aŭ senkonscie. Se aliaj homoj kondutis strange, mi ne suspektis, ke *mi* iel instigis tion. Mi paŝis kvazaŭ rigardante nur antaŭen, nek flanken nek dorsen, nek supren nek suben. Do mi devus ne surpriziĝi, se fojfoje okazis kunpuŝiĝoj. Kun Nadja mi nun al kutimiĝis konsideri, serĉi motivojn, esplori ligojn kaj asociadojn. Tio kredeble ne signifis, ke mi nun faris malpli da stultaĵoj, sed eble mi faris ilin en pli maldorma stato. Kiam mi koleris pri io, kion ŝi faris, ŝi eble demandis min, ĉu mi jam alifoje spertis similan reagon, ĉu la situacio iel memorigas alian okazon. Kompreneble tio eĉ pli kolerigis min. Tamen mi ne povis malhelpi, ke ofte aperis tiaj memoroj, asociaĵoj. Kaj poste, kiam mi jam trankviliĝis, ŝi igis min rakonti pri tiu alia sperto, kaj ni diskutis, kio en la du situacioj estas komuna, kaj kial mi eble reagis tiel.

Jes, ni vere pasigis horojn interparolante pri *kiel esti homo* kaj *kiel rilati al alia homo*. Tamen, foje tio simple iĝis iom tro. Kelkfoje mi sentis min kiel rado, kiu turniĝas senĉese kaj neniam rajtas ripozi. Foje mi sentis, ke sufiĉe sufiĉas, kaj tiam mi strikis. Kiel tiuokaze, en la litoj kiujn mi mem konstruis. Fine mi diris, ke mi ne povas plu. Mi devas iam ankaŭ dormi.

Ne estis kverelo. Tute ne. Ŝi nur diris tiujn vortojn, ”ne estos vi kaj mi”. Ne necesis pli multe diri. Ŝi ne koleris, nek petis, persvadis, argumentis. Ŝi simple eldiris la konkludon, kvazaŭ objektivan fakton, ke ne estos mi kaj ŝi. Kion diri al tia malvarmeta verdikto? Ĉu ”Jes, tamen estos ni!”?

Mi elektis diri nenion.

– ... *Suriras la buson virino en leda jako kun knabeto kaj tri aŭ kvar sakoj. Paginte ŝi trenas ĉion malantaŭen preter mia loko.*

”Panjo, mi volas sidi ĉe la ŝoforo!”

”Ne, nun venu!”

”Sed mi volas vidi la ŝoforon!”

”Ne, ni sidos pli malantaŭe. Ne kriaĉu, sed venu kun mi!”

”Mi volas sidi tie!”

”Ĉesu do! Tie sidas sinjoro, ni iros pli malantaŭen.”

La sinjoro, tio estas mi, enmiksas sin. Fakte mi devus esti sufiĉe prudenta por scii, ke mi evitu junan patrinojn kun kvar- aŭ kvinjara filo, sed mi mispaŝas:

”La knabo ja povas sidi ĉi tie apud mi. Tie li plej bone vidos la ŝoforon.”

La knabeto mienas kvazaŭ surprizite, ke ankaŭ sinjoroj scias paroli. Sed la mieno de la patrino, diketa, laca blondulino, inter dudek kvin kaj tridek jaroj, esprimas ĉefe abomenon. Ŝi ŝajnas rigardi sagacajn pedofilojn, kiu insidas por forrabi ŝian idon. Eĉ ne per unu vorto ŝi respondas al mi, sed firme kaptas la manojn de sia knabo kaj trenas lin laŭ la paŝejo de la aŭtobuso, ŝovante la lastan pakadon perpiede laŭ la planko. Li kompreneble eligas teruran blekon, kiun ŝi klopodas superi per falseta ”Silentu do! Ĉesigu tion!” La homoj ĉirkaŭe rigardas min malamike. Sendube mi kulpas pri ĉi tiu kriadado kaj ŝovado, kiu malebligas al ili dormeti.

Kial sinjoroj tiel danĝeras al junaj patrinoj kaj iliaj infanoj? Nu, konsentite, ja okazas teruraj aferoj. Tamen kredeble ne en buso plena de vojaĝantoj! Devas esti io alia. Se ŝi permesus al la knabo disetendi la spiritan katenon inter ili, la umbilikan ŝnuron,

se tiel diri, kiel kaŭĉukan bendon, ŝi eble timus konstati, ke ŝi ne signifas ĉion al li. Nu, oni povus pensi, ke tio estus kontentiga konstato. Liberiĝo, senŝargiĝo. Sed kompreneble tio krome signifus minacon al ŝia memestimo. Eĉ se ŝi havas multajn aliajn taskojn, rolojn kaj identecojn, tamen sendube plej gravas al ŝi esti bona patrino. Ŝajne tio pli gravas al virinoj, ol kiom gravas al viroj esti bona patro.

Mi memoras la rakonton de Anja, kiu jam kiel infano perdis la kontakton kun sia patro. La patrino ne plu eltenis vivi kun alkoholulo kaj do divorcis. Post pluraj jaroj da nekontakto, Anja kiel adoleskulo ekvidis sian patron sidi en parko, kun kelkaj kunuloj kaj aro da boteloj. Ŝi aliris lin, diris "Saluton, mi estas via filino". La patro apenaŭ rigardante ŝin balbutis: "Mi ne havas filinon". Post tiu provo, ŝi denove dum pluraj jaroj ne plu vidis lin, kredeble ne antaŭ ol ŝi plenkreskis. Sed malgraŭ tia fabele misa komenco, ŝi sukcesis krei iaspecan rilaton al sia patro. Almenaŭ tiel ŝi asertis, kvankam ŝajnas nekredeble.

Denove mi aŭdas la plendeman voĉon de tiu juna patrino kaj la blekon de la knabeto. Iliaj voĉoj penetras eĉ tra la motora bruo, kvankam ŝi certe trenis la filon ĝis la fino de la buso. Nu, mi ne zorgu. Nenio fareblas. Mi ne ŝovu la nazon en ilian vazon. Mi zorgu vivon mian kaj lasu vivi alian... –

4. Subtera eksterlandano

”Paĉjo! Ĉu mi povas paroli kun vi?”

”Mi supozas ke jes. Provu!”

”Estas io grava. Eble vi scias, ke Hans iros labori du jarojn eksterlande por Ericsson.”

”Jes, mi aŭdis ion pri tio. En Aŭstralio, ĉu ne?”

”Jes.”

”Nu, tio estas malproksima loko. Se li irus pli foren, li jam revenus hejmen.”

Mi sidis kun mia filo Erik en nia kuirejo. Ĵus ni glutis po grandan porcion da spagetoj kun tomata kaj vianda saŭco, kaj mi ĝuste klinis min dorsen por ĝui la lastan buŝplenon da biero, kiam li ial ekbabilis pri la nova ulo de sia patrino. Ne tre interesa temo, laŭ mi. Tamen li pluis:

”Kaj Panjo intencas akompani lin, kompreneble.”

”Mi ne komprenas, kio estas tiel komprenebla pri tio. Tamen mi pli-malpli suspektis, ke jes. Sed vi devas akcepti, ke mi povas nenion fari pri tio. Jam delonge mi ne povas influi ŝian vivon. Se entute mi iam ajn povis. Mi eĉ kredas, ke male, se mi provus konvinki ŝin resti, ŝi pli certe forirus!”

Post tiu deklaro mi malplenigis la glason, pensante, ke mi elĉerpis la temon kune kun la biero. Bedaŭrinde montriĝis, ke ne.

”Sed ne temas pri tio. Mi tute ne volas, ke ŝi restu ĉi tie. La afero estas, ke mi volas akompani ilin.”

Eĉ riskante, ke ĉi tio ŝajnos scienc-fikciaĵo, mi vetus, ke la normala fluo de la tempo nun haltis dum nedeterminebla

nombro da sekundoj. Kiam la atomoj kaj galaksioj rekomencis cirkuli, mi balbutis:

”Kiel akompani? Se mi estus riĉulo ni povus eble unufoje vojaĝi viziti ilin tie, sed mi dubas, ĉu mi tiom riĉiĝos antaŭ ol ili revenos.”

”Ne temas pri vizito, Paĉjo. Mi volas de nun ekloĝi ĉe Panjo kaj Hans kaj iri kun ili al Aŭstralio. Panjo diris, ke mi rajtas.”

Tiuj tempo-haltoj jam komencis tedi min. Mia buŝo kelkfoje malfermiĝis kiel al fiŝo surtere, kaptante nur vakuon, ĝis mi sukcesis diri:

”Panjo diris, ke vi rajtas, ĉu? Ja vi loĝas ĉe mi!”

”Ĝis nun. Sed mi volas ŝanĝi tion. Mi aŭdis, ke kiam oni aĝas dek tri, oni rajtas mem elekti. Kaj temas nur pri du jaroj. Poste ni vidos.”

”Poste ni vidos? Nur du jaroj? Vi volas diri, ke post du jaroj mi eble revidos vin? Grandioze! Aŭskultu: Vi restos ĉe mi. Se via patrino kaj tiu telefonista vagabondo diris al vi ion alian, vi povas simple forgesi tion! Vi loĝas ĉe mi!”

Mi scias, ke tiu respondo eble ne estis la plej bona strategio. Sed mi ne havis preparitan planon por ĉi tiu kazo. Temis pri fulmatako. Jam ses jarojn senĉese Erik loĝadis ĉe mi krom dum tiuj semajnfinoj, aliaj festoj kaj ferioj, kiujn li pasigis ĉe sia panjo. Ĉio funkciadis glate, ni loĝis en apudaj kvartaloj, li povis laŭplaĉe pendoli inter ni. Lia lernejo situis meze inter ŝia kaj mia adreso, liaj amikoj loĝis en la ĉirkaŭaĵo, sen ia ajn problemo li piediradis inter ĉiuj ĉi lokoj. Sed inter mia apartamento kaj Aŭstralio situis – la tuta terglobo! Evidente ne plu temos pri piedirado.

Sekvis kelkaj frapfermoj de pordoj, kaj pluraj diskutoj inter mi kaj lia patrino, same kiel inter mi kaj li. Li mem jam firme decidis, kion li volas. Kristina, lia patrino, *tiel* bonege

komprenis, ke mi malĝojas, sed li ja devis rajti fari laŭ sia volo. Mi vere provis ĉiujn argumentojn. Vane. Ili jam pensis pri ĉio, dum mi dormis la dormon de senkulpulo. De naivulo. Kaj finfine ja temis pri *nur* du jaroj. Provizore. Tute eblos, ke mi rajtos revidi mian filon, kiam li jam estos aknoplana basvoĉulo.

”Kiel okazos pri lia lernado? Li maltrafos almenaŭ du jarojn de la lernejo!”

”Ni jam esploris tion, kaj troviĝas lernejoj ankaŭ en Aŭstralio.”

Tio ne estis ironio. Kristina neniam ironiis. Sendube ŝi vere demandis iun, ĉu ekzistas lernejoj en Aŭstralio.

”Kompreneble, sed kiajn? Tie oni sendube instruas ĉion renversite! Mi volas, ke li lernu pri la sveda socio, historio, geografio kaj tiel plu. Ne pri iuj strangaĵoj el la subo de la globo! Kriketon kaj kanguruojn...”

”Ĉu vere estus tiel terure, se li ekvidus ion el aliaj partoj de la mondo? Mi kredis, ke vi mem estas iaspeca internaciisto. Kun tiu esperantumado kaj tiel plu.”

Kion diri? Ŝi jam plene neniigis mian argumenton. Kiel strange aŭdi tion de Kristina, kiu mem obstine kontraŭis Esperanton! Iam ŝi lernis de iu instruisto bonegan argumenton, kiu konvinkis ŝin pri la maleblo de Esperanto. Bedaŭrinde ŝi forgesis la argumenton, tamen ŝi restis konvinkita. Jen tipa starpunkto de ŝi. Komforta pozicio, ĉu ne? Resti konvinkita de jam forgesita argumento. Neniu risko, ke iu malkonvinkos ŝin per kontraŭargumento!

Mi tamen pluis:

”Sed la lingvo! Li nenion komprenos!”

”Certe li komprenos. Vi mem kutimas ripetadi, kiel li talentas pri la angla lingvo. Li baldaŭ parolos ĝin perfekte. Tio

poste estos al li granda avantaĝo.”

”Sed li forgesos la svedan!”

”Prudentiĝu, Peter! Kiel li povos forgesi ĝin, dum ni parolos svede hejme?”

”Sed... do almenaŭ pensu pri la ozona truo!”

Tio vere iomete konfuzis ŝin.

”La ozona truo?”

”Jes! Vi, kiu estas ruĝharulino devus zorgi pri tio! Kun tiu travidebla lentuga haŭto. Ankaŭ Erik heredis de vi senteman haŭton. Ja vi scias tion! Vi ĉiam kutimadis volvi lin en diversajn tukojn, por protekti lin kontraŭ la sunbrilo. Sunbrilo! Eĉ en nia latitudo! En Aŭstralio vi loĝus senpere sub la mortiga ozona truo. Vi ambaŭ revenos kun nekuracebla haŭtkancero!”

Nu, konfesinde, mi eble iom tro emfazis tiun temon. Sed kion fari? Ĝi estis mia lasta savilo!

Ŝi tamen ne lasis sin ŝanceli. Iu alia eble simple levus la ŝultrojn, rikanus aŭ skuus la kapon senespere pro mia stulteco. Sed se temis pri riskoj, mi sciis, ke ŝi neniam neglektos ilin.

”Mi jam delonge scias ĉion pri tiu afero. Estos neniu problemo. Eblas aĉeti tie la plej efikajn sunprotektajn kremojn, krome ni neniam iros nudbrake aŭ senĉape en suna tago.”

Mi volis demandi ”ĉu eĉ sur la plaĝo?”, sed subite frapis min memoro. La sunĉapelo de Kristina, kiu iam forbloviĝis de ŝia kapo dum ŝi naĝis meze de kvietaj arbara lageto ombrata de gigantaj piceoj. Ne eblis rekapti ĝin de la akvo, do mi devis ĝistalie ŝmace paŝi en ŝlimo inter kanoj por savi ĝin. Kiel mi povis forgesi tiun ĉapelĉason? Ja mi vetus, ke ŝi en Aŭstralio portos kapveston eĉ endome.

Do, finfine la ozona truo ne sufiĉis por helpi min reteni ĉe mi mian filon.

Lastatempe antaŭ la forvojaĝo Erik vere ŝajnis iom nervoza. Mi kompreneble devis akcepti la neeviteblon kaj ne plu kverelis. Mi estis gaja kiel alaŭdo. Eble iom rigida alaŭdo, tamen. Eĉ la ozonan truon mi ne plu menciis. Mi deziris al li ĉion bonan. Frapis al li la ŝultron. Gratulis al li, ke li havos okazon perfektigi pri la angla lingvo. Sed mi apenaŭ kredas, ke mi tre konvinkis lin pri mia sincereco.

Nu, jen mi do estis. Sola, sendependa, senŝarĝa. Libera fraŭlo. Preta por ĉiaj ofertoj. Mi jam povus festeni tutajn noktojn, plenigi la dormoĉambron per dubefamaj virinoj, drinki, ludi pokeron, danci nuda sur la tablo. Aŭ, se mi hazarde preferus tion, forvojaĝi kiam ajn, ekvagi laŭ la vojoj, esplori blankajn makulojn de la mapo. Almenaŭ en miaj liberaj tagoj. Mi povus ĉiuvespere viziti teatrojn, pasigi la noktojn en fumplenaj ĵazkluboĵ, aranĝi malleĝerajn diskutrondojn pri esoteraj demandoj en mia hejmo. Aŭ pasigi ĉiun liberan horon kuŝante surdorse meditante pri mia vivo.

Do, kion mi efektive faris? Nu, kiu konas min sendube ne erarus, sed divenus je la lasta alternativo. Mi Oblomoviĝis. Paraliziĝis. Amason da energio mi foruzis ĉiutage ne telefonante al Erik. Ja mi decidis ne alvoki lin. Li promesis telefoni al mi de temp' al tempo. Sed neniam mi antaŭvidis, ke povas esti tiel longe de temp' al tempo!



La fingro movis sin laŭ ritmo pli kaj pli malrapida. Ĉu ĝi fine haltos tute? Frosta mano premis al mi la koron. Kalkulante mi vidis antaŭ mi la hezitan takton de tiu fingro. Sendube neniam mi eskapos de ĝia moviĝado minace malakcela.

La akuŝo estis longdaŭra. Akuŝistinoj kaj kuracistoj svarme sekvis unu la alian, ĉiuj tre afablaj, tre ĝentilaj sed tre

sensukcesaj. La infano ŝajne decidis ne eliri. Mi eĉ komencis pripensi, ĉu mi rezignu pri mia partopreno. Ja mi povis malmulte fari, se ne diri entute nenion. Ial mi komencis suspekti, ke eble mia ĉeesto iel efikas retene, repuŝe al la natura iro de aferoj. Stranga ideo! Kial do mi havus tian influon? De kie mia ido prenis la ideon rifuzi naskiĝi? Ĉu li havis kaŭzon eviti min? Certe ne. Ja mi faris lin. Nu... kun iom da helpo, kompreneble. Tio okazis lastaŭtune, en la unua periodo de malvarma vetero, kiam la dommastro ankoraŭ ne ŝaltis la centran hejtdon. Mi bone memoras, ke Kristina venis al mi plendante, ke ŝia lito malvarmas kaj humidas. Ja ŝi ĉiam suferis de nesufiĉa sango-cirkulado en siaj piedoj. Kaj ŝi vere estis iom malvarma, tamen ne tre humida. Iom post iom mi tamen sukcesis varmigi ŝin, pecon post peco, kaj dume ŝi krome iĝis iom pli humida. Kaj jen ŝi do kuŝis, post naŭ monatoj, ĝemante sur akuŝlito.

La ĉefdoktoro eĉ komencis minaci per cezara operacio, se nenio alia efikos. Sed tio ŝajne timigis la naskoton. Tranĉilon li ne volis vidi kiel unuan vidaĵon en sia debuta taglumo. Finfine li ĉesis fiksteni sin kaj plongis suben.

Ankaŭ tiu vojo tamen ne estis facila. Lia patrino estis ne nur malvarmpieda, sed krome mallarĝkoksa. La vojo suben estis se ne dorna, do almenaŭ malvasta kaj senpavima. Sed la heroo de ĉi genezo insiste premis, laboris, batis, kapis, serpentis, vringis kaj tordis sin, knedis kaj puŝis, frotis kaj glitigis, trais kaj subis, naĝis kaj krablis, boris kaj klivis, malrapide, po-iome, pene sed nelacigeble trudante sin suben tra la sola eskapejo. Ja eĉ bubo malgranda, konstante frapante, traboras la vojon patrinan... Lia patrino pli kaj pli akre ĝemis dum la elpuŝaj doloroj. Ĉe ŝia ventro postenis unu akuŝistino, inter la disaj gamboj gardis alia. Kiam la naskoto eksubiĝis por forlasi la uteron, liaj korbatoj, laŭte perataj de eta elektronika aparato sur la pinte ŝvela ventro de lia patrino, iom post iom mallaŭtiĝis. Ĉu pro tio, ke lia koro estis tro streĉita? Aŭ eble la vojaĝo suben simple prezentis

malpli favorajn kondiĉojn al tia disaŭdigo?

Mi ne sciis. Mi notis nur, ke la korbato fadis, kiel Esperanto-elsendo de Pola Radio. La ĉe-ventra akuŝistino forprenis la aparaton, kaj anstataŭe elpoŝigis pli efikan instrumenton – ian antikvan funelon el ligno, kiu povus aperi sur la blazono de akuŝistinoj jam ekde Neandertalaj naskoj. Tiun ŝi almetis al la suba parto de la ventro, kaj iom serĉinte, ŝi ŝajne retrovis la spuron de mia filo. Evidente por kalkuli la korbatojn ŝi levis fingron, kaj komencis regule faligi ĝin laŭ la kora ritmo de la naskoto. Dume, ŝia ĉe-femura kolegino elpoŝigis horloĝon kaj ekis kalkuli laŭ la moviĝoj de tiu montrofingra montrilo, por kontroli la sanstaton de mia naskota ido. Ŝi kalkulis senvoĉe, tamen la fingro ja moviĝis klare videbla al mia pli kaj pli terurita rigardo, daŭre pli... kaj pli... malrapide... – kvazaŭ la metronomo de iu simfonio-fina *ritardando*. Se en tiu momento ĉeestus pliaj flegistinoj, por kalkuli *mian* koran ritmon, mi vetus, ke ĝi estus absolute nula. Ho, mia kor’! El mia brusto nun ne saltu for! Mia rigardo najliĝis al tiu montrofingro tro lantmova, malrapida, pli kaj pli malakcelata, en ĉiu momento minacanta fine halti en la eterno... ĝis subite fingro, ligna funelo kaj ĉio cetera malaperis, ĉar tra okula vualo el larmoj mi vidis kapon aperi inter la femuroj de mia kunvivantino. Jes, kapeto ĉifita, violkolora, kun maldensa, ŝmirita, nigra, ne dece kombita hararo, kaj post neniom da tempo elglitis kvazaŭ angilo el fiŝujo ia maldika, longa, same violkolora bubeto, kiun la du akuŝistinoj mole sed rutine mantenis, krietigis, volvis en pecon da verda ŝtofo, kaj kuŝigis sur la bruston de lia patrino.

Kaj tie li kuŝis rigardante min riproĉe. Jes ja, ne skeptiku! Ja mi scias prijuĝi la rigardojn de miaj kunhomoj. Mi jam spertis multajn diversajn rigardojn en mia vivo. Rigardojn de bonvolo, indiferento, amikeco, enuo, malamo, abomeno, malestimo, senpacienco, fido, iufoje eĉ de deziro. KREDU min, sinjorino, se mi asertas, ke ĉi tiu knabo, kiu baldaŭ montriĝis porti la nomon

Erik, surbruste de sia patrino rigardis min kun mieno kritika kaj riproĉa, se ne diri eĉ kulpiga.

De kie li prenis tiun sintenon? Li nenion diris, li apenaŭ moviĝis, li spiris trankvile, dank' al kio lia haŭtkoloro jam komencis alpreni pli normale rozan nuancon. Sed lia klara, necedanta rigardo estis fiksita sur mi, kaj mi vidis lin pensi: "Nu, ĉu *tiu* ulo respondecas pri ĉi tio? Bela spektaklo! Kaj kion li do povas oferti? Sendube nenion, krom stultan babiladon. Evidenta sentaŭgulo! Aĉ! Kelnero! Bonvolu doni al mi la manĝkarton. Mi malsatas. Kiel aperitivon mi elektas... patrinsukon!" Kaj per tiu penso li efektive direktis sin al la maldekstra cico de sia patrino.

Mallonge poste oni malvolvis de li la verdan tukon, transdonis al mi fortikan tondilon, kaj montris al lia umbilika ŝnuro je du-tri centimetroj for de la eta roza ventro. Kion fari? Mi rigardis lian patrinon. Ja nun estis tro malfrue por pripenti tiun aŭtunan varmigadon de ŝiaj piedoj kaj tiel plu. Refoje mi rigardis mian filon. Liaj okuloj direktiĝis al mi, tamen ŝajne ne plu tiel riproĉe, kiel spite. "Ja vi povas tondi", li ŝajnis pensi. "Ĉiukaze vi tondos nur la karnon. Ne kredu, ke tiu tondilo havas eĝon sufiĉe akran por disigi min de mia panjo!"

Do mi tondis. La umbilika ŝnuro estis dika kaj tenaca kiel bicikla pneŭo, sed kun iom da pacienco kaj obstino mi trasegis ĝin. Mi distondis ĝin, tranĉis la ŝnuron inter filo kaj patrino, kaj dume mi renkontis lian rigardon plenan de spito, defio kaj kritiko. "Ne atendu, ke mi dankos vin pro ĉi tio!" mi imagis lin pensi. "Ne kredu, ke mi ŝuldas al vi ion ajn!"



"Mi ne volas!"

"Sed aŭskultu: estos amuze! Ni iros supren per la ski-telfero, poste estos nur facila glitado reen. Ni jam faris la pezan parton.

Restas nur la amuzo!”

”Mi tamen ne volas. Mi volas reiri per la aŭto.”

”Sed ni ja elserĉos grandan neĝdunon kaj fosos groton! Mi scias, ke troviĝas bonega loko, ĉar estas ravino de rivereto.”

”Ne. Mi iros per la aŭto.”

”Erik, ĉu vi ne memoras, ke ni parolis ankaŭ pri iglo? Mi kunportis segilon kaj fosilon. Eble ni trovos tian neĝon, kie eblas konstrui iglon. Estas malfacile, sed ni provu! Tamen, por tio necesas esti duopo. Sola ne eblas!”

”Ne. Mi ne volas.”

Mi iris libertempoj en montaro kun mia filo. Li frekventis la unuan klason de elementa lernejo kaj nun ĝuis siajn unuajn vintrajn feriojn. La februara neĝo invitis al skiado dum la malmultaj horoj inter tagiĝo kaj krepusko.

En ĉi tiu tago ni jam skiis tri kilometrojn tra la valo, kaj laŭplane ni reiros per telfero kaj agrable dekliva vojo sur la suda flanko de monteto. Mia dorsosako entenis termosojn, sandviĉojn kaj diversajn ilojn por amuziĝi en la neĝo. Sur la montodeklivo kreskis maldensa arbaro el piceoj kaj betuloj. La neĝo estis mola kaj virge blanka, kaj ĝi kaŝis ĉion per indulga kovrilo unu metron dika.

Sub la ski-telfero ni hazarde renkontis familion loĝantan en la sama pensiono kiel ni. Ili ĵus preparis sin reiri aŭte por lunĉi en la pensiono, kaj ekvidante Erik'on treni sin skie kontraŭ la deklivo, ili ofertis veturigon. Mi ne akceptis la proponon. Mia filo male jes.

Ĉi tiu familio pasigis du horojn per slaloma skiado sur la deklivo, kaj laŭ ili tio plene meritigis ilin veturi aŭte al preta lunĉotablo. Ili ne komprenis, ke eblas propraforte treni sin skie, plurajn kilometrojn, por poste fosi neĝogroton kaj tie manĝi

kunportitajn sandviĉojn. Laŭ ili, tio limas al frenezo. Nu, ili ne diris tiel, ja ili estis bonedukitaj homoj, tamen laŭ la mieno mi interpretis iliajn pensojn.

Ĝus ili varbis novan adepton al tiu filozofio. Mian filon.

Nu, kion fari? Mi ne havis veran elekton, sed devis akcepti la fiaskon de l' komuna ekskurso. Ni disiĝis kaj iris malsamajn vojojn – li aŭte al primitiva tablo, mi skie al la neĝduno. Montriĝis, ke fosi groton tute ne estas same amuze, kiam oni solas. Tamen mi fosis. Oni ne rezignu. Se mi decidis amuziĝi en la neĝo, do mi amuziĝu, je diablo! Krome mi konsolis min pensante, kiel amuze estos morgaŭ, kiam mi venos tie skie kun mia filo, kaj ni trovos jam fositan groton je nia servo. Ni haltos, manĝos niajn sandviĉojn, eble alkonstruos ĉambron aŭ duan etaĝon, kaj tiel plu. Estos amuzege!

En la sekva tago evidentiĝis, ke Erik jam mendis lokon en la aŭto tien-reen al la skideklivo. Neĝogrotoj – baf! Li trovis tute aliajn logaĵojn. En la familio estis knabo unu jaron pli aĝa, kiu instruis al li kiel imponi al knabinoj. Paĉjo skiu kaj fosu siajn grotojn, se tio plaĉas al li. Paĉjo estis tute superflua, krom por pagi la luon de slalomaj skioj, ĉar la propraj ne uzeblis por dekliva skiado.

Do, mi fosis plu. Sed la vera ĝojo jam pasis. Mi jam suspektis, ke neniŭ iam ajn venos admiri la groton. Kaj, kiel dirite, konstrui iglon tute ne eblas, se oni solas.

Ĉi tiel mi ne imagis la unuajn vintrajn feriojn de mia filo!



Finfine la telefono sonoris. Mi saltis ĝisplafone, ĉar mi jam pli-malpli forgesis, kiel ĝi sonas.

Parolis Erik. El Aŭstralio. Strange! Li sonis tute same,

kvazaŭ vokante de la apuda kvartalo. Tra la tuta terglobo!

Ĉio estis bona. Ĉio en ordo. La apartamento estis bonega, kun teraso. Ĉu li ion malhavis? Ne, nenion aparte. Nu, iufoje mankis al li la hejmaj amikoj, tamen ne tro grave. Cetere, li ja povis paroli kun ili telefone, ĉu ne? Kaj li jam ekkonis iun el la najbaroj. La lernejo ankoraŭ ne komenciĝis. La vetero estis varma. Ili povis spekti dudek televidkanalojn. Kaj li jam vidis kanguruojn, en zoo-parko, kompreneble. Panjo senĉese plendadis pro la varmo. Sed al li plaĉis la klimato, plaĉis la urbo, plaĉis ĉio. Tamen nun jam estis tempo por...

Por kio estis tempo, mi ne komprenis. Estis iu angla vorto. Sendube ia nacia specialaĵo, kiun ne eblas traduki sveden. Io intime ligita al kriketo kaj kanguruoj.

Mia filo iĝis eksterlandano. Preskaŭ eksterterano. Subtera eksterlandano. Subterano. Kaj mi eĉ ne havis tempon demandi pri la ozona truo.

– ... *Stranga ulo, tiu, kiu enbusiĝis meze de nigra nenio. Kial demandi, ĉu la loko apud mi liberas, se li tamen ne intencas tie sidiĝi? Ja mi diris, ke jes, bonvolu, ĝi estas libera, kaj mi forprenis mian jakon de ĝi. Li rigardis la sidlokon zorgege, eĉ palpis ĝin permane, kaj poste sidiĝis – sur alian lokon, trans la paŝejo! Strangulo! Nun li sidas tie, gapante eksteren en la absolutan mallumon, kapklinante fojon post fojo. Kion li vidas tie? Al kiu aŭ kio li kapjesas? Li aspektas ne kiel kamparano, sed pli multe kiel maljuna hipio. Mi jam ofte konstatis, ke iom apartaj homoj serĉas restadejon en la maldense loĝataj regionoj, kiel ĉi tiu arbaro. Eble ili esperas tie eskapi la socialan kontrolon. Se la najbaroj troviĝas je mejla distanco, ili eble supozas esti nerimarkataj. Mi dubas, ĉu tio funkcias. Nu, mi neniam vivis kampare. Preferas mi la anonimecon de urbo, mi eĉ apenaŭ eltenus urbeton. Ja mi naskiĝis en tia, kaj neniam povus imagi, ke mi revenus. Estas vere, ke nun mi regule pendolas al vilaĝeto. Tamen mi ne povus ekloĝi tie. Mi freneziĝus. Jes, mi vere kredas, ke tia loko rongŭs al mi la nervojn. En la urbo oni tamen ĉiam estas ĉirkaŭita de homoj, eĉ se oni ne rilatas al ili kaj ne estas vidata de ili. Tamen oni sentas ilin. Estas iaspeca sekureco. Tia loko, kie oni konas ĉiujn, kaj ĉiuj konas onin, ege timigus min. Vere, mi timus freneziĝi.*

Jen iu paŝanto laŭ la ŝoseo mansignis al la buso. Ĉu li konas la ŝoforon? Neeble rekoni iun en ĉi tiu mallumo! Aŭ ĉu li malfruis al la haltejo kaj volis ĉi tie haltigi la buson por suriri ĝin? Eble li nur mansignis por esti vidata, timante akcidenton. Ĉi tiun buson ne eblas haltigi kie ajn, kvazaŭ petveturante. Kiu malfruas al ĝi, tiu maltrafas ĝin. La sekvanta buso iros morgaŭ.

Ĉu la vivon regas kaj direktas nur hazardoj? Kio estus bezonata, por neniam renkonti tiun, kun kiu oni poste vivos dum jaroj, eĉ ĝismorte? Preskaŭ nenio. Sufiĉus iam, ke aŭtobuso alvenus du minutojn tro malfrue. Aŭ tro frue. Same malmulte

estus bezonata, por ke la praavo neniam renkontu la praavinon, kaj tuta familio kun geonkloj kaj gekuzoj entute neniam estiĝu. Malfruiĝanta vaporŝipo. Ebria lokomotiv-hejtisto. Rompita remilo. Piko de vespo sur la nuko de koĉero. Ĉu tio vere eblas? Ĉu do tutaj dinastioj povus ekzisti aŭ ne ekzisti pro vespopiko?

Kaj aliflanke – kio do necesus, por ke iu homo ne mortu? Por ke ŝi pluvivu, divorcu, reenamiĝu, gravediĝu, nasku kaj fine sidu kiel laca sed kontenta patriarkino meze inter siaj genepoj?

Tion la historiistoj nomas hipoteza demando, kiun ne indas komenti. Sed ĉu ne la tuta vivo dependas de tiaj hipotezaj demandoj? Ofte ŝajnas al mi tiel... –

5. Pri ŝnuro ne parolu

Oni montris al mi ŝian ĉambron, sed ĝi estis senhoma. Ordinara hospitala ĉambro kun du litoj, du litotabloj, du seĝoj. Hele flavaj muroj, fenestro al ekstera parko.

”Ŝi kredeble sidas en la fumejo. Fine de la koridoro, maldekstre.” La flegisto hastis plu, dum mi reiris koridoren kaj serĉis la indikitan ejon. Ĝi vere estis fuma ejo en flavbrunaj koloroj, eble origine hospitale blankaj. Tri pacientoj tie sidis, silente, dum unu staris, senĉese parolante, verŝajne al iu nevidebla persono. Ĉiuj fumis celkonscie, kvazaŭ cigaredoj ekde morgaŭ ne plu haveblus. Unue mi ne rekonis ŝin, sed ŝi turnis al mi la rigardon, elspiris blankan nubeton, flustris raŭkan ”saluton” sen ŝanĝo de mieno, kaj denove manie ensuĉis fumon.

Kompreneble ŝi estis Petra, kvankam tre ŝanĝita, nedifineble ŝanĝita. Eble iom pli malgrasa, eble kun iom pli sulkoplena vizaĝo, eble kun pli taŭzita, senbrila hararo. Sed la ĉefa ŝanĝiĝo estis, ke mankis vivo en ŝia mieno, en ŝiaj moviĝoj.

Petra finfumis la cigaredon ĝis preskaŭa bruligo de la filtrilo, lasis la stumpeton morti haladze en cindrujego, kaj ŝovis min eksteren, en la koridoron. Ŝia mano kontraŭ mia brako estis osta kaj malvarma. Ŝi pluiris senvorte en sian ĉambron kaj sidiĝis sur la liton.

”Kiel estas al vi, Petra?” mi demandis stulte.

Ŝi ĵetis rigardon miadirekten, tamen ĝi ne atingis tiel alten kiel al miaj okuloj. Poste ŝia rigardo cedis en ian foran malĉeeston. Ŝiaj fingroj plukadis nenion sur la flava litkovrilo.

”Estas neeble. Mi ne povas plu. Estas pli terure ol vi povas imagi. Nenio plu iras. Devas esti fino al ĉi tio.”

Ankaŭ el ŝia voĉo malaperis ĉiu vivo. Inter ĉiu mallonga frazo ŝi paŭzis, kvazaŭ por spiri. Tamen ŝajnis, ke ŝi apenaŭ kuraĝas pleniĝi la pulmojn per aero.

Ekster la fenestro vidiĝis la pintoj de du piceoj. La arboj balanciĝis tien-reen pro la vento, dum ĉi-ene estis silente kaj kviete. La vidaĵo kreis impreson pri tombejo.

”Mi dezirus, ke mi povu iel helpi vin”, mi diris pensante, ke tio tamen preskaŭ certe ne eblas.

Denove ŝia rigardo atingis proksimume mian bruston antaŭ ol cedi. Ŝi ŝajnis pensi dum minuto, kaj jen ŝia mieno ekhavis nuancon pli firman. Ŝi etendis la manon kaj refoje metis ĝin sur mian brakon.

”Vi povas helpi min.”

”Kiel do?”

”Akiru dormigilojn. Iru al kuracisto, plendu ke vi neniam dormas. Vi certe ricevos recepton de dormigilo. Poste iru al dua doktoro, same. Kaj al tria. Donu al mi la dormigilojn.”

Nun ŝi parolis alie, ol ĵus. Mi ekpensis, ke ŝi nun parolas tiel, kiel antaŭe ŝi fumis. Avide. Kvazaŭ serĉante savo-ŝnuron. Ŝia malvarma osta mano sur mia brako subite sentiĝis kiel ĉirkaŭpreno de la morto. Mi frostotremis.

”Ne, Petra, mi ne povas fari tion. Mi volas, ke vi plue vivu!”

”Se vi scius, kia estas ĉi tiu vivo, vi helpus min. Senhezite.”

”Tamen tio ne povos daŭri ĉiam. Estos pli bone, tute certe. Vi devos vivi, por...” Mi hezitis kiun alvoki, sed pluis: ”Por vi mem kaj por viaj infanoj, Petra. Kaj por Rikard. Por viaj amikoj, por mi!”

”Mi utilas al neniu el tiuj. Aŭskultu. Kion vi deziras rekompence pro tiuj dormigiloj?”

”Nenion. Mi ne donos.”

”Vi ricevos kion vi volas. Kion ajn.”

”Ne, Petra. Mi volas, ke vi daŭre vivu.”

Dum momento ŝi sidis senmove sur la lito. Ŝi rigardis siajn manojn kvazaŭ ion abomenan, kaj raŭke flustris:

”Ĉi tio ne estas vivo.”

Poste ŝi senvorte stariĝis kaj eliris el la ĉambro. Mi ne sciis, ĉu resti aŭ ne, sed post momento mi sekvis ŝin koridoren, kaj ekvidis ŝin eniri la fumejon. Mi iris tien, malfermis la pordon kaj enŝovis la kapon en la nebulon.

”Ĝis revido, Petra.”

Neniu respondo.

”Mi revenos viziti vin post kelkaj tagoj.”

Ŝi ensuĉis fumon, tenis ĝin dum momento, poste elblovis ĝin dirante:

”Nur se vi kunportos tion, kion mi petis.”

Mi ne volis paroli pri ŝia peto inter la aliaj pacientoj, do mi salutis ŝin ĝise kaj foriris.

Ekster la psikiatria kliniko troviĝis eta parko, kie flaviĝintaj folioj jen kaj jen flirtis preter mi en la brizo. Venante al la strato, mi preskaŭ surpriziĝis pro la tute ordinara vespera trafiko. Ŝajne la vivo pluiris, kvazaŭ nenio okazus. Ja preskaŭ nenio vere okazis. Nur tio, ke virino perdis sian tutan piedapogon en la vivo kaj iĝis kvazaŭ viva mortinto.



Petra estis bona amikino, kun kiu mi antaŭ nelonge multege laboris kaj agis en movado kontraŭ nuklea energio. Ŝi estis tia

homo, kiu emas preni kiel sian taskon ĉion, kion neniu alia tuj plenumas. Efektive mi malmulte konis ŝin private, intime. Tamen mi trovis ŝin tre simpatia, kaj se ne estus pro tio, ke ni ambaŭ havis niajn familiojn, mi eble klopodus por intimiĝi kun ŝi. Ŝi havis trijaran filinon kun sia kunvivanto Rikard, kaj dum la plej intensa kampanjo antaŭ ”nuklea referendumo” ŝi gravedis je dua ido.

Ni agadis kune – unue por persvadi la aŭtoritatojn, ke la popolo devas decidi per referendumo ĉu uzi aŭ ne uzi nuklean energion. Poste, kiam vere fariĝis tia referendumo, ni kune laboris por ”ne”. La rezulto de tiu kampanjo estis granda elreviĝo. La socia establaĵo montris sian potencon, prezentante tri alternativojn, el kiuj du idente signifis, ke oni unue triobligu la nuklean energion, kaj poste ne ni sed niaj nepoj nuligu ĝin. En tiu konfuzo ni malvenkis, kaj ni faris tion kun profunda sento, ke oni per trompa artifiko priŝtelis nin je la venko.

Dum mi en mizera humoro okupiĝis pri malplenigado kaj purigado de nia eksa loka movada oficejo, Petra preterpase haltis tie. Ŝia gravedeco jam atingis la okan monaton, kaj ŝi paŝis kiel flegma ansero. Sed en tiu peza korpo ŝajnis enfermita maltrankvila spirito.

”Nu, ankaŭ mi transloĝiĝos”, ŝi diris.

”Ĉu vere? Ĉu nur vi, aŭ vi ĉiuj?” mi surprizite demandis. Petra loĝis proksime de nia movadejo, en loĝkomunumo, kun sia kunvivanto Rikard, la filino Emma kaj tri amikoj. Ilia loĝejo – fakte du apudaj apartamentoj – estis ofta renkontejo kaj festenejo de aro da konatoj.

”Nu, ni devos migri. Peter ne plu restos enurbe, kaj Lena kaj Harald volas loĝi duope. Fakte triope, ĉar ankaŭ ili havos idon, kvankam tio ankoraŭ ne estas oficiala. Do, la familio dissplitiĝos.”

”Kaj kie vi loĝos?”

”Ni ankoraŭ ne scias. Rikard volas, ke ni luu domon kampare. Bone por la infanoj, li diras. Sed mi ne scias. Mi timas, ke al mi estos tro dezerte tie.”

”Nu, tion mi komprenas. Mi ĉiam pensadis, ke vi estas urbano. Kiel mi!”

”Aliflanke post ĉi tiu nuklea merdo mi ne emas al ia agado. Cetere la dua ido sendube aktivigos min. Eble mi iĝu kvieta dommastrino.”

Mi ridis gaje pro tiu evidenta absurdaĵo, sed ŝi ne kunridis. Ĉu mi faris malprudente, nur ridante pri ŝia rezignacia perspektivo? Kion mi devus fari, por malhelpi al ĉiuj samtempaj ŝanĝoj en ŝia vivo superi ŝin? Ĉu mi devus antaŭvidi, kaj ĉu entute eblus ion fari?

Jen demandoj sen respondoj. Post tiu renkontiĝo mi apenaŭ plu vidis ŝin, sed mi sciis, ke ŝi naskis duan knabinecon kaj preskaŭ tuj malsaniĝis. Laŭdire temis pri psikozo.



”Ĉu per tablojdoj?”

”Ne, ŝi... oni diris, ke ŝi pendigis sin.”

Fred, komuna konato de Petra kaj mi, aspektis kiel kutime. Eble liaj lipoj iom pli sekis ol normale, ĉar lia lango aperadis iel nerveze por leki la lipojn, kaj krome lia hararo staris rekte supren, sed, nu, tiel ĝi ĉiam elstaris, se mi pripensis. Pripensis, ja. Fakte, pensante pri Fred, pri la tago kaj horo – estis la dudek oka de septembro je la sesa kaj duono vespere – miaj pensoj flugis senbride kiel muŝoj. Sed kiam mi klopodis direkta ilin al Petra, ili limakis tra la labirinto de mia cerbo, tamen nenien alvenis. Mi provis imagi Petran pendu de ŝnuro, kun tordita mieno kaj rigida korpo, sed vane. Miaj pensoj alkroĉiĝis al la demando, *kie* ŝi

pendis. Ja ŝi ne povis pendigi sin en la hospitalo, ĉu? Aŭ eĉ hejme? Kiam Fred rekomencis paroli, mi komprenis, ke mia buŝo laŭte demandis, kie ŝi faris tion.

”Laŭ Rikard la flegistino diris, ke Petra petis forpermeson por iri hejmen. Oni igis ŝin telefoni hejmen, kaj kiam ŝi faris tion, la flegistino komprenis, ke ŝi estas atendata hejme. Sed Rikard ne parolis kun ŝi aŭ rimarkis telefonalkvokon, do eble ŝi parolis kun Emma, la pliaĝa filino, aŭ eble kun la Meteo-servo aŭ entute neniu. Ĉiuokaze oni forsendis ŝin sola per taksio, kaj evidente ŝi sukcesis persvadi la taksian ŝoforon veturigi ŝin al ŝia gepatra domo, kie neniu estis hejme, sed ŝi povis iel eniri nevidite en la kelon.”

Li parolis tro rapide. Mi klopodis sekvi ĉi tiun taksian vojaĝon de Petra per la imago, sed mi postrestis. Same kiel ĉiuj aliaj postrestis. Nur Petra ne postrestis. Nur ŝi atingis sian celon. Denove mi klopodis imagi ŝin pendanta, malrapide svingiĝanta tien-reen, de ŝnuro, aŭ rimeno, aŭ... Mi volis demandi, per kio ŝi pendigis sin, sed tion Fred ja ne povis scii. Sendube li trovis tion iom makabra demando. En dom’ de pendigito pri ŝnuro ne parolu. Kaj diable, ĉu gravis? Ŝi forfikiĝis. Juna viro perdis kunvivantinon. Du knabinetoj, el kiuj unu suĉinfano, perdis sian patrinon. Juna virino seniĝis de neeltenebla kaj nekomprenebla sufero. Seniĝis de si mem. Dum mi... kion mi perdis? Ĉu mi estis tuŝita, entute? Eble mi perdis etan pecon de revo, iluzio, ke mi povus signifi ion al alia homo. Ja mi volis ke ŝi restu, tamen ŝi foriris, disiris de la vivo.

Ĉu mi povus fari ion por malhelpi tion? Ja evidente mi povus malhelpi al ŝi pendi, se mi donus la dormigilojn, kiujn ŝi petis. Sed ĉu mi povus malhelpi al ŝi morti? Eble. Se ŝi ion signifis al mi, sendube mi devus almenaŭ klopodi pli multe. Sed mi ne faris tion. Kial ne?

Mi vekiĝis el miaj pensoj kaj vidis, ke Fred ankoraŭ staras antaŭ mi. Ni renkontiĝis tute hazarde, en stratangulo ekster

vendejo. Jen mi staris kun sako da aĉetitaj varoj enmane, dum li sendube survojis en la butikon. Mi rigardis lian vizaĝon klopodante trovi ion plian por diri. Ŝajnis tiel malinde, simple interŝanĝi pri Petra kelkajn banalajn vortojn en stratangulo. Kvazaŭ ni dirus: *Mi aŭdis, ke Petra pendigis sin. – Ĉu vere? Domaĝe. – Jes ja, kaj eĉ en ĉi tia pluva tago! – Aĉa afero, ĉu ne? Nu, la vespermanĝo atendas.*

Mi malfermis la buŝon kaj lekis la lipojn, kaj post iom miaj oreloj aŭdis la buŝon diri:

”Mi devintus reviziti ŝin en la hospitalo. Nur unufoje mi estis tie. Estis ege deprimiga medio. Ŝi ŝajnis jam morta. Enfermita inter kvar nudaj ŝnuroj.”

Ĉu efektive mi diris tion? Ja mi deliris! Aŭ ĉu mi diris ĝuste ”muroj”, sed miaj oreloj halucinis? La mieno de Fred montris neniun indikon, ĉu mi elbuŝigis pli-ol-kutiman sensencaĵon aŭ ne. Mi volis korekti min, ripetante ”muroj, muroj”, sed mi ne kuraĝis. Eble tiuokaze la buŝo vere prononcus ”ŝnuroj, ŝnuroj”. Prefere mi lasu tion. Ja ni diru kion ajn ni volas, nenio plu tamen povos ion ŝanĝi.

Mi iris hejmen dum en mia kapo ankoraŭ zumadis la sensencaj vortoj diritaj aŭ eble nur pensitaj. Prefere mi silentu. Pri ŝnuro ne parolu.

– ... Kial do ni tiel longe haltas ĉi tie? Aha. Mi komprenas. Tiu juna patrino kun sia ne plu blekanta knabeto elbusiĝas. Kun ĉiuj siaj pakaĵoj. Espereble ŝi nun kunportis ĉion, tiel ke ni povos ekiri denove. Kial homoj pakas siajn aĵojn kaj umojn tiel malkonvene, en aro da diversformaj sakoj? Prefere oni faru kiel mi, metu ĉion en unu grandan dorsosakon. Tiam ne eblas ion postlasi en la aŭtobuso. Aŭ oni havas ĉion, aŭ nenion. Ĉion, kion oni memoris paki, kompreneble.

Mi scivolas, kion mi ĉi-foje forgesis paki. Oni pensus, ke mi jam havas rutinon ĉion kunporti en ĉi tiuj vojaĝoj. Sed preskaŭ ĉiam io mankas. Kutime mi devas demandi, ĉu Marja hazarde havas tion aŭ alion, kion mi forgesis. Mi pripensu... Monon mi havas. Cetere troviĝas nenio por aĉeti tie. Vinbotelojn, ĉi-foje eĉ tri. Mian ŝampuon... la ŝia estas neuzebla. Ĝi bonodoras en ŝiaj haroj, sed en la miaj ĝi fetoras kiel gejkulbo... Ja mi neniam vizitis tian klubon, tamen... Aspirinon, kiun ŝi neniam havas. Imagu, ke troviĝas homo kiu neniam spertas kapdoloron! Kond... Diable! Ĉu mi kunhavas kondomojn? Kial ŝi ne povas uzi pilolon, kiel normala homo? "Ne volas detrui la propran korpon." Ĉu mi vere povis forgesi tion? Nu, lastfoje mi lasis kelkajn ĉe ŝi. La uzado ja ne estis tiel ofta, kiel mi atendis, tiufoje. Ĉi-foje estos alie. Do, kondiĉe ke ŝi intertempe ne foruzis ilin... Aĉ! Mi ne ŝercu pri tiel serioza temo! Sed ĉu sufiĉos por tuta semajno? Preskaŭ tuta – kvin tagoj. Nu, eble ne ĉiufoje necesos. Mi pripensu... en kiu fazo ŝi povas esti nun? Lastfoje... – Ne, lastfoje ne, sed la antaŭlastan fojon ŝi menstruis. Mi bone memoras tiun vesperon. Ŝi sangis kiel buĉita porko... Do, mi simple kalkulu. Tiam estis la dek oka kaj dek naŭa... Aldonu kvar semajnojn, kaj ni atingas la... hmmm... dek kvinan, proksimume. Plus ankoraŭ kvar semajnoj, kaj estas la... la... Al kukolo, mi perdis la ĉenon... Estu kiel ajn, mi ne povas influu tion. La lunajn fazojn, la tajdon kaj la virinajn periodojn, tiujn

simpla viro ne povas ŝanceli. Se necesos kondomo, do estu kondomo. Kvankam mi ja rezignos ĝin, se tio eblos. Oni diras, ke kelkaj uloj ne sentas diferencon inter kun kaj sen. Nekredeble! Kiel ili estas konstruitaj? Kion ili havas, ĉu lignan branĉon? Nu, bone, se necesos, do ni surmetu... Mi ne volas denove sperti... –

6. Petveturi kun metaforo

”Ĉu mi akompanu vin tien?”

Kompreneble mi akompanu ŝin. Pri tia afero oni ne bezonas demandi. Se troviĝas unu okazo, kiam amanto devas akompani amantinon, ĝi estas ĉi tiu okazo.

”Ne, Peter, tio ne necesas. Ja vi povas nenion fari tie.”

Ĉu nenion? Ja mi povas simple esti tie. Por certigi, ke ĉi tion ni faris kune, do mi almenaŭ ĉeestu, kiam Helena eniras tien. Ja mi ne povas kuŝigi min sur la ginekologian seĝon kun ŝi, tamen kuniri tien, resti tie dume, akompani ŝin poste, tiel longe kiel eblas.

”Nu, eble ne necesas, tamen mi volonte...”

Idioto mi estas! Ja mi devus scii, ke estas memkomprenebla afero.

”Vi ne bezonas. Kaj se ni renkontus iun, povus ŝajni strange, ke vi estas kun mi.”

Se ni renkontus iun, tiu estus iu konatino, kiu venis tien pro la sama kaŭzo. Se tiu vidus nin kune, ŝi tute certe ne babilus pri tio al la edzo de Helena. Male, se oni vidus ŝin tie sola, estus pli granda risko, ke oni mencius ion al li.

”Nu, do, se vi efektive pensas, ke mi ne akompanu. Tamen, se vi ŝanĝus opinion, nur diru...”

Kreteno mi estas! Molusko! Fekaĵo! Kial demandi ŝin? Kial ŝarĝi ŝin per tia respondeco? Ja mi devus simple deklari: kune ni faris ĝin, kune ni iru tien por malfari ĝin.

”Mi pensas, ke estos en ordo. Laŭdire abortigo nuntempe ne postulas longan tempon. Feliĉe Lasse jam delonge kutimiĝis, ke mi neniam amordeziras. Li eĉ nuntempe ne scias, kiam mi devus

menstrui.”

Nu, ŝajnas ke ne nur li neglektas tiun kalendaron. Se ni pli bone sekvus ĝin, ĉi tiu situacio neniam estiĝus.

”Nu, ankaŭ mi ne.”

Kial diri tion? Ĉu subkomprenante, ke tion devas prizorgi ŝi? La vero estas, ke post la unuaj fojoj, mi neniam plu demandis ŝin, ĉu estas bezonata kontraŭkoncipilo. Se ŝi nenion diris, do mi ŝajnis kredi, ke ĉio glatas.

”Fakte, estis iom neregule ĉi-somere.”

Des pli da motivo, ke mi ĉiufoje konsideru la aktualan riskon. Sed tion mi ne faris, kaj do mi devus nun fari la malmulton, kiu fareblas. La plej gravajn konsekvencojn ĉiuokaze alfrontos Helena.



Pro la nekutima komenco, mi devus intui, ke tiu tago finiĝos eksterordinare.

Matene mi ekiris pli frue ol kutime por veturi trajne al mia laborejo. Duondormante mi marŝis laŭ la ĉefstrato, kiam iu bicikle preterpasis min kaj komencis transiri flankstraton. Iu aŭto jam haltis sur tiu flankstrato antaŭ la stratkruciĝo, sed ĝuste kiam la biciklo estis preterpasanta fronte de la aŭto, tiu subite ekiris antaŭen kaj trafis la biciklanton. Aŭdiĝis leĝera kraŝo, la biciklo grince malaperis sub la aŭtoradoj, dum la biciklinto falis baraktante sur la kapoton, pli-malpli en la sinon de la aŭtostiranto. Ial tiu tamen ne bremsis la aŭton, sed eĉ male akcelis ĝin kaj komencis stiri dekstren. Mi haltis kaj kvazaŭ en sonĝo rigardis la aŭton ekiri sur la frakasita biciklo, kun viro balance kuŝanta sur la kapoto. Fulme mi ekpensis pri kinofilmoj, kiujn mi spektis, kie mafiuloj intence surveturas homojn por

venĝi pri io. Sed ĉu la mafio vere kutimas uzi rustajn *Volkswagen Golf*? Nu, fine tamen la aŭto haltis, la stirinto ŝokite elaŭtiĝis kaj komencis pardonpete balbuti: ”Mi ne vidis vin!” Iom strange ŝajnis al mi ne vidi viron kuŝantan surkapote de la aŭto, kiun oni stiras. Dume la biciklinto surteriĝis ambaŭpiede kaj serĉis la ruinon de sia biciklo.

Doninte al la bicikla ulo mian adreson, por la okazo ke li bezonos atestanton, mi pluiris al la laboro, pensante ke iufoje oni vere rajtas heziti, ĉu oni spertis realon aŭ sonĝon. La kliŝan metodon por ekscii tion mi provis nur unufoje en la vivo. Tio okazis, kiam mi sonĝis pri cirka trajnvagono falanta de fervoja trako suben en lagon. Mi diris al mi ”ĉi tio ja preskaŭ similas sonĝon”, kaj pinĉis al mi la brakon por kontroli, ĉu estas sonĝo aŭ realo. Tio doloris, do estis realo, ĉu ne? Poste mi vekigis, bonege memorante la sonĝitan doloron de tiu pinĉo. De tiam mi neniam plu praktikis tiun metodon por distingi sonĝon de realo.

Se reveni al la tago de tiu aŭto-bicikla akcidento, mi vere devus demandi min, kiel finiĝos tago post tia komenco. Mi tamen ne havis tempon mediti pri tio, ĉar plene okupis mian atenton tage la laboro, kaj vespere vizito de amikino Helena. Post kelkhora interparolado pri diversaj aferoj, ŝi persone enmanigis al mi amleteron. Mi tralegis ĝin, sed anstataŭ skribi al ŝi respondan leteron, kaj poste transdoni tiun al ŝi, kio sendube estus la plej prudenta reago, mi provis respondi buŝe. Sed sincere mi ne sciis kion respondi al ŝia amdeklaro, kaj pro manko de vortoj mi baldaŭ transiris al la korpa lingvo. Kuŝante en mia lito, baraktante sur ŝi, mi subite estis trafita de la penso, ke mi sendube tre similas la biciklanton de tiu mateno. Nu, konfesinde, Helena certe estis pli mola ol tiu aŭtokapoto. Krome ŝi estis tiel afabla ne frakasi mian biciklon. Eble dank’ al tio, ke mi ne kunportis ĝin en la liton. Kaj ŝi neniam diris: ”Mi ne vidis vin!”

Ankaŭ mi post iom surteriĝis ambaŭpiede kaj klopodis

reorganizi miajn konceptojn. Ni decidis – aŭ pli ĝuste, mi deklaris – ke ni ne plu daŭrigu tiujn korpajn ekzercojn, sed tiu decido ne iĝis longefika. Pardonu min, tute prave, ĉi tio ne estas konvena okazo por vortludi. Do, mi diru: La decido ne efektiviĝis. Male, ni plu renkontiĝadis kaj praktike tenis amrilaton, en kiu tamen la amdeklaroj restis unuflanke ŝiaj.

”Mi tiel ŝatus, se vi iam dirus, ke vi amas min”, ŝi foje suspiris.

”Nu, mi jam klopodis klarigi, kion mi sentas rilate vin”, mi serpentumis. ”Mi prefere ne nomus tion amo.”

”Do kiel vi nomus tion?”

Jen sufiĉe bona kaj natura demando, al kiu mi tamen ne havis respondon.

”Mi ne scias.”

Silente mi elprovadis vortojn. Amikeco. Amoro. Umado. Ameto. Amuzo. Amaro. Neniu el ili konvenis. Mi volis diri, ke niaj vojoj simple interkroĉiĝis en mia lito. Okazis kolizio. Lito-akcidento. Sed mi supozis, ke ŝi ne tre aprezus tian spritaĵon, do mi nur ripetis ”mi ne scias, Helena”.



Jam frue okazis, ke mi iunokte songiĝis pri Lasse, ŝia edzo. Ensonĝe li parolis al mi telefone pri iu domo, situanta en certa valo, kiun li priskribis al mi. Ŝajnis al mi, ke mi konas la nomon de tiu loko, tamen laŭ mi lia priskribo ne estis trafa. Mi memoris ĝin kiel vastan ejon, al kiu kondukis vojeto tra profunda arbaro sub montodeklivo. Ĉu entute ni parolis pri la sama loko kaj la sama domo?

Li kondukis min al sia loko. Ni alveniĝis en iu maldensejo, valetto, kie staris la domo, pri kiu li rakontis. Ĝi estis ligna domo,

sufiĉe granda, kiu ŝajnis neloĝata. Neniu homo vidiĝis. Mi ankoraŭ hezitis, ĉu ĝi estas la domo, kiun ankaŭ mi konas, aŭ eble nur iu similspeca.

Ni eniris la domon. Ene estis mallume, kaj ŝajne ĉi tiu domo ne estis ofte vizitata. Ni supreniris laŭ knaranta ligna ŝtuparo al la dua etaĝo. Tie ni paŝis tra koridoro senfenestra, en kiu troviĝis vico da pordoj. Ni haltis antaŭ unu el la pordoj, kaj mi hezitis, ĉu malfermi ĝin aŭ ne. Sed Lasse avertis min, klarigante, ke povas esti danĝere malfermi pordon en ĉi tiu domo. Malantaŭ la pordoj flamas intensa fajro, kaj se iu malfermas pordon, la fajro povas liberiĝi kaj kaŭzi plenan incendion.

Mi vekigis el ĉi tiu sonĝo kaj longe kuŝis senmove, por klopodi revoki kaj konservi la etoson de tiu valetto, kaŝita en senhoma arbaro, kaj de la granda ligna domo. Pri la minacanta fajro mi ne multe pensis. Ĝi estis tre klara kaj brua. Ĝi altrudis sin, kvankam mi ne tre zorgis pri ĝi. Pli logis min la mistere silenta, nedivenebla domo en la arbara maldensejo.



Sur Kreto ni petveturis kun metaforo. Oficiale Helena pasigis semajnon sur la plaĝo de Agios Nikolaos kun du amikinoj, sed reale ŝi vagis laŭ la vojoj de Kreto – la insulo Kreto – kun mi.

Ĉi tio plaĉis al mi. Verdire la rilato kun Helena jam komencis tedi min. Ne tiel multe la kunestado, sed la ĉirkaŭaj cirkonstancoj. La fakto, ke mi ne povis kontakti ŝin. La malagrabra sento, kiun mi ekhavis, ĉiufoje vidante ŝian edzon. La neceso mensogi, aŭ almenaŭ esti preta mensogi. La necerto pri tio, kian precizan mensogon ŝi liveris, kontraŭ kiu mi prefere ne diru ion malan. Fakte la embarasoj aperis sufiĉe malofte, sed ĝenis min la risko, ke ĉio povas ĉiam ajn enmerdiĝi. Tiel do estis hejme – ĉi tie ĉio ja estis pli bona kaj tute alia! Unusemajna

libertempo en varma kaj ekzotika lando. Glasoj da Kreta brando en la vesperoj. Matena plonĝo en varmetan salan akvon. Amorado en hotela lito. Kaj promenoj en sovaĝa pejzaĝo. Ĝuste per tiu lasta plezuro ni nun intencis pasigi tagon ĉe la suda bordo de la insulo. Aŭtobuso ne iris ĉi tie, do ni petveturis. Pli ĝuste ni pli multe petis ol veturis. La Kretaj aŭtomobilistoj ne tre multis, kaj eĉ tiuj, kiuj preteriris, tute neglektis nin. Eble ni aspektis tro danĝeraj. Aŭ tro malmoralaj. Tamen ja ne eblis vidi de malantaŭ la stirilo niajn fingrojn – la ŝian kun, la mian sen ringo? Do, ni jen paŝis, jen ripozis vojrande sub matena suno pli kaj pli alta, je akompano de ĉirpantaj cikadoj.

Fine haltis unu el du identaj, pare veturantaj ŝarĝaŭtetoj. Temis pri tre ĉarma, tre greka speco de veturilo, helblua, trirada, kun malforta motoro, eta ŝofora kajuto kaj negranda ŝarĝotabulo. Sur tiu kuŝis aro da blankaj plastsakoj kun presita teksto. Ŝajne kemia sterko, kredeble por ia oliva bosko. Ni ne povis esti elektemaj, do ni sidiĝis sur du sakojn, kaj oni ekiris. Supren laŭ ne tro drama montodeklivo la motoroj anhelis kun tre streĉita sono kaj malrapide sed persiste trenis la sterkon kaj nin plu suden, kontraŭ la finon de Eŭropo. La peno ŝajnis troa al tiuj kompatindaj veturiloj, kaj subite aŭdiĝis krako. Ĉu motora apopleksio? Ne, nur truita pneŭo. Feliĉe ne de ”nia” aŭto, sed de la alia, tamen ambaŭ haltis por interkonsiliĝo kaj riparo, aŭ pli ĝuste ŝanĝo de rado. La peze ŝarĝita trirada veturilo nun havis nur *du* funkciantajn radojn, kaj ĝi danĝere kliniĝis kaj ŝanceliĝis.

Mi literumis la markon de la aŭto, skribita greklitere sur ĝia flanko: *M-ε-τ-α-φ-ο-ρ-ο-ς*, Metaforos. Ĉu vere? Nu ja, metaforo povis esti konvena nomo de ĉi tiu transportilo! Sed metaforo de kio? Ĉu eble de la tre homa emo ĉiam deziri pli multe ol kiom la cirkonstancoj permesas realigi? Se tiel, do eble ne estis hazardo, ke Helena kaj mi petveturas kun metaforo, nek ke tiu metaforo danĝere ŝanceliĝas!

Nun oni aplikis al la aŭto krikon, laŭdimensie konvenan al biciklo. Infana biciklo. Jen oni almetis ĝin ien kaj krankis supren tiom, kiom permesis la kapacito de la kriko. Nesufiĉe. Ne eblis forigi la radon. Necesis almeti provizoran apogon. Oni prenis grandan ŝtonon el la vojrandoj, kaj submetis tiun. La rokspeco ŝajnis konsisti el kunpremita flava polvo, kaj la ŝtono pli-malpli diseriĝis je nura akra rigardo. Jen alia ŝtono. Kaj alia. Post kelkaj laŭvicaj ŝtonoj, oni forigis la krikon. La tuta veturilo kun sia tuna ŝarĝo balanciĝis kiel barko en tempesto, dum la du ŝoforoj fatalisme kuŝis sub ĝi por apliki la krikon en alia loko. La du turistoj fotografis. Se renversiĝos la metaforo, ni eble bezonas tiujn fotojn por liberiĝi de murdakuzo. Sendube estus malfacile kaŝi nian sekretan rilaton antaŭ ŝia edzo, se ni kune estus akuzitaj pri murdo al du Kretaj olivkultivistoj kaj kondukistoj de ŝarĝaŭtetoj! Kia morto, cetere! Tio povus esti vivofino inda al la aŭtoro de ĉi tiu libro – dispremiĝi sub la pezo de sia propra metaforo!

Ĉio tamen prosperis, eble ĉar neniu verkisto klopodis helpi pri la aŭto. Oni forigis la truitan radon kaj almetis rezervan, kaj baldaŭ la veturado povis plui. Ni tamen ne alvenis ĝis la suda marbordo – la vojaĝo finiĝis, pli-malpli kiel mi suspektis, apud kampo priplantita per olivarboj. Ni dankis pro la transporto kaj plupaŝis.

Post longa piedirado sur montetoj ni paŭzis en monaĥejo strange senhoma, kaj poste direktis nin reen. Sed vespere tute ne eblis trovi veturigonton, kaj ni demandis nin, ĉu frapeti al iu pordo por petloĝi anstataŭ petveturi. Tamen la vespero estis varma, kaj ni decidis reiri iomete supren sur deklivon por tranokti sub libera ĉielo. Tiun nokton ni do pasigis kune sur herbejo el origano, kaj ĝi ankaŭ iĝis nia lasta nokto kune.

Ĉu tie, sub la Mediteranea nokta ĉielo, flarante la herban spicodoron de nia blufloga origana kuŝejo, ni faris tiun idon, kiun iu ginekologo dek semajnojn poste rutine elsuĉos el ŝi?

Neeble scii, tamen laŭ la datoj tio ŝajnis tute ebla.

Revojaĝante al Svedio ni disiĝis tuj post la flugveturo, kaj poste ni neniam plu rekomencis la rilaton. Tiu petveturado kaj la sekva nokto iĝis ĝia finalo – aŭ pli ĝuste, iĝus ĝia finalo, se Helena ne kontaktus min post kelkaj semajnoj kun la sciigo, ke revenante hejmen, ŝi kunportis kaŝpasaĝeron.

Ni ne diskutis, kiel fari. Ŝi jam decidis abortigi la feton, kaj pri tio mi estis tute kontenta. Nu, eble kontenta ne tre trafas, tamen – rigardante libron pri la evoluo de feto, studante la foton de kvincentimetra estulo kun okuloj, fingroj, batanta koro – mi tamen konsideris, ke nenio alia prudentis ol forigi ĝin. Ke necesis ŝajnigi, ke ĝi neniam ekzistis.

Tio tamen ne malhelpis al mi longe poste, de temp' al tempo, kalkuli kiom aĝa nun estus nia infano, se ĝi rajtus naskiĝi, kaj krome demandi min, kia ĝi estus. Kaj dum jaroj mi ne povis ĝui manĝaĵon spicitan per origano, sen pensi pri tiu filo aŭ filino nenaskita. Eĉ vizito en picejo donis al mi nebulan kulpo-senton. La gusto de origano por mi alprenis malforte amaran nuancon.

– ... *Murmure zumas la motoro. Nigras la nokto eksterbuse. Nur de temp' al tempo ekbrilas kaj tuj malaperas la lumoj de renkontata aŭto. Enbuse regas obskuro. Jen kaj jen iu legolampo ŝetas lumfaskon suben, al vespera ĵurnalo, magazino aŭ eble krimrakonto de iu leganto. Aliloke homoj profundiĝis en sian privatan muzikan mondon per la ekstere neaŭdebla sono de poŝkasedilo. Fojfoje mi eĉ demandas min, ĉu la buso entute moviĝas tra la reala mondo. Eble mi restas ĉi tie senmove, dum la ĉirkaŭaĵo moviĝas aŭ ŝanĝiĝas? Aŭ ĉu ni vojaĝas tra alia dimensio? Aŭtobuso tra la tempo? Aŭ eble tra la subkonscio? Stultaĵo! Kial mi deliras? Ja ĉi tiu monotoneco ŝajne posedas povon enkonduki min en meditan staton, tamen mi konas tre bone la itineron de ĉi tiu buslinio. Eĉ tro bone, ja mi konas ĝin kiel la propran poŝon. Ĝi kondukos min de mia urbo ĝis la vilaĝo de Marja. Punkto, fino. Nenio plua. Nenio transa.*

Kompreneble, ĝi povus iri pli rapide, tamen iam mi alvenos al ŝi. Bone, ke mi ŝin havas. Ke eblas paroli kun ŝi pri preskaŭ ĉio ajn. Mi ne ofte havis homon, al kiu mi povis senmaske kaj senkaŝe paroli. Kredeble nur kun miaj laŭvicaj inoj mi tion povis. Eĉ ne kun ĉiuj el ili. Eble tamen kun du-tri aliaj homoj. Cetere mi estadis tre sola. Ankaŭ fizike, sed plej elĉerpis min la spirita soleco. Nu, ĝi laŭdire estas tre ofta fenomeno. Eĉ homoj kun amaso da sociaj rilatoj, familianoj, amikoj, kolegoj, klientoj kaj mil diabloj kutimas plendi pri tiu interna soleco. Sendube tiu speco de izoliĝo eĉ estas pli terura. Mi eble gratulu min, ke mi malofte spertis tian solecon en homamaso. Estas iomete kiel pri malsato. Sendube oni pli facile eltenas malsaton, se ne necesas senĉese rigardi kaj flari tagmanĝan tablon kun deliciaj pladoj.

Tamen mi longe esperis, ke la vivo povu ŝanĝiĝi, ke mi mem povu ŝanĝiĝi. Kiel junulo mi volis ŝanĝi la eksteran mondon. Pli aĝa miajn proprajn vivkondiĉojn. Iom poste min mem. Sed nun ĉio ĉi ŝajnas vana peno. Ĝis nun mi atingis nur duonvoje al

respekti kaj elteni min mem kun miaj malfortaj flankoj. Aliajn homojn mi ankoraŭ ne lernis toleri.

Efektive ŝajnas al mi, ke dum la vivo mi dediĉis amason da tempo al konsiderado kaj esplorado pri la homa konduto, mia propra karaktero, miaj rilatoj al aliaj homoj, la reagoj de aliaj homoj al mi. Sed ĉu tio iel helpis min? Ĉu tio utilis? Kredeble ne. Cetere, tiu tuta projekto nun jam komplete enmerdiĝis... –

7. Kanto de baleno

Jen ni do staris, la tuta grupo. Kelkaj staris kvazaŭ ĉeneroj, kun mano sur ŝultro unu de la alia. Ĉirkaŭ Birgitta kunpuŝiĝis tuta amaso. Kaj iom flanke, ekster la aro, jen du insuloj, du izoluloj. Tie staris Ritva, kaj ĉi tie mi. Ŝajne neniu el ni trovis iun el la aliaj, kiun ni vere fidus en malfacila okazo.

Ĉar tio estis nia tasko: pripensi, al kiu ni plej volonte turnus nin por apogo, se ni venus en tian situacion, ke ni volus forlasi la grupon. Ni pripensu tion kaj poste metu manon sur ŝultron de tiu persono.

Mi ne scias, kial tiu demando entute leviĝis. Ĉi tiu grupo origine devis funkcii nur dum limigita tempo, kaj ĝia celo estis okupiĝi pri songoj kun helpo de psikodrama tekniko. Nun jam alproksimiĝis la fino, kaj tiam oni komencis paroli pri ebla daŭrigo. Mi anoncis, ke mi kredeble ne partoprenos en eventuala daŭrigo, kio vekis iom da bedaŭro ĉe aliaj grupanoj.

Dum ĉi tiu lasta semajnfino la songoj cetere ŝoviĝis iom fonen, por lasi spacon kaj tempon al pli ĉiutagaj problemoj. Interalie Reinhard, nia gvidanto, plurfoje metis min en la grupan fokuson, prilumante miajn malfortajn flankojn kaj mian ambiguon en diversaj situacioj de la vivo. Nun estis dimanĉe posttagmeze, kaj mi sentis min iom malmilde traktita kaj sufiĉe laca.

Mi rigardis ĉirkaŭ mi. Ĉiuj restis en siaj elektitaj lokoj. La seĝoj estis ŝovitaj flanken. La etaj diverskoloraj spotoj super la improvizita scenejo ne estis ŝaltitaj. La aero kvazaŭ gravedis je atendo. Streĉa atendo.

Reinhard lasis sian akran rigardon skani la grupon kvazaŭ radare, kaj poste li turnis sin unue al Ritva. Ŝi tuj ektemis kaj komencis balbuti:

”Nu, la afero estis tia, ke mi povus imagi plurajn, kaj mi ne sciis kiun elekti el tiuj...”

Tiel mallerte fabrikitan logaĵon Reinhard normale neniam glutus. Li devigus ŝin iri al tiuj personoj, pri kiuj ŝi laŭdire pensis, kaj prove surŝultrigi al ili sinsekve sian manon, unu post la alia, por fine resti ĉe unu el ili. Sed, strange, li nun akceptis ŝian pretekston al neelekto preskaŭ avide. Ŝajne li ĉi-foje elektis min kiel la ĉefan favan ŝafon en la grego. Jam dum du tagoj li peklis, spicis kaj rostis min, do jen li alproksimiĝis por ŝiri el mi mordaĵon per siaj etaj sed akraj, flavecaj dentoj. Kiel mi iam povis trovi tiun viron varma kaj subtenanta? Mi sentis, ke mi nun preparas min kvazaŭ al bato kontraŭ mian abdomenon. Ke venos bato, pri tio mi ne dubis, tamen restis sperti, el kiu direkto. Kiel ĉiam, ĝi trafis min surprize, el neatendita flanko.

”La tuta grupo ĵus dediĉis horojn da laboro al vi, Peter”, li komencis. ”Eĉ pli ol horojn, monatojn, efektive. Sed vi forpuŝas ilin ĉiujn, sen io ajn. Ĉu vi povas imagi, kiel ili sentas, vidante vin stari tie, sola, sen la plej eta rekono, ke ili ion signifas al vi. Ĉiuj ĉi tie investis emocie en vi, sed vi rifuzas ĉiujn.”

Estiĝis tomba silento. Mi ne komprenis, kiel li povas tordi la aferon tiel. Mallerte mi provis kontraŭi:

”Tute ne... mi tute ne rifuzas iun. Male, mi tre ŝatas plurajn el la grupanoj. Sed ja ne temis pri tio...”

”Do, pri kio temas, laŭ vi?”

”Nu, vi faris demandon, ĉu ne? Mi simple klopodis respondi la demandon sincere...”

”Do laŭ vi ĉiuj aliaj ĉi tie estas malsinceraj. Bela prijuĝo. Mi devas diri, ke vi agas kvazaŭ celkonscie por saboti vian rolon en la grupo.”

Mi volis diri, ke ne temas pri malsincereco. Tamen, ni ja ofte iom oferas al la eta ĉiutaga hipokritado, kiu glatigas niajn

sociajn rilatojn. Ankaŭ mi konsideris, ĉu mi stariĝu ĉe Birgitta, kiel tiom da aliaj. Ĉu sorbiĝi en la sekuran amason? Sed io, mi mem ne sciis kio, igis min ne akcepti tiel facilan solvon. Eble Reinhard sciis kial mi ne volis tion. Mi faris duan provon:

”Nu, la demando ja estis ’al kiu mi irus, se mi emus forlasi la grupon’. Bone, eble la plimulto ĉi tie ne spertis similan situacion, sed mi faris tion. Tia impulso troviĝas en mi pli-malpli senĉese, kaj tial mi bone scias, ke en tia ekstrema okazo, mi ne turnus min al iu grupano, sed simple forkurus...”

”Vi interpretas la demandon tre rigore. Ja ne temas pri la momento de foriro, sed pri la momento *antaŭ* foriro.”

Nun mi tute konfuziĝis. Ĉu mi miskomprenis la demandon, dum ĉiuj aliaj komprenis ĝin ĝuste? Mi komencis pripensi. Sed... kiom longe antaŭ la foriro? Tamen mi ne kuraĝis fari tiel infanecan demandon, kaj ankaŭ ne havis tempon, ĉar Reinhard pluis:

”Ĉi tio estas grava demando. Mi ne povas havi en mia grupo partoprenanton, al kiu mankas eĉ tia minimumo da socia apogo.”

Mi komencis koleriĝi kaj atentigis lin:

”Tamen mi de jaroj jen kaj jen partoprenas en viaj grupoj. Kaj ĉi tio estas nenio nova. Mi eĉ dirus, ke komence mi sentis pli grandan izoliĝon de aliaj grupanoj ol hodiaŭ.”

”Se tio estas nenio nova, tio tamen ne ŝanĝas la fakton, ke mi ne allasas partoprenantojn sen fido al siaj samgrupanoj.”

”Mi tamen neniam kaŝis tiun problemon.”

”Sed mi ne konsciis, ke ĝi estas tiel serioza.”

”Ĉu tio do signifas, ke se vi sciis, vi neniam enlasus min en la grupon?”

”Prave. Mi devas pensi pri la kohereco de la tuta grupo. Unu

tia ano, kiu izolas sin aŭ rifuzas la aliajn anojn, povas detruiti tutan grupon.”

Subite mi sentis la situacion tute malreala. Kiel li povis tiel misprezenti la aferon? La vero ja estis, ke mi de jaroj luktadis en liaj grupoj por liberiĝi de mia sento de fremdeco kaj izoliĝo. Kaj efektive, en ĉi tiu lasta grupo, kiu daŭris kelkajn monatojn, mi ekhavis sufiĉe centran pozicion, parte dank’ al mia kolektita sperto pri la psikodramaj metodoj, kiujn ni aplikis, parte ankaŭ pro ia kreskinta memfido. Ĉar esence tute ne temis tiel multe pri mia fido aŭ nefido al la ceteraj grupanoj, kiel pri mia nesufiĉa memfido.

Nun mi tamen tiel koleris, ke mi povis elbuŝigi nenion el ĉi tio. Mi ekpensis pri kelkaj aliaj okazoj, kiam Reinhard laŭ mia opinio traktis homojn krude kaj maljuste. Kutime temis pri personoj, kiuj volis fini sian partoprenon en grupo, sed kiujn li konsideris nesufiĉe maturaj por forlasi ĝin. Aŭ male, pri homoj, kiuj volis aliĝi al grupo, sed kiujn li ne trovis maturaj aliĝi. En ambaŭ okazoj ŝajnis al mi, ke li ne kapablas disiĝi de iu homo sen profunde malamikiĝi al tiu. Nun mi tamen unufoje spertis tiun ludon ne kiel spektanto, sed kiel lia antagonisto, kaj tio estis tre malplaĉa sperto.

Kial li agis tiel?

Ĉu temis simple pri tio, ke mi esprimis neintencon partopreni en eventuala daŭrigo de la grupo? Ĉu li ne povis elteni, ke iu libervole rezignas pri la daŭrigo, kaj do anstataŭe preparis sin por forpuŝi tiun homon, alivorte min, kun la verdikto *nedezirata*?

Mi do forlasis la grupon de Reinhard en malamikeco. Kelkaj grupanoj tiel maltrankvilis pro tio, ke ili petis min renkontiĝi por interparoli pri la afero, sed ankaŭ en tiun kunvenon li neinvitite entrudis sin, kaj ni definitive disiĝis kverelante.

La tuta situacio ŝajnis al mi bizara. Mi sentis min kiel Woody Allen rifuzita de sia psikanalizisto. Ridinda sceno – tamen mi ne kapablis ridi pri ĝi.

Tamen mi dum longa tempo spertis tiom da momentoj emociigaj kaj vivigaj en la psikodramaj grupoj de Reinhard kaj aliaj. Mi tie traktis kaj respertis ne nur proprajn vivodramojn, de amproblemoj ĝis interbatalo kun laborestro, sed krome mi partoprenis help-rolon en la dramoj de longa vico da aliaj grupanoj. En unu grupo mi fojon post fojo devis roli kiel teda, laca kaj laciga, jam de jardekoj tro bone konata edzo de unu grupanino post la alia. Mi volonte faris tion, tamen mirante ke oni elektas la plej kronike maledzan grupanon al tiuj roloj.

Mi spertis, ke ĉi tiu metodo estas sufiĉe aparta. Dum en kelkaj aliaj psikoterapiaj skoloj oni laŭdire emas serĉi *sian memon* aŭ *la plej profundan, plej veran senton*, por poste agi laŭ tiu, en psikodramo oni iel faras inverse. Oni komencas per agoj, fojfoje eĉ el la plej absurdaj kaj surrealistaj situacioj, por eble iam per tiu agado trovi iun bazan senton, iun kernon de sia memo. Tio memorigis al mi romanon de *Singer*, kie iu homo, perdinte la sencon de sia vivo, ricevas konsilon de rabeno partopreni en la tradiciaj ritoj. Li protestas dirante, ke tio estus hipokrito, ĉar li ne kredas. Sed la rabeno demandas, kiel oni iĝas bona homo. Kompreneble per bonaj agoj, li mem respondas. Oni ne komencas esti bonulo, kaj poste faras bonajn agojn, sed inverse. Kiam oni jam tiel longe bonfaris, ke tio iĝis necedebla kutimo, tiam oni finfine estas bonulo.

Kio eble plej multe restis en mia memoro el la grupoj de Reinhard, tamen ne estis la dramoj el la ĉiutago, sed la pli evidente absurdaj situacioj. Multaj el tiuj estis ĝuste enscenigoj de sonĝoj. Tiel mi ekzemple iam ludis la rolon de nebulo en la sonĝo de viro, kies vivo vere ŝajnis enhavi sufiĉe multe da nebulaĵo. Alifojje mi estis la ĵus mortinta infano de iu sonĝantino, kuŝanta sur skribtablo en ŝia laborejo. Mi rolis ankaŭ kiel ondo,

kiu logis sonĝanton ĵeti sin en la ŝtorme pelatan maron.

Plej klare mi tamen memoras la kanton de baleno. Iu viro sonĝis, ke li devas prelegante klarigi al aŭskultantaro el surduloj, kiel baleno kantas. Li estis tre talenta kaj entuziasma preleganto, almenaŭ en sia propra sonĝo, sed eĉ lia vervo iom velkis antaŭ la tasko klarigi al surduloj la kanton de baleno. Eble superfluas diri, ke en nia psikodrama reprezentado de lia sonĝo, mi estis la baleno.

Nu, eĉ se preterlasi la amuzan flankon de ĉi tiuj dramoj, estas ja tute klare, ke multaj aferoj en mia vivo vere aperis kiel nepenetrebla nebulo, ke meze de mia panogajna laboro mi iam eksentis, ke mia infano – aŭ eble mia infaneco – tiel neglektiĝas, ke ĝi riskas forpasi, kaj ke nekonata, riska entrepreno fojfoje tiel logis min, ke mi deziris – sed neniam kuraĝis – ĵeti min kapantaŭe en danĝerajn situaciojn. Kaj kiomfoje mi jam sentis reale, ke la peno rakonti aŭ komprenigi ion al aliaj homoj tute vanas? Eĉ en ĉi tiu momento mi havas la senton, ke prezenti ĉi tiujn spertojn kaj memorojn al aliaj homoj same maleblas, kiel klarigi al surduloj la kanton de baleno.

– ... Kio nun? Ha, jes ja. La buso deflankiĝas por halti ĉe motelo. Dekminuta paŭzo por fumado kaj aliaj bezonoj. Rapida trinko kaj mal. Mi ne fumas kaj nenion volas aĉeti. Eble mi iomete promenu por rektigi la krurojn kaj enspiri iom da aero. Sed kie? Ĉi tie troviĝas nur enorma asfalta parkejo kaj la vojoj. Minimuma gazonstrio kun kelkaj kadukaj arbustoj. La pejzaĝo de Homo Aŭtomobilus. Transvoje kreskas hirta arbaro, sed mi ne emas iri tien. Mi anstataŭe rigardu la kafeterion. Efektive plaĉus al mi mendi glason da biero, sed mankas tempo por ĝui ĝin. Mi devus gluti ĝin per unu tiro. Aŭ ĉu mi tamen aĉetu kaj kunportu la doson? Tio certe kontraŭas iun leĝon pri vendado de alkoholo. Krome oni certe ne rajtas trinki bieron en la buso. Sed fek! Kio mi estas, ĉu sklavo? Nu ja, svedo mi estas, prave, tamen...

Jen, bonege! Oni ofertas danan bieron en boteloj. Perfekte. Unu tian, mi petas. Kaj poste kelkajn minutojn ĉe tablo apudfenestra. Nun la botelon enpoŝen kaj ek al la aŭtobuso denove. Jam temp' está!

Nu, vidu! Vojrande staras petveturanto. Meze de arbaro, meze de oktobro, meze de la suspektemo de aŭtomobilistoj. Kompatindulo. Efektive oni entute vidas malmulte da petveturantoj nuntempe, eĉ en hela somera tago. Kiam mi havis dudek, dudek kvin jarojn, ili svarmis ĉe la ŝoseoj urborande. Sed intertempe la ŝoseoj tro grandiĝis, la aŭtoj tro rapidiĝis, la gejunuloj tro dorlotiĝis kaj mi tro maljuniĝis.

Do, tiu junulo devos antaŭvidi nokton en la arbaro. Aŭ eble li restu en ĉi motelo, se li havas monon. Sed tiuokaze li ne petveturus. Nu, li faru laŭpove. Tio ne jukigas mian haŭton. Jen mi denove sur mia sidloko. Mi atendu ĝis la buso bone survojiĝos, poste mi povos ĝui mian Carlsberg.

Ha, jen! Bonege! Tion mi vere bezonis. La gorĝo sekis kiel

polva ŝoseo en somera tago. Hm. Kial do tiu virino strabas al mi kvazaŭ al... mi ne scias kia abomenaĵo? Ĉu ĝenas ŝin, ke mi trinkas bieron en la buso? Eble ŝi envias ĝin al mi. Nu, mi ne zorgas. Ja mi notis ŝian tranĉile akran rigardon, sed ĝi ne embarasas min. Kial diable mi zorgu pri ŝi? Mi petas nenion de ŝi, do ŝi bonvolu fajfi pri mi.

Fakte estas ia malekvilibro en mia sinteno al homoj. Eĉ se mi postulas nenion de iu alia persono, tamen mi ofte supozas, ke mi devas adaptiĝi al li. Aŭ al ŝi. Ŝajne ofte temas pri ŝi. Kial do? Ĉu vere indas daŭre komplezi iun, se mi ricevas nenion kompanse? Ne, kompreneble ne. Nu, tre longe mi eble ne kutimas fari tion. Se pripensi sincere, mia pacienco relative rapide elĉerpiĝas. Kaj kial ne? La vivo mallongas. Se iu pordo ne malfermiĝas je la unua frapeto, ĉu indas resti tie, frapante ĝis la Tago de Juĝo kaj Fina Venko? Ne. Prefere vagi pluen, serĉante alian pordon... –

8. Al viro farendas, kio farendas al viro

”Ĉu mi rajtas peti de vi unu aferon? Nur unu solan? Ne plu venu al mi kun viaj problemoj pri viroj! Ne verŝu tion sur min! Ĉu vi komprenas?”

”Sed ni ja disiĝis! Do tio ne povas embarasi vin! Ni ne plu estas paro!”

”Ĝuste tial! Mi neniam plu intencas enmiksiĝi en viajn amaventurojn. Ĉion alian vi povas diri al mi, kaj se mi povas helpi pri io, do en ordo. Sed tion ne! Ĉu vi komprenas min? Se ankoraŭ vi turnos vin al mi kun io tia, mi simple malkonektos.”

”Sed kial vi tiel ekscitiĝas? Troviĝas neniu kaŭzo por kriu! Ja estas finite inter ni! De nun vi krii al iu alia!”

”Kaj ekde nun vi diskutu amproblemojn kun iu alia! En ordo, ĉu?”

Mi remetis la aŭdilon kaj klopodis reveni al mia solula trankvilo, sed la spirita sereno rifuzis nesti en mi. La telefona interparolo ĉesis, sed mia malbona sento ne. Ĉu ŝi raportis al mi aŭ ne, la vero estis, ke ŝiaj rilatoj kun novaj viroj kaŭzis al mi inferan turmenton. Ne pro tio ke ili estus multaj aŭ sukcesaj. Fojfoje temis nur pri iu vorteto, kiu komprenigis al mi, ke ŝi serĉas, deziras, ĉasas. Tamen daŭris longe ĝis mi vere ekkonsciis, pri kio temas. Kaptis min la nuda, kruda ĵaluzo. Eble mi ne tuj agnoskis tion, ĉar mi estis tiu, kiu rompis nian rilaton, ne ŝi. Aŭ... eble pli ĝuste estus diri, ke mi estis tiu, kiu laŭte elparolis, ke nia rilato suferas pro malsato, sekiĝo, miskresko, mizera rikolto.

Fine mi devis agnoski al mi mem, ke jes, mi ankoraŭ amas ŝin. Tio kaŭzis senton de humiliĝo. Mi ne volis plu ami ŝin. Plej

bone estus, se mi post la disiĝo rigardus ŝin kun indiferenta bonvolo. Do, tion mi ŝajnis. Sed indiferenta bonvolo estis al mi la plej malproksima sento; anstataŭe mi sentis malamon – kaj amon. Ambaŭ samtempe.

La unua humiligo estis, ke ŝi ĉesis ami min, aŭ ĉiuokaze ĉesis montri al mi amon. La dua do estis ekkonscii, ke mi ne povis estingi mian amon per la disiĝo. Signifas humiligon esti tiu, kiu amas pli multe kaj pli longe.

Kelkajn jarojn pli frue mi sciis, ke jen finfine mi renkontis la virinon de mia vivo. Mi enamiĝis al ŝi dum ankoraŭ vegetis antaŭa rilato al alia ino, sed post kiam mi renkontis Kristinan, tiu iama amo forvaporigis senpure. Al Kristina mi enamiĝis pli intense ol iam antaŭe, almenaŭ laŭ mia memoro. Mi aranĝis renkontiĝojn hazardajn kaj intencajn. Mi konspiris por malhelpi, ke iu alia forŝtelu ŝin antaŭ mia nazo. Mi verkis al ŝi ampoemojn – kiujn ŝi eble neniam legis, sed la celo de ampoemo ja ankaŭ ne estas transdoni informojn sed simple montri aspiron. Mi sieĝis ŝin en ŝia luata ĉambro, kaj fine mi staris tie, matene, lavante la vazojn post komuna matenmanĝo. Poste mi ĉesis okupiĝi pri ampozio, ja tio ne plu necesis. Sekvis tagoj prozaj. Efektive mi tre rapide alkutimiĝis al la sento, ke ni apartenas unu al la alia. Eble ŝi neniam tre solene deklaris al mi sian amon, sed tion ankaŭ mi ne plu faradis. Ni ne bezonis deklari amon, ni praktikis ĝin. Ni havis ĝuste la plej konvenan ekvilibron de komunaj kaj malkomunaj ecoj, emoj, interesoj, kutimoj, spertoj.

Dum la unua jaro Kristina rakontis al mi multe el sia ĝistiam viva, el la infanaĝo, el la adoleskiĝo, el la tempo de juna plenkreskulo. Ŝi estis iom sola infano, malfrue evoluinta junulino, juna virino sen memfido kun kelkaj misaj amspertoj. Ŝi alkutimiĝis al tio, ke ŝi estas malbela. Al mi tio ŝajnis nekredbla. Malbela! Ŝi ja estis ege bela, dezirinda virino, rava, kun erotika allogo kaj societa ĉarmo, tre individueca. Senafekta, sincera, nekapabla pozi. Nur longe poste mi konstatis, ke ni eble

parolis preskaŭ nur pri ŝi, dum preskaŭ neniom pri mi. Tiam tio ne ĝenis min, mi eĉ ne notis tion. Ja mi ĉiam pensis pri ŝi, do ŝajnis al mi tute nature ĉiam paroli pri ŝi.



”Aaah... aaah... venu... pli... pli...”

”Mmh... mia... vi tiel... oohh...”

”Oj oj... ah... ah...”

”Nun... nun... mi jam... aah... ho ho... mmmh... oohh...”

”Ja... venu... jen...”

”Mmmh... ho, Karina... eeh, Kristina, Kristina... oho, kiel bone... vi tiel bonas...”

Kvankam – se esprimi tion milde – mi estis okupita pri alio, mi tamen notis mian eraron. En la plej intensa momento mi misnomis mian amatinon. Iom embarase, sendube. Tamen tio ne devus esti tiel granda katastrofo, ĉu? Facila eraro, laŭ mi, precipe en ekscita okazo. Kaj tiuj virinaj nomoj ja tiel similas unu la alian. Karina – Kristina. Nu, mi tamen rimarkis, ke mia misdiro ne pasis neaŭdite. Ŝi notis ĝin. Kristina aŭdis, ke mi en sekundo feliĉa malfeliĉe misnomis ŝin Karina. Ankoraŭ ŝi nenion diris, sed per sia korpa teniĝo kaj per sia spirado ŝi klare montris, ke ŝi perceptis mian langostumblon.

Do, dum mi babilis – iom pli multe kaj pli rapide ol kutime – pri kiel bone estis kun ŝi, kiom mi ĝuis kaj kiel multe plaĉas al mi kuŝi kun ŝi, mi samtempe atendis. Atendis ŝian reagon.

Kaj finfine ĝi venis.

”Diru, Peter, kiu estas Karina?”

Estas vere strange, ke kvankam mi do havis tempon prepari min al tiu atendata demando, ĝi tamen surprizis min, kaj mankis al mi preta respondo.

”Karina? Kiu Karina?”

”Tion demandas mi! Kiu estas Karina, al kiu vi vokis, kiam vi ekorgasmis?”

”Aha. Nu, pardonu min, tio estis misdiro. Mi fuŝdiris. Kompreneble mi volis diri vian nomon.”

”Sed vi diris alian nomon. Kiu ŝi estas?”

”Neniu... mi volis diri Kristina, ja mi jam klarigis tion.”

”Ĉu vi do konas neniun Karina?”

”Ne. Tio estas...”

”Tio estas? Ĉu vi konas aŭ ne?”

”Ne... ne plu. Mi ne plu konas.”

”Sed vi konis?”

”Nu, jes. Nature.”

”Do, kiu ŝi estas?”

”Ŝi estas... ŝi estis pli frua kunulino. Antaŭlonge. Tio ja estas nenio stranga, ĉu?”

”Mi esperas, ke ne. Sed kial vi vokas al ŝi?”

”Ja mi jam diris! Mi fuŝis. Mi volis diri Kristina! Ne estas tiel strange. Eblas misprononci, se oni ekscitiĝas.”

”Ĉu vi pensas pri ŝi dum vi estas kun mi?”

”Absolute ne! Neniam!”

”Kaj tamen pro fuŝo vi vokas ŝian nomon.”

Estas vere mirinde, kiom eblis knedi kaj reknedi tiel

bagatelan banalaĵon, kiel la okaza unufoja misdiro de virina nomo. Fine ŝi tamen lasis la temon. Tamen mi sentis, ke ŝi ne vere findigestis la kaĉon.

Por mi la misdiro estis same malgrava kiel konsterna. Efektive mi ne plu pensadis pri mia iama amatino Karina. Nia rilato estis morta kaj entombigita. Mi tute ne sopiris al ŝi. Male mi ege enamiĝis al Kristina. Se mia subkonscio sentis alie, mi povis nenion fari pri tio. Ĉu mi estas gardisto de mia subkonscio?

Eble tamen troviĝis natura klarigo de mia embaraso. Estis vere, ke mi ne pensis pri Karina, kuŝante kun Kristina. Tio tamen ne signifis, ke nur Kristina plene okupis mian menson. En la ekstazaj momentoj efektive aro da imagoj fulme projekciiĝis en mia interna kinejo. Inter tiuj estis ankaŭ iu pratempa imago, la nekonata virino en verda robo, staranta kontraŭ la suno ĉe Smolanda kradpordo. Eble tiu imago, la sennoma vilaĝanino, trenis kun si la nomon de Karina, kiu ja estis iel ligita al ĝi, kaj postlasis ĝin en mia cerbo, kie mi hazarde trovis ĝin kaj pro eraro lasis ĝin eskapi tra la buŝo. Nu, ĉu tiu teorio pravas aŭ ne, mi ĉiuokaze rezignis prezenti ĝin al Kristina. Mi suspektis, ke ĝi ne kontentigus ŝin.



”Kion mi faru ĉi tie? Vi scias, ke mi nun ne rajtas bani min!”

”La piedojn vi tamen rajtas bani, ĉu ne?”

”Ne necesas tiel longe remi por bani la piedojn.”

”Ja ne vi remas, sed mi. Cetere tio estas plezuro. Jen vidu! Sub tiu alno vi povas sidi en duonombro kun la kruroj ĝisfemure en la maro. Deprenu la jupon kaj la bluzon. Ĉi tiu venteto refreŝigos vin. Ankaŭ la humoro bonfartos ĉi tie.”

”Sub alno? Ĉu vi diris alno? Sur alnoj ja troviĝas iksodoj!”

”Tute ne. Mi ĵus legis, ke tio estas popola superstiĉo. Iksodoj vivas sur la herbo. Ili ne grimpas sur arbojn.”

”Vi legis, ĉu!? Nu, bone, do poste vi devos forpreni de mi ĉiujn iksodojn!”

”Volonte! Mi ekzamenos ĉiun angulon de vi kaj kaptos kaj mortigos ĉiujn fiulojn, kiuj kuraĝis suriri vin!”

”La sola fiulo kiu suriris min estas vi! Ne mirinde, ke mi tiom gravedas!”

”Ĉu tiom? Nu, mi jam frue konfesis, ke mi kulpas pri tio. Sed ĉu eblas gravedi pli aŭ malpli multe?”

”Ĉiukaze ne eblas pli multe ol ĉi tiom!”

Ŝi pravis. Ŝia maldika staturo restis pli-malpli senŝanĝa, nur kun aldono de enorma naŭmonata ventrego. Al iu alia persono ŝi eble aspektus bizara, sed al mi – aminda kaj priferinda. Ni ĝuis la lastan tempon de libereco ĉe la marbordo, kaj ĵus ni luis verdan remboaton el ligno, kiun mi remante direktis al ĉarma ŝero, nur kelkcent metrojn for de la elira punkto, boatvarfo de kampadejo.

Mi albordigis la boaton ĉe ŝtona strando, kaj ni surteriĝis. La boaton mi ŝovis iomete supren. Blovetis malforta vento el okcidento, kaj por ke la boato ne forfrotu sian verdan koloron kontraŭ la ŝtonoj, mi submetis la du remilojn kiel flankŝirmilojn.

Kristina sidiĝis sur konvenan lokon kaj vere ŝajnis kontentiĝi pri la plaŭdado de ondetoj kontraŭ ŝiaj nudaj kruroj. Mi enakviĝis kaj komencis ĉirkaŭnaĝi la ŝeron. Ĝi ne estis granda insulo, tamen laŭ la teoremo de Pitagoro, la periferio de ŝero... Ne, pardonu min! Li ja okupiĝis pri trianguloj! Kaj jen troviĝis nur mia amatino kaj mi, duope. Do, ĉu Arkimedo? Nu, negrave... Ĉirkaŭnaĝi la ŝeron ĉiukaze pli lacigis min, ol mi

antaŭe supozis. Feliĉe la saleta akvo de la Balta maro en ĉi tiu lasta semajno de julio estis nekutime varma, eble eĉ dekok-grada, do mi ne timis kramfon.

Plenuminte tri kvaronojn de la cirklo mi aŭdis fortegan bruon de motoro, kaj baldaŭ poste mi vidis el mia fiŝa perspektivo motorboaton kun furioza impeto trairi la mallarĝan pasejon inter nia ŝero kaj la apuda insulo. Mi ĝuste esperis, ke ĝi grundos sur iu rifo, kiam ĝia postondo atingis min, rearanĝis mian frizaĵon kaj donis al mi momenton da marmalsano. Nu, la avantaĝo de tiaj rapidaj monstroj estas, ke ili ankaŭ rapide malaperas. Sed apenaŭ mi kompletigis la rondiron, mi ekaŭdis kriojn de Kristina. Naĝante al la bordo mi rigardis al ŝia ripozejo, kaj ekvidis ŝin stari en la akvo kun levitaj brakoj, montrante maldekstren kaj ion vokante.

”La boato, la boato! Kaptu ĝin!”

La boato? Kiel kapti per nudaj manoj gigantan motorboaton jam malaperintan? Ĉu jam trafis ŝin sunfrapo?

Sed farante la unuajn paŝojn sur la ŝtona fundo, mi komprenis. Pri sunfrapo ne temis. Kiel tio eblus en plena ombro ĉe la Balta maro, nur paŝeton for de la Norda Poluso, kun vasta sunĉapelo surkape? La hoko en la ezoko estis, ke la postondo de la monstro levis nian remboaton kaj poste suĉis ĝin for de la bordaj ŝtonoj. Se mi ne venus ĝustatempe, ĝi sendube jam survojus al Litovio.

Se diri la veron, mi bezonus iom da ripozo ĉirkaŭnaĝinte la ŝeron. Sed mi supozis, ke Kristina ne montrus grandan komprenemon al tia bezono, do mi ĵetis min reen en la maron. La boato ne estis longe for, feliĉe, do estis facile atingi ĝin. Malpli facile estis el la akvo grimpi en la boaton, sed ankaŭ tio fine prosperis al mi, kvankam tio kostis jen kaj jen skrapitan haŭton. Nu, mi tamen faris nur mallongan viziton en la boato, ĉar, kiel jam diritas, la remiloj ne plu troviĝis en ĝi, sed sube, por

protekti ĝin kontraŭ la bordaj ŝtonoj. Tute nenecese en la nuna pozicio. Se precizigi, ili eĉ ne plu estis sub la boato, nek kredeble sur la strando. Do kie? Mi stariĝis – kvankam tio estas mortmerita peko en boato – por povi gvati al la ŝero, al la akvo kiu min ĉirkaŭis, al la horizonto. Unu remilon mi preskaŭ tuj ekvidis, ĝi floris duonvoje inter mi kaj la ŝero. La dua jam atingis pli longe, se ne ĝis Litovio, do almenaŭ proksimen al la apuda insulo.

La malbenita afero pri remiloj estas, ke ili valoras preskaŭ neniom, se dise. Nur kune, duope, pare, ili havas valoron. Kaj nun oni bonvolu ne altrudi en ĉi tiun rakonton ian edifan parabolon pri remiloj kaj homoj!

Bone do, kiel ajn agrable estis kviete balanciĝi surfunde de senremila verda remboato, mia prudento tamen revokis min al agoj. Same faris la vokoj iom post iom pli kaj pli malproksimaj de mia kunvivantino, la onta patrino de mia gefilo, kondiĉe ke mi retrovos la remilojn. Do, al viro farendas, kio farendas al viro. Mi enplonĝis.

Ne eblas ripeti kiomfoje mi klopodis alten levi la kapon elakve por trovi unue la remilon pli navigeman, kaj poste ĝian malpli vojaĝeman sed tre petole kaŝiĝeman parulon. Kiu dubas pri mia klopodo, tiu mem provu ekstarti el nura akvo por havi bonan ĉirkaŭvidon. Fine necesis renaĝi, jam kun flosa helpo de du verdaj, lignaj remiloj, al la boato, kiu kompare kun la remiloj estis facile videbla, sed malpli facile atingebla. Kaj tamen mi sukcesis. Mi plenumis la neblan taskon, kaj en triumfo mi poste remis, je internaj tonoj de la geedziĝa marŝo de Mendelssohn, kontraŭ mian inon sur la ŝero.

Sola embaraso estis, ke jam antaŭ ol atingi la ŝeron, malseka pro marakvo kaj ŝvito, haŭskrapita, ventblovita kaj konsumita pro la superhoma penado, mi aŭdis malantaŭ mia dorso la sonon de eta eksterpoba motoro ekiri de nia ŝero. Kiam mi turnis min por rigardi, mi vidis oranĝan plastboaton preteriri, stiratan de iu

viraĉo en banŝorto kaj ridinda kaskedo. Sur la antaŭa benketo de tiu fetora navigilo sidis bela petveturantino kun grandega ventro. Kion fari? Vere troviĝis neniŭ alternativo, krom remi plu. Do, dum Mendelssohn subite mutiĝis, mi siblis al mi mem ”sekvu tiun ventron”, kaj remis plu.



Ĉi tiu bebo estis vere glutema ulo. Ne sufiĉis al li la patrina lakto, sed elsuĉinte ĉion el ambaŭ mamoj, li tuj saltis de Panjo al Paĉjo, kiu ja povis oferti nur botelon, tamen manke de pliaj mamoj, eĉ tio devis taŭgi. Ne mirinde, ke post tiom da trinkado li ne tute bonfartis. Ion similan ankaŭ mi foje spertis. Resume, antaŭmanĝe li grumblis pro malsato, postmanĝe li kriis pro misdigesta koliko.

Venante hejmen de la laboro mi efektive preferus dum dek minutoj paŭzi kun taso da kafo por ŝanĝi ritmon kaj liberiĝi de la laboreja streĉo. Sed tion la kunvivantoj ne permesis. Kristina, elĉerpita post tago kun la kolikulo, tuj transĵetis lin en miajn brakojn, kaj la bebo tuj postulis distradon. Ja tempo difinita estas por ĉiu afero sub la suno, kiel jam la Biblio instruas nin. Se ne estis tempo por manĝi, do estis tempo por vindaŝanĝi, aŭ alie tempo por ripozi, kaj por ripozi necesis portado je akompano de gramofona gitarmuziko. Ne, ne... pianon ne, kantadon ne, violonon ne – gitaron, mi petas! Bone, tiel... en ordo, ĝis plue...

Estis longa malluma aŭtuno, senfina vico da tagoj, noktoj, matenoj, vesperoj, seninterrompa ĉeno el alternado pri tiu bebo. Manĝigado, dormigado, lavado, portado. Ĉio ĉi plenigis la horojn kaj anstataŭis la gean kunvivadon. Vespere Kristina enlitiĝis, dum mi ekiris en longa promeno tra nia malluma, preskaŭ dezerta urbo, puŝante la ĉaron kun la bebo. Foje, se li trankvile dormis, mi ŝteliris en iun kafejon por rapide gluti taseton da espresso, antaŭ ol mia filo komencis vekiĝi kaj ankaŭ

volis plenvoĉe ion mendi. Tiam mi rapidis eksteren kaj pluis vagadi. Mi paŝis laŭ la rivero, trans pontojn, sur stratoj kaj placoj, tra parkoj. Se estis nuba vespero, la urbaj lumoj reflektiĝis de la nuba ĉielo kaj disverŝis difuzan lumon sur nin. Sed se estis klara vetero, irante tra la parko mi vidis apenaŭ ion ajn, krom supre kelkajn stelojn, kaj foje la lunon, se hazarde estis en la tempo antaŭ plenluno.

Revenante malfruege en la apartamenton mi kutime lasis lin dormi plu en sia ĉaro. Porti lin en la liton signifus nur, ke li vekigis kriante. Do, mi nur ege delikate deprenis kelkajn liajn vestaĵojn, kaj poste mem enlitiĝis. Kiam li venontfoje vekigis, nokte, malsata kaj malkontenta, estos la vico de lia patrino. Mi faris mian vaĉon en la alternado. Ĝis matene, etulo!

Dum tiuj longaj promenoj mi demandadis min, kiel povis okazi tiel, ke ĉi tiu etulo, nia komuna filo, anstataŭ ligo inter ni iĝis disiganto. Ja mi sentis preskaŭ timige fortan ligon al li, klinante min super la ĉareton kaj sentante lian facilan spiradon. Kaj mi devis supozi, ke lia patrino sentas saman aŭ eĉ pli intiman ligon al li. Kial do povis esti, ke la ligo inter ŝi kaj mi ne fortiĝis, sed male ŝajnis ŝiriĝi kaj eble tute disiĝos?



”Peter! Atentu, ke la okuloj ne elfalu!”

”Kion?”

”Ĉesu gapaĉi al tiu knabino!”

”Hmm. Mi ne gapaĉas. Mi nur ĵetis al ŝi rigardeton. Fakte, ŝi plaĉas al mi. Beleta, laŭ mia opinio.”

”Kion vi do volas kun ŝi? Ŝi estas apenaŭ dekokjara!”

”Nur rigardi. Ĉu permesite?”

”Ja ŝi ne portas mamzonon sub tiu maldika bluzo! Vi igas min honti!”

”Nu, hazarde ankaŭ mi notis tion... Sed kial honti? Vidu, ankaŭ vi ne bezonus, kiam vi ne plu mamnutras...”

”Ne palpaĉu!”

”Do, kion fari? Mi ne rajtas karesi vin, nek rigardi knabinojn. Kio plu restas? Ĉu ĵeti panerojn al la paseroj?”

”Ĉi tie ja estas amaso da homoj, kiuj ĉion vidas!”

”Nu, ĉefe plenkreskuloj, ŝajnas al mi. Sendube ili jam scias, de kie venas la beboj, kaj kie ili manĝas. Eĉ tiu knabino sendube jam plurfoje disigis la krurojn...”

”Silentu do! Ja vi estas malsana!”

”Ne, tion mi vere ne kredas. Nur iomete abstina.”

”Abstina? Kion tio signifas? Prefere diru obstina.”

Mi rigardis Kristinan trans la ĝarden-kafeja tablo. Kelkajn metrojn fore en sia ĉaro nia filo okupiĝis pri panbulko. Aro da dompaseroj avide ĉirkaŭis lin, esperante ricevi tagmanĝon, sed li ankoraŭ ne atingis la aĝon, kiam oni nutras birdojn. Li tamen maĉante rigardis la birdetojn kun granda intereso kaj fingromontris al ili dirante ”bi-bi! bi-bi!” Tio supozeble signifis samtempe ”birdo” kaj ”pepi” kaj eble ”jen vidu!” Baldaŭ eble tiuj *bi-bioj* ŝtelos de li la tutan bulkon, sed ankoraŭ regis provizora idilio.

”Mi ne komprenas, ke vi tiel prudiĝis”, mi diris al lia patrino. ”Komence vi vere estis tute alia.”

”Komence? Mi ne scias, kiam tio estis”, ŝi iom nebule respondis. ”Mi nur ne ŝatas, ke vi hontigas min.”

”Hontigas?”

”Jes! Inter fremduloj kaj tiu knabino, kiun vi daŭre

okulumas, kaj la knabeto. Vi embarasas min!”

”Ĉu ankaŭ hejme, dum ni estas solaj, mi hontigas vin?”

”Mi ne povas ĉiam esti je via servo! Ne eblas ĉion forti!”

”Je mia servo? Sed mi eĉ ne plu rajtas servi *vin!*”

”Ne eblas, se oni ne emas! Estas tiom da aliaj aferoj. La kapo plenas, mi ne povas pensi pri tiaĵoj!”

Vere mi ne intencis, ke nia interparolo en la printempa ĝardena kafejo englitu en tiun saman sulkon, kie jam finiĝis tiom da diskutoj. Cetere, kion mi faris? Mi eĉ nenion diris, nur ĵetis rigardon flanken, al tablo kie hazarde iu knabino ĝuis sian kolaon klaĉante kun amikino.

Eta plorkrio ekis el alidirekte, pruvante, ke mia antaŭa aŭguro pri la paseroj estis prava. Nun jam du el ili interbatalis pri duona bulko, dum la knabeto kun malplenaj manoj mienis ofendite. Jam antaŭ ol mi havis tempon turni mian kapon for de la dekokjarulino al la unujarulo, lia patrino survojis tien por leonine defendi sian idon kontraŭ la atenco de paseroj.



La amo-terapiistino – pardonu, la familia konsilistino – transdonis fotokopiitan paperon kun teksto, rigardante nin super siaj verdkadraj okulvitroj. Ŝajne estis ia listo.

”Jen la programo, kiun mi invitas vin sekvi. Ĝi estas tre ŝatata, kaj kutime tre efika. Ĝi devenas el Usono”, ŝi diris, kvazaŭ tio pruvus ĝian magian potencon.

Mi klopodis legi, sed ŝi preferis mem reciti ĉiun punkton.

”Unue dum du semajnoj vi havu neniun seksan interrilaton”, ŝi komencis.

Dum kelkaj sekundoj mi duone sufokiĝis misglutinte salivon pro konsterniĝo. Poste mi kornike grakis por rekapti la voĉon, kaj fine sukcesis duonvoĉe murmuri:

”Du semajnoj? Ĉu novaĵo?”

Kristina sendis al mi mortigan rigardon.

”Poste sekvos du semajnoj, kiam vi rajtas tuŝi unu la alian permane ĉie, krom ĉe la korpopartoj vicigitaj sub punkto 2”, pluis la konsilado. ”Kaj kompreneble, daŭre neniu koito.”

Mi rigardis ŝin nekredeme, kaj poste mian kunvivantinon, se tiu vorto ankoraŭ ion signifis. Ŝi nur mute gapis kaj glutis.

”Punkto tri”, daŭrigis la terapiistino. ”Tiam vi rajtas ĉion tuŝi permane, kaj ankaŭ masturbi unu la alian, tamen ne per...”

”Pardonu”, mi interrompis. ”Sub la dua punkto, oni do *rajtas* tuŝi, ni diru, eeh, ekzemple... la...” – mi serĉis en la listo, kaj ne vidis: – ”la ŝultron, la ventron, la dorson, la koksojn... Ĉu prave?”

”Jes, vi ĝuste kaptis la ideon”, bonvole konfirmis la istino.

”Sed... kion do signifas ‘rajtas’?” mi umis.

”Rajtas? Ke tio estas permesita”, iom konsternite respondis ŝi.

”Jes, bone, do la programo permesas tion”, mi pluis. ”Sed imagu, ke... ni diru, ke unu el la duopo ne permesas tion, do, se ekzemple unu el ili mane palpas la... ni diru... la nukon... de la alia, kaj ŝi... tio estas... li aŭ ŝi – ne permesas tion...”

Kristina suspiris aŭdeble kaj mienis kvazaŭ krevonte. Sed la familia konsilistino rigardis min kiel la patrino de petola bubeto bezonanta mildan korektadon, kaj ŝi diris:

”La bazo de ĉiu geedza kunvivado kompreneble devas esti reciproka respekto inter la duopo. Oni volas fari ion, se ankaŭ la

kunulo tion volas, ĉu ne? Alie ja temus pri trudo, devigo! Se via edzino ion ne volas, neniŭ papero povas rajtigi al vi fari ion kontraŭ ŝia volo. Ĉu ni komprenas unu la alian?”

”Jes, sendube”, mi elbuŝigis hipokrite, kvankam mi pli vere volis diri: ”Por kio do utilas tiu paperaĉo?”

”Do, ĉu mi daŭrigu?”

”Bonvolu, tamen mi timas, ke ĉi tiu programo estas iom tro aŭdaca en nia kazo.”

”Aŭdaca?”

”Jes. Se mi ĝuste komprenas ĝin, la baza ideo estas vekaj eksciton per limigoj. Sed en nia kazo tiuj ne estus limigoj, sed... vastigoj!”

”Mi tamen povas certigi al vi, ke ĉi tiu programo estis granda helpo por multaj geedzoj, kies sekso vivo sekiĝis aŭ tute ĉesis! Kial ne oferi al ĝi momenton?”

Nun Kristina ĵetis sin en la diskuton:

”Eble estus bone, se vi esceptokaze provus aŭskulti, anstataŭ ĉiam trudi vian opinion al aliaj!” ŝi diris al mi.

Trudi? Ja mi nur volis kompreni, kion celas la papero! Sed ŝajne neniŭ el la du virinoj vidis la abismon inter tiu listo kaj nia ĉiutaga gepraktiko. Do, mi rezignis:

”Bone, do. Daŭrigu, mi petas.”

Kaj ŝi pluis. Se mi ĝuste komprenis la aferon, post ses semajnoj ni jam rajtos uzi la buŝojn, post ok ni rajtos – jes ja, daŭre *rajtos*, do neniel *devos* – koiti, tamen ne per tiuj pozoj, kiujn ni pli frue praktikis. Dorsflanke troviĝis kelkaj skemaj desegnoj pri alternativaj pozoj. Kelkaj el ili ŝajnis tiaj, ke se oni malgraŭ ĉio sukcesus eniĝi, oni restus tie ĝismorte.

La lastajn punktojn de la listo mi ne atentis, ĉar mi tro

enprofundiĝis en tiujn strangajn pozojn. Mi memoris kelkajn vere kuriozajn provojn kun Nadja, ekzemple surdorse kun ŝi supre, kap-al-piede, aŭ ĉu estis inverse? Kaj tiu iama arba grimrado kun Karina! Nu, finfine, kio malbona estas pri la klasika, komforta dudorsa besto, alinome la misiista enen-elen?

Mi vekigis el tiuj konsideroj, kiam la konsulta horo jam pasis, kaj estis tempo hejmeniri. Hejme, ni enarkivigis la fotokopion kun la bela programo, kaj poste mi neniam plu revidis ĝin. Sed kiam mi volis nuligi la sekvan viziton ĉe la terapiistino, Kristina protestis:

”Kial nuligi? Ĉu nur pro tio, ke ŝi ne konsentis kun vi?”

”Konsentis? Kiel konsentis? Tutsimple ŝajnas al mi senutile reiri tien. Kaj kiel do vi intencas raporti pri la programo? Ĉu ni plenumis ĝin?”

”Kompreneble ni plenumis ĝin!”

Ja ŝi pravis. Pasis la du unuaj semajnoj, dum kiuj ni rajtis havi nenan seksan interrilaton. Efektive ni obeis tiun malpermeson.

”Mi scias, kial vi ne volas reiri tien.”

”Ĉu?”

”Estas pro tio, ke mi ricevis tiel bonan subtenon de ŝi.”

”Ĉu?”

”Evidente vi eĉ ne povas nei tion. Bone, se *vi* ne iros, do ĉiuokaze *mi* iros!”

Kaj tiel okazis. Kristina sola revizitis la amo-terapiistinon, dum mi vizitis bierejon kun mia filo. Tiel ni krome ne bezonis okazan vartistinon. Do, ĉiuj estis kontentaj, almenaŭ porokaze. La istino ricevis sian honorarion, Kristina sian subtenon, mi mian bieron kaj mia knabeto grandan porcion da glaciaĵo.

– ... Kioma horo estas? Dek post la oka. Nu, finfine mi alproksimiĝas. Restas kvaronhoro. Poste mi prenos miajn aĵojn kaj promenos unue laŭ la ĉefstrato, kaj poste plu supren laŭ la deklivo. La ĉefstrato estas tiu kun stratlampoj. La lastan parton de la vojo necesas pli-malpli palpi por trovi la ĝustan vojon. En ĉi tiu sezono regas deprimiga mallumo ĉi-norde. Nu, rekompence la frusomeraj noktoj estas vere tre mirindaj. Pala, kvieta krepusketo, nur. Sed nun la suno ne dorlotas la loĝantojn de ĉi tiu latitudo.

La unuajn fojojn Marja renkontis min ĉe la haltejo, kaj ni iris kune al ŝia dometo. Tio estis tre agrabla. Sed nun tio ja ne necesas. Fakte mi ne rifuzus, se ŝi hazarde proponus ankoraŭ fari tion. Tamen mi ne petis ŝin. Ja ne plu estas bezonate. Mi jam bonege konas la vojon, eĉ nenion vidante. Ne eblas misvagi – tiom da vojoj ne troviĝas tie. La sola afero memorenda estas ne turni sin dekstren tuj post la eksa poŝtoŝticejo. Tiu vojeto kondukas supren al iu iama minejo. Mi pluiru ankoraŭ cent metrojn, kaj tie deflankiĝu. Laŭ tiu vojo mi preterpasos du dometojn, kaj la tria estas ŝia.

La unuan fojon, kiam mi paŝis tie apud ŝi, mi havis papiliojn enstomake kiel adoleskulo. Sed poste ĉio boniĝis. La sekvajn fojojn ĉio ŝajnis tiel ekscita. Mi sentis min kiel infano en Kristnaska vespero. Ankaŭ poste, kiam mi marŝis sola laŭ tiu vojo, sciante ke ŝi atendas min en sia hejmo, ĉirkaŭita de siaj katoj, mi estis feliĉa. Feliĉa? Ĉu mi vere tiam spertis feliĉon, aŭ ĉu nur nun, poste, ŝajnas tiel? Strange! Kiam mi pensas pri diversaj periodoj de mia vivo, mi foje sentas ke tiam mi estis feliĉa. Aŭ eble, ke tiam mi devintus esti feliĉa. Sed mi memoras sufiĉe bone, ke tian senton mi ne havis dum la koncerna periodo. "Tian senton". Kia sento do estas la feliĉo? Ĉu eblas difini, priskribi ĝin? Eble iu povas tion fari, sed mi ne.

Kial ŝajnas al mi, ke la unuaj monatoj kun ŝi estis pli bonaj

ol nun? Eble ĉar ili estis novaĵo. Temis pri ŝanĝo en mia vivo. Nun miaj vizitoj jam rutiniĝis. Nenio plu ŝanĝiĝas. La agoj de amo fiksiĝis, rigidiĝis kiel ritaro. Nu, eble mi troigas. Eble temas ĉefe pri mia timo, ke tio okazos. Ja oni multe ŝercas pri tiu temo, la bezono de vario. Alporti florbukedon al la edzino. Provi novan amorpozon. Ŝanĝi la tapetojn aŭ ekhavi amatinon. Tamen ŝajnus iom ridinde, se ĝuste mi suferus de tiu ŝanĝemo. En la amaferoj de mia vivo konstanteco, rutino kaj ritaro neniam havis ŝancon enŝteliĝi. Neniam havis tempon. Aŭ ĉu tamen? Eble ne temas pri kiom da jaroj? Sed kion mi do ŝanĝu? Ja ŝajnus idiote alporti florbukedon al Marja. Cetere ĝi velkus dum ĉi damnita busveturo. Kaj kiun amorpozon mi proponu al ŝi? Aĉ! Stultaĵo! Mi jam tro maljunas por gimnastado.

Se mi vere provus ion novan, mi scius kion proponi. Jes, nun mi scias. Mi devus peti ŝin forlasi tiun dometon en la arbaro por veni al mi inter la betonon. Tio signifus ŝanĝon! Sed mi ne kuraĝas tion proponi. Ŝi simple forĵetus min. Kiom mi valoras, kompare kun la libera perspektivo, la freŝa aero, la horizonto dentita de picekovrita montodorso? Cetere, tio tute ne eblas. Ŝi ne povus transloĝiĝi. La katoj ne permesus tion al ŝi... –

9. Ruĝaj tagoj

”Kiom diable longe ankoraŭ restas ĝis tiu loko?”

”Mi ne scias precize. Ne tre longe, mi pensas.”

”Ĉu ni ne povas pikniki kie ajn?”

”Kredeble ni vidos ĝin, kiam ni atingos la altaĵon tie for.”

”Ni devus jam paŭzi ĉe tiu rivereto, kiun ni transvadis. Kiu diabla altaĵo? Mi baldaŭ fajfos pri tiu fojnejo!”

”Somera bieno.”

”Mi povus jam anticipi sciigi al vi, kion ni vidos de tiu altaĵo. La sekvan altaĵon!”

”Atendu. Ŝajnas, ke mi nun rekonas. Baldaŭ ni alvenos!”

”Kaj piceojn. Diablan amason da piceoj.”

Per tiu aŭguro mi riskis tre malmulte. Oni povus antaŭdiri vidaĵon de piceoj preskaŭ ĉie ajn en mia lando, kaj la pado, laŭ kiu Marja kondukis min, ne estis escepto.

Ŝi plupaŝis senvorte dum kelka tempo, kaj poste diris:

”Nun mi rememoras. Kiam ni venos al tiu kurbiĝo tie for, videblos la domo.”

”Tion mi jam kelkfoje aŭdis. Kion vi rekonas? La piceojn?”

”Estas io pri la lumo. Ŝajnas pli-malpli, kvazaŭ heliĝus tie antaŭe. Strange, tamen, ke eblas memori... ja pasis preskaŭ jardeko... kaj tiam estis neĝo... preskaŭ metro da neĝo.”

”Laŭ mi de ĉi tie povas esti mejloj ĝis la plej proksima domo. Ĉu vi certas, ke temas pri ĉi tiu pado?”

”Mi *sentas*, ke estas la ĝusta loko.”

Jen tipa respondo de Marja. Mi pli kaj pli dubis pri la prudento akompani ŝin en ĉi tiu ekskurso.

”Kun kiu vi venis ĉi tien? Ja vi ne estis sola?”

”Kun amikoj. Neniu, kiun vi konas.”

”Ĉu iu ulo?”

”Kaj kaj.”

”Kiel kaj-kaj? Kion tio signifas? Ĉu li estis kaj-kaj?”

”Kaj uloj kaj inoj, kompreneble.”

”Do, ĉu estis iu *specifa* ulo?”

”Mi povus ĵuri, ke jen oni vidu ĝin... tamen mi pensas, ke estas ĉi tie, kvankam la piceoj kaŝas...”

Ŝajnis al mi, ke ŝi iel evitas iujn temojn. Mi provis ironion:

”Ĉu vere. La piceoj kaŝas.”

”...aŭ ĝi simple kolapsis. Ĝi estis sufiĉe kaduka. La tegmento pendis kiel hamako. Oni apenaŭ povis eniri.”

”Kion do vi devis fari ene?”

”Estis malvarmege eksterdome. Certe tridek gradojn. Efektive estis same malvarme endome, sed tie estis malpli da vento.”

”Kion do vi faris endome? Vi kaj tiu kaj-kaj?”

”Jen ŝajne mi vidas ĝin! Rigardu tie inter la piceo kaj la betuloj!”

”Pli da piceoj.”

”Ne... jen! Ĉu vi ne vidas ion grizan?”

”Do pro tio ni marŝis mejlojn? Hej... Kien vi?”

”Venu! Nun mi scias, kial ni ne vidis ĝin! La skispuro

sendube iris malsupre sur la marĉo, kaj plue supren al la somerbieno de dekstre... Jen ni povas iri ŝparvojon!”

”Dankon, mi preferas la padon.”

Nun Marja vere malaperis inter kelkajn betulojn, kaj kiam mi denove retrovis ŝin, ŝi staris montrante al tre kaduka domaĉo el grizaj arbotrunkoj.

”Jen vidu! La tegmento tute enfalis! Apenaŭ eblas eniri...”

”Ĉu mi nun rajtas sidiĝi? Ĉi tiu promeno jam sufiĉas al mi.”

”Venu! Ni sidiĝu kontraŭ tiu muro!”

”Ĉu indas? Eble ankaŭ tiu kolapsos...”

”Ĉi tia trunko-muro ja povas stari dum jarcentoj!”

”Jes, ĝuste tion ĝi ŝajne jam faris. Kafon, mi petas!”

Ŝi eligis termoson el sia dorsosako kaj transdonis ĝin kun rideto.

”Jen.”

”Finfine. Ĉi tion mi bezonas jam de horo.”

”Ĉu ne estas bele ĉi tie?”

”En ordo. Estas agrable en la sunlumo. Jen por vi – fromaĝo kaj tomatoj. Fritita ovo por mi... Kion vi faras?”

Denove ŝi salte stariĝis kaj iris ĝis iu senvitra fenestreto.

”Mi nur rigardas enen.”

”Ĉu tie ene vi varmigis vin?”

”Mhmmm.”

”Surplanke, ĉu? Aŭ ĉu estis mebloj? Kuŝbenko de melkistino, eble.”

”Estis *enorme* malvarme. La fingroj rigidis kiel pendglacioj.

Ni provis manĝi el la kunportitaj sandviĉoj, sed oni povis apenaŭ teni ilin. Ni devis varmigi la manojn...”

”Tre ĉarme. Do vi sidis tie man-en-mane.”

”Ne precize.”

”Do kion vi faris?”

”La sola eblo varmigi la manojn estis enŝovi ilin sub la ĉemizojn...”

”Sub la ĉemizojn? Kiel sub la ĉemizojn? Aha, unu de la alia, ĉu?”

”Mhmmm.”

La bona humoro, kiun la kafo ekdonis al mi, jam komencis denove malaperi. Mi komentis:

”Nu, kia malbonŝanco. Ke estis tia frosto. ‘Sola eblo’, ĉu? Mi vetas, ke li eĉ devis varmigi siajn manojn sub via mamzono.”

”Ĉesu, Peter! Nun sufiĉas!”

”Se tiutempe vi entute bezonis mamzono.”

”Kiel infaneca vi estas! Tio okazis antaŭ ok jaroj kaj duono!”

”‘Kaj duono’! Kia memorkapablo! Ĉu vi certas, ke vi ne devis varmigi la manojn subkalsone?”

”Lasu tion, stultulo!”



Mi ekkonis Marjan dum Sahara aŭtopaneo. Sed kiam ĝi okazis, mi jam de kelkaj tagoj portadis ŝiajn valizojn. La tuto komenciĝis iun grizan novembran tagon en flughavena atendovico.

”Pardonu min, sed ĉu tio estas via tuta pakaĵo?”

Mi turnis min kaj surprizite rigardis. Demandis virino en mia aĝo, malalta, blonda, kun moderna, sendependema aspekto.

”Jes, ĉu ne sufiĉas?” mi respondis kun rideto.

”Certe. Mi nur volas demandi, ĉu vi eble povus pesigi la pakaĵon kune kun ni.”

Mi rigardis pli zorge. Apud la malaltulino staris alia virino, kaj malantaŭ ili du ĉaretoj plenplenaj de valizoj. Por unusemajna restado ĉe Mediteraneo tio ŝajnis al mi iom troa.

”Ĉu vi intencas tie ekloĝi?” mi spritis.

”Ĉi-foje ne. Mi jam vivis kelkajn jarojn en Tunizio. Ĉi tio estas nur iom da uzitaj vestoj, kiujn ni disdonos al amikoj.”

Mia spritaĵo do rapide malspritiĝis. Sed mi daŭre miris. La aspekto de ĉi tiuj virinoj ŝajne modernaj ne kongruis kun ideo pri Eŭropaj sinjorinoj, kiuj filantropie disdonadas vestaĵojn al duonnudaj indiĝenoj en Afriko. Tamen mi ne vidis kaŭzon rifuzi la peton, do ni kune pesigis niajn pakaĵojn, kaj dank’ al mia valizeto Agneta kaj Marja evitis krompagi pro troa pezo. Pro tiu komuna registriĝo, ni ricevis apudajn sidlokojn en la aviadilo, kaj dumfluge mi ekkonis ilian vojaĝplanon. Agneta iam dum kelkaj jaroj laboris kiel turista ĉiĉerono de Skandinavaj sunadorantoj en Sousse, kie ŝi edziniĝis al tuniziano kaj naskis filinon, por poste reveni al Svedio kaj divorci. Nun ŝi kaj ŝia amikino Marja diversloke vizitos familiojn, el kiuj kelkaj estas malriĉuloj, kiuj povos utiligi uzitajn vestaĵojn donacitajn de pli sataj svedoj.

Mi do helpis ilin porti la valizojn alvenante en Sousse, kaj je ilia afabla peto mi plu helpis portadi ilin dum vojaĝo tra Tuniziaj vilaĝoj. Kiam la pliparto de la vestaĵoj jam estis distribuitaj, ni troviĝis en oazo, proksime al la Alĝeria limo. Ni decidis unutage vere ferii en nia libertempo kaj luis aŭteton por veturi tra

anguleto de Saharo al kelkaj vidindaj montaraj vilaĝoj.

Tio fariĝis vojaĝo, kiun mi preferus memori ol sperti. Meze de la dezerto ni haltis ĉe akvokavo por fotografi aron da dromedaroj kaj ilian paŝtiston. Post tio la startigilo de la aŭteto mortis. Feliĉe ni trovis apudan dekliveton, kie ni povis puŝe startigi la motoron, kaj ekde tiam ni zorgis ĉiam parki sur deklivoj. Sed reveturante el la dua vilaĝo, iu ŝtono de sube trafis la aŭton, kaj la transmisio difektiĝis. Eblis ŝalti nenium rapidumon.

Do, jen ni staris, apud la vilaĝo Chebika ĉe la limo inter montaro kaj dezerto, sen aŭto, sen ĉio. Eĉ kamelon ni ne havis. Piede ni paŝis al la vilaĝa policejo, kie oni bonvenigis nin tre gastame, sed nenion povis fari pri la aŭtopaneo. Poste ni sidis. Oni alportis seĝojn el la policejo, kaj starigis tiujn sur la sablon. Ni ne laciĝis demandi pri diversaj manieroj solvi nian problemon. La policistoj respondis tre ĝentile kaj bonvole, sed ĉiu ideo pri solvo ŝajnis kvazaŭ dezerta miraĝo. Se oni proksimiĝis al ĝi, oni vidis ĝin dissolviĝi aŭ malaperi foren. Forĝisto loĝas en la vilaĝo, li povos helpi. Bedaŭrinde li estas for laborante en Francio, sed eble revenos printempe. Aŭtobuso iradas de la vilaĝo. Sed kiam? Neniu scias. Kien ĝi iras? Necerte. Kie la haltejo? Ie aliloke, kredeble. Oni povus telefoni por akiri helpon. Sed kien? Neniu scias. Cetere, la telefonlinio malofte funkcias. Iu vilaĝano posedas aŭton. Bedaŭrinde mankas al ĝi benzino, kaj tiu aĉetebblas nur kelkdek kilometrojn for, alie oni ja povus uzi ĝin. Ni proponis ĉerpi benzinon el nia luita aŭteto. Sed ne, tion oni tamen ne rajtas, ĉu? Cetere, la aŭto de la vilaĝano ne sufiĉe fortas por veturi sur la tradezerta radsulko.

Vespere ni tranoktis surplanke en la policejo. Matene rekomenciĝis la atendado. Kiam ni denove demandis pri la eventuala aŭtobuso, ni eksciis, ke ĝi kredeble jam foriris. Morgaŭ eble iros alia.

En ĉi tiu ekskurso mi ekkonis Marjan. Kio plej impresis al

mi, estis ŝia trankvilo kaj bona humoro en la prema situacio.

”Mi ŝatas la ritmon”, ŝi diris, sidante en la polvo ekster la vilaĝa policejo. ”Ĝi memorigas al mi la infanaĝon.”

Ŝi rakontis, ke ŝi naskiĝis kaj kreskis en vilaĝo de la plej norda Finnlando, kaj poste migris suden laŭ pluraj etapoj, ĝis ŝi fine venis en Svedion. Ŝi estis teksistino, sed perlaboris ĉefe flegante maljunulojn. Dum ni atendis ekster la policejo de Chebika, ŝi eĉ trovis kaj vizitis iun simplan laborejon, kie oni edukis kaj laborigis knabinojn pri teksado. Ŝi revenis kun eta lana teksaĵo, kiun ŝi ricevis interŝanĝe, promesinte sendi tien unu el siaj propraj.

Kiom ni promenadis tra tiu malriĉa vilaĝeto! Plejparte promenis Marja kaj mi, dum Agneta klopodis trovi eblajn eskapovojojn. Ni laŭiris la stratetojn, kie ĉio havis la saman flavbrunan koloron, tero, stratoj, domaj muroj, tegmentoj. Ankaŭ ekster la vilaĝo ni iradis, sur same flavbruna grundo, kie aroj da kaproj serĉadis ŝajne neekzistantajn herberojn aŭ ion ajn alian manĝeblan. Kaj ni interparolis. Pri kio? Pri ĉio, kion ni vidis, pri homoj, domoj, bestoj, kaj pri ĉio, kion tiuj aferoj pensigis al ni. Ŝi parolis pri sia infanaĝo en la kamparo de Finnlanda Laponio, mi pri Svedia Smolando. Kie ŝi flaris similecon, mi vidis nur la malon. Kiam ŝi sentis sin iel kvazaŭ hejme, mi estis tute perdita en fremda mondo. Sed malgraŭ tiuj malsamaj konceptoj, aŭ ĉu eble ĝuste pro ili, ni povis interparoli senĝene pri niaj pensoj kaj atendoj. Preskaŭ nur pri konkretaĵoj, tamen. Ne temis pri ia reciproka penetraĵo en spiritaj profundoj. Tamen ŝajnis al mi, ke ankaŭ tiuj konkretaj ĉiutagaĵoj portas sian magion, sian signifon al la homa pensado kaj sentado.

”Tiu azenaĉo memorigas al mi maljunan ĉevalon de iu najbaro, kiu dum jardekoj trenis trunkojn arbore en mia infanaĝo”, ŝi foje diris. ”La samaj okuloj, kiuj ŝajnas disradii rezignacion. Tamen ĉevalo kaj azeno alie ne estas tre similaj laŭ temperamento, mi pensas.”

Kaj mi reciprokis:

”Mi verŝajne neniam vidis iun beston, kiu devas tiel penadi. La ĉevalo de mia avo vivis en lukso kaj komforto, kompare. Kaj laŭ mi la rigardo de besto esprimas nenion, kion homo povas kundividi kun ĝi. Se tiel ŝajnas, kredeble tio estas nura speguliĝo de iu homa sento.”

Ŝi kontemplis tion dum kelka tempo antaŭ ol responde demandi:

”Ĉu vi iam vidis la rigardon de batita hundo? Mi jes. Kaj ĉi tie ŝajne ĉiu hundo havas tiun esprimon. Kvazaŭ neniu fido plu ekzistus. Kvazaŭ la homoj ne plu meritis rilati al hundoj.”

”Tion doktoro Freud sendube nomus projekcio de la homa kulposento”, mi provis spriti.

Marja ridetis dirante:

”Nu, Freud sendube sciis kaj komprenis multon. Tamen, eble batita hundo scias ion pri homoj, kion la doktoro neniam spertis.”

Kaj ni pluis promeni atendante, ke io okazu.

Fine ni tamen eskapis el ĉi tiu sencela atendado. Ni sukcesis lui kamioneton, kiu alvenis por liveri panon de bakejo apudvilaĝa. Ni irigis ĝin reen tra la dezerto, sidante en sablonubo sur ĝia ŝarĝotabulo. Poste restis la iom tikla tasko klarigi en la aŭtoluejo, kial ni revenas sen la aŭteto.

En nokta buso reen al la Mediteranea marbordo, Marja kaj mi interkonsentis renkontiĝi denove reveninte hejmen. Ekde tiam mi do komencis faradi la busajn vojaĝojn. De temp’ al tempo, kiam ŝi sukcesis persvadi iun najbaron varti ŝiajn kvar katojn, ŝi ankaŭ vizitis min. Ŝi tamen kutime insistis, ke la urba ritmo ronĝas ŝiajn nervojn, kvankam mi ne komprenis, kie ŝi trovas tiun ritmon. Mi ne perceptis ĝin.



”Mi ofte pensas, ke la amo venas ne kiel fulmo, nek kiel Kristnaska donaco”, diris Marja. ”Ĝin oni devas fari, krei, verki. Amo estas kiel teksaĵo. Unue necesas varpi, por havi bazon. Tio povas esti iom teda, sed dume oni ĝojas imagante la venontan teksadon. Due oni elektas kian vefton uzi por ĉi tiu teksaĵo. Nur post tio oni komencas enteksi la vefton inter la varperojn, kaj eĉ tiam daŭras longe, ĝis la teksaĵo kreskis tiom, ke eblas prijuĝi ĝin.”

Eble mi montris iel malkontentan mienon, ĉar ŝi komparis la amon kun sia propra metio, pri kiu mi laikas. Ŝi rigardis min explore, kaj poste pluis:

”Sendube oni povus tute same diri, ke konstrui la amon similas verki romanon. Mi supozas, ke oni tiam devas unue starigi ian strukturon, ĉu ne? Por poste plenigi tiun per detaloj, koloroj, vivo.”

”T troviĝas tiom da manieroj verki, kiom da verkistoj”, mi diris iom acide. ”Kelkiuj komencas per la fino. Mi mem neniam verkas tiel celkonscie. Por mi la verkado pli similas kaŝludon. Aŭ kunmetadon de puzlo, kie ŝajne mankas gravaj pecoj.”

Marja tamen pravis, ke nia amo ne estis tre fulma. Pri vera enamiĝo oni eble neniam povus paroli. La interrilato pli similis intiman amikecon. Tio ne signifis, ke mankis ekscitiĝo, tamen tiu ne trovis tre frapan esprimiĝon. Nu, povas esti, ke tutsimple temis pri la aĝo. Du homoj maturaj eble tute nature ne kondutas kiel petolaj gejunuloj.

La ĉefa demando, kiun mi devis fari al mi, estis: Ĉu mi kontentas pri ĉi tiu speco de amo? La kviete teksata, kiu disvolviĝas iom post iom, fadenon post fadeno? Ĉu sufiĉas mia pacienco por tia rilato? Aŭ ĉu tro mankas al mi la ekscitiĝo, la

pasio, la maltrankvila kora batado kaj la brulanta sanga pulsado? Ja tio devus ne plu manki al mi. En mia aĝo! Kiu devas, tiu povas, asertas la proverbo. Stultaĵo! Pli ĝuste estus: El la neceso faru virton. Sed diable, kiu sopiras je virto? Ĉu ne pli dolĉas la peko?

Nu, Marja tamen ŝajnis kontenta pri la malrapida disvolviĝado de nia amo-vefto. Mi havis pli ambiguajn sentojn. Grava kialo, ke nia rilato laŭ mi suferis de anemio, kompreneble estis, ke ni ne estis kunvivantoj, sed disvivantoj. Pli ol ducent kilometroj disigis nin dum pliparto de la tempo, kaj kiam ni renkontiĝis, ni ne vere kunvivis, sed pli ĝuste gastigis unu la alian. Kutime ŝi min. Kompreneble iom post iom mi pli kaj pli hejmis ĉe ŝi, tamen esence temis pri ŝia hejmo. Kaj tiu de la katoj.

”Estas neniom da kontinueco en nia rilato”, mi foje plendis. ”Nia kunestado konsistas nur el senfina ĉeno da renkontiĝoj kaj disiĝoj, alvenoj kaj foriroj. Ni ŝaltas kaj malŝaltas la amaferon. Neniam ni daŭre ripozas en ĝi.”

”Ĉu vi eltenus tion?” ŝi responde demandis. ”Ĉu ne konvenas al vi alveni kaj foriri, poste reveni kaj denove foriri? Ja neniam estiĝas rutino. Vi neniam tediĝas, ĉu ne? Cetere, vi troigas. Ja ni havas amason da tempo kune inter tiuj venoj kaj iroj.”

Eble ŝi pravis. Povas esti, ke ĉi tia amrilato reprezentis la maksimumon, kiun mi povus elteni. Mi tamen ne estis konvinkita.

”Ni ne havas ŝancon vere ekkoni unu la alian, ĉar ni devas ĉiam denove rekomenci de nulo. Kaj ni vidas nin nur en liberaj horoj, neniam en la ĉiutaga vivo. Tio ne estas natura.”

Marja rigardis min explore, poste ŝiaj okuloj migris for, al la fenestro kaj pluen al la foraj montodorsoj, kaj fine reen al mi.

”Al mi ĉi tio bonas. Ni havas ĉiu sian vivon, kaj krome, kiel bonifikon, la tagojn kaj horojn kune. Mi tre ĝojas pro viaj alvenoj, kaj eĉ pro la foriroj, ĉar ili necesas. Kaj inter foriro kaj reveno okazas, ke mi foje sopiras je vi. Ankaŭ sopirado estas bona afero, ĉu ne?”



Kiam Marja aĝis tridek du jarojn, ŝi ekhavis fratinton. La fratino estis pli ol kvindekjara. Kompreneble temis pri duonfratino, kies ekziston la patro do kaŝis al sia edzino kaj infano dum kvar jardekoj. Sendube la afero restus kaŝita, se la patro de Marja ne malsaniĝus je nekurablebla stomaka kancero kaj sentimentaliĝus antaŭ la proksima morto. Li estis sepdekjara, sed ne sata je vivo.

Tiu fratino – Aino – restis en la norda Laponio, kie ankaŭ Marja naskiĝis kaj vivis infanaĝe, kaj ŝi vojaĝis tien por renkonti Aino'n. Laŭ tio, kion ŝi renkontis al mi, la fratino ne tre ĝojis pro la renkonto, sed ankaŭ ne klopodis eviti ĝin. Ŝajne ŝi jam denaske alkutimiĝis al *la vivo de bastardo* kaj adaptis sin al la decidoj kaj prijuĝoj de aliaj homoj. *La vivo de bastardo* estis ŝiaj propraj vortoj, kaj laŭ Marja tute normala esprimo en la sektisme religia Laponio. Sed kio frapis Marjan, tio estis la simileco inter ŝi kaj Aino. Kiel sengefrata infano kaj seninfana virino, Marja neniam kutimis vidi tian similecon inter si mem kaj proksima parenco. Kaj rakontante la aferon al mi, ŝi ŝajnis iom skuita de tiu sperto, kvankam ĝi jam de kvin jaroj estis pasinta.

Mi ne tre surpriziĝis pro ŝia reago. Marja estas homo ekstreme konscia pri sia propra unika personeco. Ŝi neniam zorgas pri la normala interhoma adaptiĝemo aŭ kompromisemo. Ŝia baza sinteno ŝajnas esti, ke ĉiu homo vivas sola kaj laŭ sia unika itinero. Se tiu fojfoje tanĝas la vivovojon de iu alia homo, do bone, oni eluzu kaj ĝuu la hazardon, sed ne indas provi

kunplekti aŭ unuigi la padojn.

Kaj kun tia virino mi komencis amrilaton! Sed ĉu tio efektive strangas? Ĉu mi ne havas iel similan sintenon? Ne! Teorie tute ne! Eĉ male. Malkiel Marja mi ĉiam tre emadis unuigi la vivovojojn en miaj gerilatoj. Sed la praktiko! La praktiko de mia vivo ŝajnas tre simili ŝian sintenon. Sed ĉu tiu simileco signifas pli grandan ŝancon por nia rilato? Dubinde!



Jam dekomence mi ekamis ŝiajn ruĝajn tagojn. Iom egoisme, eble, tamen ne nur. Efektive ankaŭ ŝi tiam ĝuis...

Ne facilas tion konfesi, tamen eblus eĉ diri, ke mi ĝuis ŝian antaŭmenstruan humoron. Marja ĝenerale tute ne estis plendema persono. Ŝi emis trankvile akcepti la aferojn kaj kondiĉojn tiaj, kiaj ili estis. Ofte mi eĉ trovis ŝin tro stoika. "Do reagu, homo!" mi foje pensis vidante ŝin ŝajne indiferenta. Malafablaj homoj, etaj ĝenoj de la ĉiutageco tuŝis ŝin kiel akvo anseron. Tamen, antaŭmenstrue ŝi fojfoje montris iom da homeco. Se la fadeno en la navedo elĉerpiĝis, se iu el la katoj renversis florpoton, se mi proponis ke ŝi migru suden, tiam ŝi en tiuj tagoj povis incitiĝi. Unufoje ĉe la matenmanĝa tablo ŝi ĵetis marmeladan buterpanon en mian vizaĝon. Mi ne memoras, kion mi faris aŭ diris por provoki tion. Eble mi demandis ŝin, ĉu ŝi vere amas min. Sed mi ja memoras, ke tiu ŝia reago iom vigligis min. Mi eĉ sentis certan ekscitiĝon pro ŝia escepta temperamento kaj petis ŝin leki mian marmeladŝmiritan nazon. Bedaŭrinde ŝi ne faris tion, sed male pugnis ĝin, tiel ke ĝi eksangis. Nu, sangado ja apartenas al la ruĝaj tagoj, kvankam kutime ne el tiu korpoparto, kaj kutime entute ne el mi.

Kiam ŝia sango vere ekfluis, la humoro pliboniĝis. Tiam ŝi ne plu koleremis, sed amemis. La afero estis tia, ke Marja ne

ŝatis mem uzi kontraŭkoncipilon. Kaj ĉar ŝi ankaŭ ne emis patriniĝi, mi do devis uzi kondomon, krom en la ruĝaj tagoj de ŝia monata almanako. Miaflanke, nu, mi neniam ŝatis manĝi bombonon kun restanta ĉirkaŭa papero... Do, nur kiam ŝi menstruis, mi povis vere tutnude konatiĝi kun ŝi. Kompreneble la sango fojfoje iom ĝenis. Necesis submeti iun dikan viŝtukon, kiu pro nia moviĝado ne ĉiam restis en tiu loko, kie ĝi utilis. Kaj post amorado ni foje ambaŭ aspektis iom makabre, kvazaŭ okazus ia granda buĉo. Sed tio ne gravis, ja estis nur kelkaj ruĝaj paŝoj ĝis la duŝejo. Iuvespere, post longa kunestado, kiam ŝi fine elseliĝis kaj mia digo foriĝis, ekfluis el ŝi ruĝa torento, kiu formis grandan lagon sur la ebenaĵo de mia ventro. Tuj Marja kuris alporti viŝpaperon, tamen mi petis ŝin atendi momenteton. Sorĉis min tiu malhela, ruĝe nigra flakego sur mi, kiu devigis min kuŝi senmova, spiri singarde kaj resti serioza, ĉar kompreneble ekrido malplenigus la lagon. Bedaŭrinde ŝi ne respektis mian kontempladon de la virina mistiko, sed komencis sorbi kaj viŝi la lagon kiel iun ajn ĝenan makulon.

Baldaŭ mi rimarkis, ke ne nur mi aparte ĝuas ĉi tiun sangomakulan ludon. Ankaŭ Marja dum tiuj tagoj evidente pli amoremis ol alitempe. Unue mi pensis, ke tion kaŭzas la nebezono pensi pri kontraŭkoncipilo, aŭ la nula risko gravediĝi. Sed post iom ŝi klarigis, ke amorado estas la plej efika kuracilo kontraŭ la obtuza persista menstrudoloro, kiun ŝi alie sentas kiel basan akordon dum la unuaj tagoj de sia menstruo. Kaj ĉar ŝi ĉiuokaze neniam havas aspirinon en la domo, miaj vizitoj en tiuj tagoj estas des pli bonvenaj.

Do, sume kaj resume, mi havis vere bonajn motivojn ami la ruĝajn tagojn de mia Marja.



Kiel ŝi povis fari al mi tion? Estis simple neimageble. Mia Marja!

Ŝi, kiun mi fidis, pri kiu mi neniam suspektus...

Fakte ni neniam promesis ion ajn inter ni. Tio ne necesis, ŝajnis al mi. Mi eĉ ne pensis pri la afero. La fakto, ke mi kun sufiĉe da peno regulritme vojaĝadis al ŝi, ja pruvis mian fidelecon, ĉu ne? Nu, eble mi iam faris mispaŝon, tamen nun ne necesis reveki historiajn memorojn kaj erarojn. Jam delonge mi estis viro matura. Frivolaĵojn de l' junaĝo mi antaŭlonge metis flanken. Kaj ŝi... nu, eble ŝi ne same multe ĝenis sin por povi renkontadi min, tamen, ĉu tio estis kaŭzo por malfidi ŝin? Ja ŝi petis min venadi, kaj akceptadis min kun ĉiuj signoj de amo. Do, neniam venis en mian kapon la ideo, ke inter ni necesus promesoj.

Tiufoje tamen ŝi vere akceptis min kun pli foresta mieno, pli distrita konduto, ol aliokaze. Pasis du jaroj post nia Sahara aŭtopaneo. Supraĵe ĉio estis kiel kutime, kiel la jam firma rutino. Sed ni sendube malpli multe interparolis vespere ol je pli fruaj rendezuoj. Nu, eble ni jam konsumis ĉiujn temojn? Enlite mi rimarkis nenion, tio estas, nenion nenormalan, krom eble ke ĉi-foje ŝi mem estingis la lumon. Aliokaze kutime mi faradis tion, dum ŝi emis lasi lampeton lumanta. Plurfoje dum la semajnfino de mia vizito ŝi silentis ĉe sia teksilo, batante pli bruske ol kutime per ĝia trabo. Fine, dimanĉe, duonhoron antaŭ ol mi devos iri al mia buso, ŝi ekrakontis, kaj kvankam mi jam de du tagoj demandadis min, kio mankas, kio okazis al ŝi, mi neniam atendus *tion*.

”Mi pensis, ke mi prefere nenion diru pri ĉi tio. Sed tio ne eblas. Mi ne povas nun disiĝi de vi nenion dirinte.”

”Pri kio do? Kio mankas al vi?”

Ŝi enspiris kaj ambaŭmane kaptis la randon de la kuireja tablo.

”Mi... mi renkontis alian viron. Eĉ, mi jam... li estas tiel... do, komprenu! Mi... mi enamiĝis!”

Ŝi prononcis tiun lastan vorton defie, preskaŭ kolere, kvazaŭ mi jam delonge asertus, ke ŝi ne kapablas posedi tian senton.

Ŝiaj vortoj vere konsternis min. Mi falis sur seĝon kvazaŭ ia sako, kiun oni lasas laciĝinte plu porti ĝin. Malfeliĉe sur ĝuste tiu kuireja seĝo ripozis Mannerheim, unu el la katoj de Marja, kaj li... pardonu min, mi scias, ke oni kutime *ĝias* katojn, sed ĉi tiu virkato Mannerheim estis tia memfida sinjoreto, ke ne eblas uzi pri li alian pronomon ol *li*, do... Mannerheim saltis, siblegis, hokis la ungojn en mian postaĵon kaj malfermis sian etan sed tigre kruelaspektan faŭkon. Mi rapide stariĝis kaj sukcesis liberigi mian pantalonon el liaj ungoj, kaj sen bedaŭraj sentoj mi adiaŭis lin, dum li kun marŝala digno marŝis orienten, el sian domon, en sian ĝardenon.

La realo refracis min, kiam mi konstatis, ke Marja restas staranta, kie ŝi ĵus staris, kaj ke ŝi restas dirinta, kion ŝi ĵus diris, eĉ se tio ŝajnis absolute absurda.

”Kiam tio okazis?” estis la plej inteligenta reago, kiun mi sukcesis elbuŝigi.

”Tio ne okazis je difinita momento. Mi konas lin de kelka tempo. Li estas Ragnar, la poeto. Translage, vi sendube scias. KREDU min, li estas mirinda homo! Vere la plej bona, kiun... Oni ne pensus tiel, sed kiam oni ekkonas lin pli proksime... Nu, ĉiel ajn, mi ne povas malfari tion! Ne eblas malsenti, kion mi sentas!”

Mi rigardis tra la kuireja fenestro, al ŝia ŝatata vidaĵo, la panoramo norden. Sub violblua picea deklivo kun kelkaj helverdaj betulmakuloj kuŝis arĝenta peco de lago, kaj ie ĉe la bordo de tiu vivis la viro, kiu forkaptis mian virinon. Mi sciis, ke mi devus lukti. Defii lin. Batali kontraŭ li pri ŝia koro. Sed mi ne estas kavaliro, kaj nun ne estas la Mezepoko. Mi sentis nur lacecon. Malĝojon kaj grandegan lacon. Krome, mia

brakhorloĝo ĝuste pepante avertis min, ke estas tempo ekiri al la buso. La aŭtobusa horaro montras nur la momenton de foriro; ĝi ne listas alventempojn de ĵaluzo, venĝo, duelo, nek de amdeklaroj, akuzoj aŭ petegoj. Mi do foriris, pensante, ke mi subeniras laŭ ŝia deklivo la lastan fojon. Ŝi akompanis min ĝis la haltejo, mi brakumis ŝin, ŝi kisis min plorante, kaj jen la busŝoforo kluĉis kaj forveturigis min suden.

Post semajno ŝi petis min reveni. La afero estis finita. Mi sentis kaj pensis, ke mi neniam plu suriros tiun buson, neniam revenos al ŝi, neniam ĝlutos tiun humiligan kalikon. Sed kompreneble mi tuj alveturis. Kiom pezas la humiligo de reveno, kompare kun la glacia paralizo de definitiva disiĝo?

Sed atendis min ankoraŭ unu bato. Post agrabla vendreda vespero, kaj post preskaŭ-kiel-iama sabato, ĉe vespera botelo da vino mi eksciis la veron: ŝi tute ne rompis la rilaton kun li, sed *li* rompis ĝin. Li rifuzis *ŝin*. Dum kelka tempo li amuziĝis kun ŝi, aŭ ĉu diri *per* ŝi? Je mia konto, se tiel diri! Poste li forĵetis ŝin, kiel la semujon de manĝita pomo. Mian Marjan! Kia kreteno! La humiligo kaj laceco, kiun mi antaŭe sentis, nun ŝanĝiĝis en koleron kaj senton de ofendiĝo. Li rifuzis ŝin, kaj pro tio mi sentis, kvazaŭ li iel rifuzus ankaŭ min. Mia amo al Marja kvazaŭ senvaloriĝis, pro lia konduto.

Ĉi tiu nova sento ne efikis al mi paralize, eĉ male. Eble krome la vino iom kunhelpis. Nun dank' al Marja mi sciis precize, kie loĝas tiu bela kaj malmolkora poeto. Ŝajnas idiote, sed tiumomente mi sentis kvazaŭ mi ne havus elekton. Mi simple devis iri tien por klarigi al tiu stultulo, kia putinido li estas. Do, mi ekiris grandpaŝe malsupren laŭ la deklivo, la saman vojon, kiun Marja sendube paŝadis per amemaj piedoj, se tiel diri. Same kiel ŝi, mi malligis ŝian etan remboaton, kiu enlasadas akvon, tamen jen la lago tiel mallarĝas, ke sufiĉis unufoje interrompi la remadon por ĉerpi. Kun daŭre arda kaj indignita koro mi translage plupaŝis laŭ la bordo al lia blanka

ligna domo kun fenestra verando. Vere, la kolero kaj incitiĝo iomete velkis dum la lastaj metroj, tamen mi alvenis ĉe la poetan domon, insiste frapis al la pordo, kaj enpaŝis ne atendante respondon.

”Bonan vesperon, Peter! Vi venas konvene.”

Li paŝis kontraŭ mi kun trankvila rideto, kaj mi refoje konsterniĝis. Ĉu vere jen la *mirinda viro*? Li estis duoble... nu, eble ne duoble, tamen kelkajn jarojn pli aĝa ol mi. Li aspektis tute ne kiel poeto, sed eble pli multe kiel emerita oficisto aŭ instruisto, zorge razita kaj frizita, en blanka ĉemizo. Plej konfuze al mi estis, ke li konas mian nomon kaj ŝajne bone scias, kiu mi estas. Li lokis min sur vimenan fotelon en la verando, kaj mem sidiĝis sur similan, alportinte teon kun rumo. Dume li parolis trankvile kaj leĝere pri la bela vespero, la lumo ĉe la okcidenta rando de la ĉielo, la noktaj birdoj, kiuj ankoraŭ kantadis sufiĉe vigle, kvankam jam estis la komenco de julio. Kun la teo ni manĝis freŝe bakitajn bulketojn kun pruna marmelado, kiu ŝajnis al mi eĉ tro bone konata, kaj efektive:

”Tiun ĉi konfitaĵon alportis Marja. Ŝi estas vere mirinda virino. Vi estas feliĉulo!”

Kion diri? La ekrano tute nigris – nenio venis al mi en la kapon. Krome, oni ja ne parolu kun la buŝo plena de bulko kaj pruna marmelado.

Mi rigardis ĉirkaŭen. Surmure pendis grafikaj bildetoj pri arbaraj pejzaĝoj, kaj sube bretaro plenplenis de libroj, plejparte maldikaj volumoj. Eble poemaroj, mi pensis. Surtable la korbeto kun bulkoj staris sur teksita tuketo. Ĉu el la manoj de mia amatino? Mi supozis, ke jes, demandante min, ĉu en mia hejmo oni same facile ekvidus detalojn, kiuj atestas pri ŝi.

Ragnar, la poeto, parolis plu en senembarasa tono. Mi devis konfesi, ke li vere impresas kvazaŭ simpatiulo. Estis rimarkeble, ke li estas artisto, tamen absolute sen pozoj aŭ afektado. Li

simple ŝajnis tre kulturita, tre klarvida kaj tute honesta homo. Efektive, mi malofte renkontis alian homon, kiu tiel aperis al mi kiel bonulo en profunda senco. Antaŭ ol ni disiĝis, li donacis al mi sian lastan poemaron, kaj eĉ tion li sukcesis fari en senpretenda kaj modesta maniero.

”Ne sentu, ke vi devus legi ĝin. Mi ricevadas amasojn da libroj de kolegoj kaj malofte fortas tralegi ilin. Tamen estas plaĉe scii, ke ili staras sur la librobreto. Kaj en iu hela tago vere povas okazi, ke aperas emo legi unu-du paĝojn.”

Kiam mi jam staris en la pordo, preta foriri, li krome enmanigis al mi saketon.

”Ĉu vi bonvolus kunporti tiujn ĉi aĵojn al Marja? Estas iuj bagatelaĵoj, kiujn ŝi postlasis ĉe mi. Kredeble nenio grava, tamen eble ŝi ŝatus rehavi ilin.”

Kion fari? Mi akceptis la saketon, manpremis kaj ĝisrevidis lin. Remante reen trans la lagon, mi sentis, ke mia antaŭa kolero reŝanĝiĝis en lacecon. Kion do fari? Ke efektive mi perdis energion, tion pruvas, ke reirante mi devis ne nur unufoje sed eĉ trifoje interrompi la remadon por ĉerpi akvon el la boatfundo. Dume mia menso estis, kiel oni kutime legas en eksmodaj romanoj, scenejo de interbatalantaj emocioj.



Marja havis amikinojn en Stokholmo. Apenaŭ eblus imagi du pli malsimilajn homojn. Anja estis dek aŭ eĉ dek kvin jarojn pli juna. Ŝi estis tipa urbano, eĉ urbegano. Ŝi kunvivis kun knabo, jes, vera knabo, ĉar tiu kunvivanto estis eĉ pli juna ol ŝi, kaj tamen ŝi ĉiam revadis pri la iam renkontota viro de ŝia vivo. Anja estis nervulino, kiu postulis eventojn senĉese.

Ni planis kunan piediradon en la montaro. La ideo originis de Marja, mi tuj subtenis ĝin, kaj iel neatendite Anja

entuziasmiĝis pri la ideo. Ŝi neniam antaŭe vagis en montaro. Kiel kvaran partoprenonton de la ekspedicio mi varbis Robert'on. Li estis ermito kiu kutime ĝenis neniun, krom kiam trafis lin atako de deprimiĝo. Nu, ankaŭ tiam li neniun konscie ĝenis, tamen foje oni timis, ke li faru al si ion fatalan pro la peza melankolio, en kiun li falis.

La tuta vagado daŭris laŭplane nur du tagojn, tamen tiuj du tagoj por mi signifis grandan defion al mia nesufiĉa pacienco. Ni venis aŭtobuse al vilaĝeto, nu, domaro kun turista gastejo kaj bushaltejo. De tie ni devis piede ekiri al turista dometo situanta tre bele sub la monto Vielâlkenĉakke. Ne estis longa vojo, tamen ja ne ĉiuj estis spertaj vagantoj, do ŝajnis al mi, ke ni bezonos la plejparton de la tago por veni tien. Sed antaŭ ol ekiri, la inoj volis kaftrinki. Robert konsentis. Tiu izolulo eĉ iĝis vere societema kun Marja kaj Anja. Post horo da kafumado, necesis kuŝi surdorse sur herbejo plena de kuglofloroj, nur ĝuante la aeron, kompreneble babilante pri ĉio okazinta, de kiam la du amikinoj lastfoje renkontiĝis. Robert gaje kunbabilis, kuŝante surdorse. Nur mi tretadis nervoze kaj kuris ĉirkaŭ la tri kuŝantoj kiel leporo. Sed mi nenion diris. Mi antaŭe decidis, ke mi ne trudos al ili miajn opiniojn. Al ĉiu laŭ sia plaĉo, kaj mi adaptiĝu. Mi adaptiĝu!

Finfine ni tamen eksurvojis. Mi ne scias, ĉu ili laciĝis de mia trotado, aŭ eble vere ekdeziris piediri. Ni spertis belegan marŝon. La vetero estis mirinda, la pado estis bona sed iom malseka. Malgraŭ mia antaŭa konsilo surmeti kaŭĉukajn botojn, la du amikinoj preferis marŝi en trejnŝuoj. Robert kunportis botojn, sed pro simpatio al la du inoj li lasis ilin en sia dorsosako marŝante en trejnŝuoj, ankaŭ li. Nur mi do konservis la piedojn sekaj, sed malgraŭ tio ŝajnis, ke la cetera triopo konservis sian humoron plej hela kaj suna.

Dumvoje necesis ofte paŭzi por trinki el la montaj riveretoj, frandi marĉajn rubusojn, gvati al boacoj aŭ simple klaĉi. Fine ni

tamen alvenis al la dometo belege situanta. Ni hakis lignon en sunsubiro, kuiris kaj manĝis je lumo de kandeloj, kaj enlitiĝis.

Matene necesis reiri. Jam vekigante mi iom nervoze antaŭtimis, ke estos malfacile ekiri je sufiĉe frua horo. Nu, efektive ni ekiris jam tagmeze, sed post du kilometroj ni devis halti por kelkhora lunĉa paŭzo. Sed mi nenion diris. Mi ne admonis, ne rapidigis miajn kunulojn. Eble mi iom tretadis kun pretigita pakaĵo, dum la amikinoj kuŝis sur mirtela arbustaro, diskutante la vivon kaj aŭskultante la lirladon de apuda rivereto, kaj Robert gaje konsentadis pri ĉio.

Estis nokto antaŭ ol ni revenis al la vilaĝeto. Mi jam delonge antaŭtimis, ke pro la horo ni ne sukcesos enveni en la turistgastejon, kie ni rezervis litojn, tamen ĉio iris glate. Entute do la dutaga ekskurso estis plena sukceso. La unikulino Marja glate rilatis kun ni ĉiuj. La senripoza urbanino Anja ĝuegis la trankvilon kaj dezertecon de la montaro. La mizantropo Robert gaje amikumis. Nur al mi la ekspedicio iĝis streĉa ekzameno pri pacienco.



Enirante la domon de Marja oni venas tuj en la salonon. Tiu estas okupita de du teksiloj, el kiuj unu renovigota. Dum la tuta tempo, kiam mi konis ŝin, ĝi restis renovigota. Sed la alia estas ĉiam plena de iu teksata verko ŝia. La revo de Marja estas, ke ŝi povu iam vivteni sin per la teksado. Tio tamen ŝajnas fora aspiro, des pli ĉar ŝi ne tre emas disiĝi de siaj verkoj – almenaŭ ne kontraŭ mono. Sur ĉiuj muroj de la domo kaj en ĉiuj tirkestoĵ troviĝas teksaĵoj, ĉiu kun sia historio.

”Tiun malhele verdan kun blankaj strioj mi teksis post kiam mia patro mortis. Kaj tiu hela, kun turkisaj nodoj, estiĝis, kiam mi finfine liberiĝis de iu frenezulo nomita Edvin. Kaj jen,

vidu...” Ŝajne ĉiu evento, dramo, sukceso aŭ fiasko en ŝia vivo rezultigis teksaĵon, kaj se ilia historio tiel firme enteksiĝis en la vefto, mi facile komprenis, ke povas esti malfacile forvendi ilin. Tio signifus vendi partojn de sia vivo.

Kelkfoje mi demandis, ĉu ŝia renkontiĝo kun mi jam kaŭzis iun teksaĵon, sed ŝi serpente evitis respondi tiun demandon. Multfoje mi serĉadis laŭ la muroj, por trovi ion, kio povus rilati al mi. Multajn strangajn bildojn mi vidis, malhelajn, nefinitajn, tru-havajn. Sed ŝi nur ridetis skuante la kapon, kiam mi scivolis, ĉu ili iel temas pri mi. Eble ŝi ekteksos min nur post kiam ŝi ”finfine liberiĝos” de mi.

Kompreneble aĉetontoj ne svarmas en ĉi tiu forgesita vilaĝeto. Tamen mi ne trovas maleble, ke ŝi povus multe vendi, se ŝi trovus la ĝustan lokon. Precipe en turismaj lokoj, homoj emas aĉeti la plej sensencan rubon, precipe en tagoj de aĉa vetero, kiam ili bezonas ion por iom gajigi la libertempan vojaĝon.

Ion similan mi foje diris al ŝi. Sed ŝajne mi ne esprimis tion en la plej taŭga maniero. Se diri la veron, mi eĉ preferus gluti la langon poste.

”Sensencan rubon? Nu, sendube vi pravas. Tamen mi ne tre emas konkuri kun tiu. Kaj cetere, ĉi tie ne troviĝas turista vidindaĵo.”

Mi koncedis tion, sed kuraĝis proponi, ke ŝi transloĝiĝu al pli vizitata loko. Eble iom pli sude? Kompreneble mi ne menciis, ke mi loĝas en tiu direkto. Espereble ŝi tion memoris, sen aparta atentigo pri tiu fakto.

”Vi ne komprenas. Jen la loko, kie mi povas krei ion. Se mi finfine trovis ĉi tiun domon, mi ne povas tuj forlasi ĝin pro iu kaprico. Cetere, ĉi tie la katoj hejmas. Mi ne povas simple ekvagabondi!”

Laŭ ŝia diro, oni povus kredi, ke ŝi ĵus trovis ĉi tiun paradizon. La vero estas, ke ŝi vivas tie jam de preskaŭ jardeko. Krom en la infanaĝa hejmo, ŝi sendube nenie restadis tiel longe, kiel ĉi tie. Sed ial ŝi flegas la miton, ke ŝi ĵus setlis en ĉi ligna domo sur picea deklivo.

”Kaj la horizonto ĉi tie plaĉas al mi. Ne volas mi forlasi ĝin.”

– ... *Malaperis la purpura nuanco de la okcidenta ĉielrando, kiu glimis kiam mi suriris la aŭtobuson por revojaĝi hejmen. Nun ĉio jam plene nigras. Kiel kutime. Ŝajnas, ke mi ĵus eliris el ĉi tiu buso, kaj jen mi denove sidas sur la kutima loko, plej antaŭe dekstre. Kaj tamen mi pasigis kvin tagojn ĉe Marja. Kion ni faris? Promenis. Interparolis. Ŝi desegnis mian portreton, kiel ŝi jam delonge intencis. Per karba kreto. Poste ŝi preskaŭ pardonpetis, ĉar ĝi iĝis tiel nigra. Nu, laŭ mi ĝi similas min. En ĝi mi aspektas kiel melankolia artisto. Aŭ eble kiel homo kun dentodoloro.*

Efektive nia lasta interparolo hodiaŭ ne estis tiel bona. Mi ne scias kial, sed eble kvin tagoj sinsekve estas tro longa tempo. Ĉu nia rilato eltenas nur semajnfinojn? Ĉiuokaze ŝajnas al mi, ke ŝi iom laciĝis, kaj preskaŭ malpacience atendis mian forveturon.

Mi fakte iom miras pri ŝiaj vortoj. "Bezonas pripensadi". Pri kio? Kaj ĉu mi malhelpas al ŝi pensi? Eĉ se mi farus tion, ĉu ŝi ne havas sufiĉe da tempo por pensi en la longaj semajnoj, kiam ni ne vidas unu la alian? Ŝi ja ne povas pensi tiel bradipe malrapide, ke ŝi bezonas pli da tempo! Persone mi bezonus malpli pensi. Pensado ĝenerale estas afero, al kiu oni atribuas tro altan valoron. Trotaksata okupo. Mi vetas, ke multaj aferoj irus multe pli glate sen tiom da fekpensado.

Mi demandas min, kio efektive kaŝiĝas sub ŝiaj vortoj. Ĉu ŝi sinceras, aŭ simple trompas min, manipulas min? Ja ŝi diris, ke ŝi ankoraŭ amas min, sed tio eble estas pura literaturo. Diable, kial do mi tiel suspektas? Kial supozi ke ĉie kaŝiĝas trompo kaj perfido?

Kaj kion ŝi diris, kiam mia aŭtobuso venis? Mi brakumis kaj kisis ŝin kaj iris al la buso. "Mi telefonos!" mi diris. "Ĝis la!" Kaj ŝi respondis – ŝajnis al mi, ke ŝi respondas: "Dis!" Ĉu ŝerco? Aŭ ĉu mi misaŭdis? Ja ŝi estas finnino, tamen mi neniam antaŭe

aŭdis ŝin tiel misprononci. Stranga okazo por ŝerci! Mi turnis min en la buspordo kun demando sur la lipoj, sed la ŝoforo nur fermis la pordon kaj ekveturigis la buson. Mian monon kaj la biletilon li manipulis unumane, stirante per la dua. Mi ne ŝatas tiel facilanimajn busŝoforojn. Jen vidu lin, ekzemple. Nun li legas la horaron kondukante tra ĉi tiu karbonigra nenio.

Kaj kion diable signifis tiu ŝia "eble ne sufiĉe maturaj"? Kvazaŭ ni estus du pomoj! Aŭ pomo kaj piro. Kiel damne multe oni bezonas maturiĝi? Mi sentas min jam delonge tromatura. Preta putri sur mia branĉo. Aĉ! Estos kompoto el la tuta afero...

Fek! Al infero tiu maturiĝado! Ja ni ambaŭ estas plenkreskaj homoj, eĉ pli ol plenkreskaj. Ja ne temas pri du adoleskuloj, kiuj esploras la misteron de l'vivo kaj amo. Nek pri infanoj, kiuj vivas kvazaŭ en alia mondo. Ĉu ni ne jam spertis preskaŭ ĉion kaj konas ĉiujn kaptilojn kaj ŝtonojn de falpuŝiĝo? Maturiĝi! Kia infanaĵo... –

10. Senmotore vojaĝi

Multaj danĝeroj insidis kontraŭ mi. Pluraj el ili estis ligitaj al apartaj lokoj. Iuj danĝeroj estis realaj. Tiajn mi kaj la aliaj infanoj mem konis. Se mi irus en Paŝtejon, eble la bienulo pafus al mi per salo-kugloj. Kaj fore en Betularo povus okazi, ke Grandulo kaj lia bando kaptus min.

Unufoje mi kredis vidi la bienulon, tamen mi ne povis distingi, ĉu li kunportis la fusilon aŭ ne. Mi rampadis tra tuneloj en prunela vepro kaj alvenis en tunelbuŝon direktitan al kampo. Tiam mi vidis iun, kiu kredeble estis la bienulo, paŝantan surkampe. Mi turnis min kaj rapide rerampis en la tunelojn. Mi saviĝis. Neniu salo-kuglo trafis min, nur la haŭto ekhavis skrapeton. Prunelaj arbedoj havas terurajn dornojn.

Grandulon mi neniam vidis, sed li ekzistis. La pliaĝaj infanoj rakontadis pri li. Li ekzistis de ĉiam kaj daŭre ekzistos ĉiam, same kiel nia vico da trietaĝaj domoj, kaj kiel Ŝtonaro, Paŝtejo, Eta maro kaj Betularo. Se mi estus kaptita de Grandulo kaj lia bando, ili ligus min al arbo kaj pibus sur min. Kio okazus post tio, mi ne sciis.

Krome troviĝis danĝeroj, pri kiuj la panjoj kaj paĉjoj parolis. Same kiel la infanoj najbaraj mi ne rajtis bicikli sur la nacia ŝoseo, ĉar tie eble aŭto surveturus min. Nek ludi sur la fervoja taluso, kie mi eble trafus sub la motorvagonaron. Nek iri al Eta maro printempe, kiam ĝi plenis de akvo, ĉar eblus tie droni. Sed ĉi tiuj danĝeroj ne estis realaj. Neniu el la infanoj iam ajn konis iun, kiu dronis kaj estis trafita de aŭto. La sola danĝero pri tiuj estis, ke oni povus esti malkaŝita kaj punita per vergado. Min oni tamen ne vergis, sed Panjo kaj Paĉjo povus silentiĝi. Tio estis speco de frosta silento, kiu rongis en mian bruston kaj premis mian koron per malvarma mano. Tial estis plej bone por ĉiuj, se ili ne eksciis, kiam mi ludis sur la taluso.

Iutage mi estis kaptita sur la pado inter la futbalejo kaj la kampo. Ne de Grandulo kaj lia bando, sed de du knaboj el la granda lernejo. Ili fikstenis min, mokadis kaj faris amason da demandoj. Mi ne komprenis, pri kio ili parolis. Estis io pri melki kaj ŝpruci. Mi sciis nur, ke mi nepre ne ekploru, do mi fikstenis la suban lipon inter la dentoj, por ke ĝi ne tremu. Poste ili bruligis mian brakon per siaj cigaredoj antaŭ ol liberigi min. Mi kuris hejmen, malfermis la pordon al nia apartamento per mia ŝlosilo, kiun mi portis sur ŝnuro ĉirkaŭ la kolo, kaj surmetis longmanikan ĉemizon. Mi decidis montri la rondajn brulmarketojn al neniuj. Se mi farus tion, mi devus honti, ĉar mi ne povis klarigi, kio okazis. Mi sciis, ke tiaj spertoj apartenas al la vivo.

Sed tiajn danĝerojn la plenkreskuloj ne konis. Ili kredis, ke danĝeras la nacia ŝoseo kaj la motorvagonaro. Pri la vivo de infano ili sciis nenion.



Mi havis plurajn amikojn. Kun kelkaj mi ludis surkorte. La infanoj de mia domo kaj la najbara domo havis komunan ludejon surkorte. Trans tiuj domoj estis malamika teritorio. Kun la infanoj de alia korto ne eblis ludi. Ili estis malbonaj, malamikaj. Sed iam mi ekhavis amikon el pli fora domo. Anders estis lia nomo. Ekde tiam mi ofte ludis kun li, biciklis kun li en la ĉirkaŭaĵo. Fojfoje ni estis ankaŭ en mia hejmo, kaj esceptokaze en la lia. Li ne rajtis ludi endome, sed iam ni iris tien, kiam neniuj el liaj gepatroj hejmis.

Inter la infanoj de mia kvartalo estis tute klare, ke iuj valoras pli multe ol aliaj. Iuj infanoj estis pli popularaj ol aliaj. Kun tiuj ni ĉiuj volis kunesti. Aliajn ni evitis kiel leprulojn. Mi ne sciis, kial ĉi tio estis, aŭ kio igis iun pli aŭ malpli valora. Sed ni ĉiuj sciis, ke tia estas la mondo.

Anders ne apartenis al la ŝatataj, popularaj knaboj. Sed al mi tio ne tre gravis, ĉar li ĉiuokaze ne loĝis en mia domo, nek en la najbara. Do mi kutime ne estis kun li sur nia korto, inter la najbaraj infanoj, sed aliloke. Tamen mi foje aŭdis iun demandi malestime, kial mi ludas kun li. Mi ne sciis, kion respondi.

En mia domo loĝis Evert. Li estis unu el la valoraj knaboj, interalie ankaŭ pro tio, ke li aĝis unu jaron pli ol mi. Dum iu periodo mi tamen ofte kunestis kun li. Lia patro estis ĉasisto, kaj Evert kolektis amason da plumberoj, kiujn li kunfandis en potoj. Mi ne komprenis, por kio li uzos la plumbon, tamen estis ekscita sperto ĉeesti tiun fandadon.

Iufoje ni estis solaj en lia hejmo. Tiam li prenis la fusilon de sia patro, ŝargis ĝin kaj pafis unu pafon de la balkono kontraŭ la apuda kampo. Mi memoris la rakontojn pri la bienulo kaj fantaziis, ke ni pafis lin. Sed mi sciis, ke tio ne estas vera. Mi plu fantaziis ankaŭ, ke ni pafis al Grandulo, kvankam mi eĉ ne plu certis, ĉu tiu figuro vere ekzistas.

Iam dum ĉi tiu tempo mi estis kun Evert proksime al la domo de Anders. Ni ekvidis lin elveni el sia domo, kaj Evert decidis kapti kaj torturi lin. Mi ne kuraĝis kontraŭdiri, kaj Evert kaŝis sin, dum Anders proksimiĝis al mi. Do mi renkontis mian amikon, kiu nenion suspektis, ĝis Evert aperis de malantaŭe kaptante lin. Kion li poste efektive faris al Anders? En mia memoro fiksiĝis nur la vizaĝo de Anders, gaja kaj amika, kiam li iris renkonte al mi, sed subite tima kaj ŝokita, kiam de dorse iu ŝlosis al li la brakojn. Kaj mi nenion faris por asisti lin, eĉ male, mi helpis trompi lin.

Iam poste estis tempo komenci la lernejon. Anders kaj mi estis samaĝaj kaj venis en la saman klason. Sed tie ja estis ankaŭ multaj aliaj, pli prestiĝaj infanoj, eĉ kelkaj el mia propra korto. Do, en la klaso mi ne konis Anders'on. Ekster la lernejo ni daŭre ludis, bicikladis kune, elpensis petolaĵojn. Sed en la lernejo mi ne konis lin.

En liberaj horoj ni tamen iom post iom vastigis niajn ekskursojn. La nacia ŝoseo ne plu limigis nin, kaj trans ĝi ni trovis antikvan ŝarĝaŭton sen motoro, sen antaŭaj radoj, sen flankaj glacoj. Per tiu eta *Studebaker* ni senmotore vojaĝis foren, tra multaj landoj, transportante diversajn valoraĵojn. Anders sciis konduki aŭton, kaj mi rigardis lin por lerni kaj imiti. Plej malfacile estis vidi, kiel li agis perpiede, kaj baldaŭ montriĝis, ke mi jam stiris la aŭton centojn da mejloj premante la kluĉilon anstataŭ la akcelilo, pro miskompreno. Sed tio ne gravis, kaj cetere ja estis bona afero lerni ion novan.

La vivo tamen pluis; ni evoluis kaj ekhavis novajn dezirojn. La ŝajniga stirado de kaduka ŝarĝaŭto ne plu ravis nin, tamen tiu stirejo restis konvena loko por privata vivo. Iutage Anders malkovris la kaŝejon, kie lia patro tenis magazinojn plenajn de nudulinoj. Li kunportis dikan faskon da tiaj al nia aŭto, kaj ni pasigis horojn profundigante en mondon, kiu atendas nin post kelkaj jaroj.

Dum la esplorado de tiuj nudulinoj, niaj pantalonoj iĝis tro malvastaj. Ni malzipis la pantalonfendojn por kompari. Lia kaco estis longa, maldika kaj tre kurba, dum la mia estis pli rekta kaj dika, sed malpli longa.

”Estas bone havi kurban por eniri la inojn”, li asertis.

Mi protestis, sed ĉar pruvoj kaj spertoj mankis al ni ambaŭ, ni devis forlasi la demandon, ĉu rekta aŭ kurba ilo plej efikas. Kredeble tiu afero neniam entute estis funde esplorita kaj pruvita.

En la lernejo tamen niaj roloj restis tute aliaj. Tie mi grimpadis kun la aliaj knaboj sur ŝtupetaro el interrilatoj kaj aliancoj, alkroĉante min supre kaj piedbatante malsupren. Pri la knabinoj eĉ ne indis pensi; ili staris sube, apude, rigardante nian baraktadon, aŭ eble ili havis sian propran ŝtuparon, nevideblan al ni. Mi ligis novajn rilatojn kun la gravuloj de la klaso, kun la

plej fortaj kaj plej kuraĝaj samklasanoj. Kiam Anders foje provis kontakti min sur la lerneja korto, mi turnis al li la dorson. Mi malagnoskis lin. Kaj fine tiu mia ambigua konduto, tiu perfido korodis ankaŭ nian eksterlernejan rilaton, kaj ni disiĝis, ni ne plu renkontiĝis. Anders malaperis el mia infanaĝo, lasante post si ombbron malhelan.

– ... Jen denove sidas geedza paro interparolante – aŭ pli ĝuste la edzino babilas. Stranga paro! Ĉu la sama, kiel survoje ĉi tien? Ne, evidente ne, tamen sendube troviĝas multaj de tiu speco. Edzo muta kaj edzino vortlaksa. Mi scivolas, kiel ili iam renkontiĝis. Oni supozus, ke jam dekomence frapus ilin la manko de komuniko. Sed eble ĝi ne ĝenis ilin. Ŝi ŝatas babili, kaj li ne malhelpas ŝin. Li preferas silenti, kaj ŝi permesas al li tion. Ĉio en ordo. Aŭ eble ili komence tute alie interagis. Ĉu ili renkontiĝis en fojneja dancado? Li estis ebriega, ŝi viravida, tuj ŝi gravediĝis, kaj ili devis iri al la pastro por ricevi kondukpermeson, kiel oni eble diradis en ilia vilaĝo. Aŭ tute inverse, li svatiĝis al ŝi dum jaroj, ĝis finfine ŝi cedis. Sed kiel li konvinkis ŝin? Sendube ne per paroladoj. Eble ili renkontiĝis per gazeta anonceto? Aŭ simple ili konas unu la alian jam de infanaĝe. En ilia vilaĝeto mankis aliaj gejunuloj. Ĉe ili kredeble ĉiuj homoj parencas laŭ pluraj kurbaj linioj. Stultaĵo! Kion mi scias pri ili? Ja nenion...

Kiam mi loĝis duonjaron en Stokholmo, mi komencis en vesperaj horoj studi etnografion. Ne longe daŭris, ĝis mi devis rompi tion pro transloĝiĝo. Mi ne memoras multe, sed inter la disaj splitoj da scio, kiuj restis en mia kapo, troviĝas io pri endogamio kaj ekzogamio. Iuj gentoj praktikas endogamion, alivorte geedziĝojn ene de la propra grupo, klano, tribo, totemo, parencaro. Geedziĝas gekuzoj. Ĉiuj parencas kun ĉiuj. Aliaj male praktikas ekzogamion, malpermeson geedziĝi ene de la propra grupo. Devon serĉi partneron aligrupe kaj aliloke. En mia familio ŝajne ĝis nun ĉiuj estis endogamiuloj. La tuta aro estas Smolandaj bienservistoj, fiŝistoj, laboristoj, mastrumistinoj. Neniu fremdulo. Neniu eĉ el alia provinco. Neniu el alia socia klaso. Eĉ ŝajne neniu vera fripono aŭ maltaŭgulo. Ĝis nun. Ĝis mi. Subite okazis mutacio – kaj jen mi. La ekstrema ekzogamiulo. Kial diable mi neniam povas trovi iun

en mia rondo, en mia vilaĝeto? Kiom da horoj mi jam pasigis tra la paso de jaroj vojaĝante al la okaza kunulino? Ne kunvivantino. Disvivantino. Amo laŭ horaro. Dumtagaj trajnoj al Stokholmo. Fine, kiam mi ekloĝis tie, la afero kompreneble kraŝis. Jen kiam mi komencis pri tiu etnografio. Bone, post la tagaj trajnoj jen sekvis noktaj trajnoj – ĉi-foje al Kopenhago. Nu, tio almenaŭ neniam iĝis rutino... Kaj nun ĉi tiu aŭtobuso. Al tiu sovaĝejo iras nek taga nek nokta trajno.

Efektive buso estas pli aĉa. Neniu restoracia vagono. Ne eblas promeni. Mi eĉ malemas legi en buso. Restas nur promenigi la pensojn, lasi ilin vagi... Vane, ĉar ili ŝajne nur marŝas en monotona ritmo laŭ jam bone konataj distretitaj spuroj. Eĉ la horaro de ĉi tiu buso malkonvenas. Eble mi devus resti ĉe iu el la pertrajnaj amoj? Sed kiu el ili? Ĉu la taga trajno? La nokta? Ĉu Stokholmo? Kopenhago? Stultaĵo! Ĉu gravas la lokoj aŭ horoj? Gravas ja nur – la homoj. La amoj. La diversaj specoj de amo. Ĉu iu jam provis fari tipologion de amoj? La amo blinda. La amo spekulacia. La amo urĝa. La amo koresponda. La amo reciklita. La amo rezigna...

Stultaĵoj denove. Se la homoj unikas, la rilato inter du homoj ja devas esti duoble unika. Ne eblas sistemigi. Ĉu do ankaŭ ne eblas ion lerni el la spertoj? Ĉu ĉiu nova provo estas kvazaŭ nova vivo de renaskito, kiu ne memoras sian antaŭan vivon? Ĉu ĉiu amo do okazas unuafoje? Certe ne! Ja ĝi povas kelkiam okazi triafoje...

Ja tri estas magia nombro. Ĉu ne tio, kio plenumiĝas nur je la tria provo devus posedi ian magian potencon? Ĉu tia amo ne devus elteni ĉion, aŭ almenaŭ daŭri iomete pli longe ol aliaj amoj? Nu, eble estas inverse. Eble tutsimple tri estas tro... –

11. Du inoj enlite

”Kiam mi estos pliaĝa, mi ŝatus iĝi dika gastejstrino kaj estri ĉi tian vinejon.”

Mi konsterniĝis, sed sufiĉe rapide remastris min por diri:

”Bone. Mi estos via plej fidela gasto. Eble mi iĝos alkoholulo, sed tio ne gravas.”

Sed interne mi miris. Mi ne sciis precize kiel aliaj dekokjarulinoj imagis sian estontan vivon, tamen supozeble ne kiel dika gastejstrino. Kredeble eĉ ne kiel maldika. Do, kiel ĉiam, se io ŝajnis necerta, mi prenis la aferon ŝerce, kvankam mi tute ne certis, ke Kati tiel same komprenas ĝin.

Entute ŝi ŝajnis al mi plejparte nedivenebla, kaj en tio eble kaŝiĝis parto de ŝia rava povo. Aldoniĝis al tio vizaĝo, kiu por mi entenis ion fremdan, sorĉan. Pinta nazo, altaj vangostoj, bruna hararo, lentugetoj, vangokavetoj, apetitiga buŝo, ronda mentono. Mi imagis ŝin sub Polineziaj palmoj, kompreneble sen tro ĝena vesto. Jam tra la normale Eŭropa kostumo ŝi tre vekis mian deziron, kaj incitis min ŝia ĝenerala sinteno, kvazaŭ nenio en ĉi tiu mondo vere gravas. Sume kaj resume do estas klare, ke mi ŝvebis sur nuboj el konfuziĝo. Roza nuboj kun knabinaj formoj.

Ni sidis en la vinejo ”La verda rano” sur la montetoj de Buda, eble la sama trinkejo, kiu inspiris Julion Baghy al lia fama poemo *Rankvarteto*, dediĉita al la plendantaj nenifarantoj, do preskaŭ eksplicite al mi. Ĝi estis tute tia gastejo, kie Kati aspiris kun korpulenta aplombo servi soifantojn. Ni trinkis ion, eble *bovsangon el Eger*, babilante. Ŝia grandurba mondumeco blindigis kaj timigis min, aliflanke mi estis la okcidentano, do eble ne tiel senvalora, kiel mi sentis min.

Poste ni paŝis tra parko, kie laŭdire – tio estas laŭ Kati – amindumantoj kutime promenas, sed mi ne povis amindumi ĉi tiun knabinon, kies memfido ŝajnis al mi giganta kompare kun la mia. Ni tenis la manojn kiel infanoj, mi kuraĝis provi nur ian senkulpan kareson. Apenaŭ kiseti estis la suma gajno de mia promeno kun bela knabino en la aminduma parko. Se Danubo estus nur iomete pli valse blua, mi pretus ĵeti min kapantaŭe en ĝin.

Multe ni vagadis kune laŭ la kajoj. Neniam antaŭe mi tiel flue babiladis Esperante, kiel kun Kati. Estis varmaj juliaj tagoj. Ĉe la Ĉenponto mi ekvidis, ke en kiosko oni vendas akvon, kiu elŝprucas freŝe el la roko. Vicoj da homoj eniris, aĉetis kruĉon da akvo kaj trinkis. Kiel refreŝige! Mi soifis, pagis kelkajn filerojn kaj ektrinkis. Fek! Mi preskaŭ sufokiĝis! Kati moke ridegis pri mi, kiam mi kun grimaco lasis la varman, sulfurozan akvon kun odoro de putra ovo. Longe ŝi ridis, ĝis poste ni aĉetis anstataŭe glaciaĵon, kaj ŝi komencis instrui al mi, kiel prononci "glaciaĵo" en la hungara. Fagylalt. Ŝi devis per fingro korekti miajn lipojn. Preskaŭ "foĝlolt". Mi intence fuŝprononcis, dum ŝi demonstris la ĝustan lipan pozicion. Mi fine lernis laŭ preskaŭ buŝ-al-buŝa metodo, kiam ni devis ambaŭ samtempe leki la fandiĝantan glaciaĵo-stangon.

Sorĉistino ŝi aperis al mi. Sorĉistino kun seksallogo kaj antaŭtuko de gastejstrino.

Sed ĉu sorĉistinoj kutimas gravediĝi kaj edziniĝi? Gastejstrinoj eble jes. Seksallogaj inoj neeviteble.

Mi revenis mialanden kaj klopodis konservi la kontakton kun Kati per letere. Sed la leteroj montriĝis ne pli efika komunikilo ol la rekta interparolo en vinejoj kaj parkoj ĉe Danubo, se temis pri voĉigi miajn sentojn. Mi verkis al ŝi longajn leterojn plenajn de ĉiutagaĵoj kaj komentoj pri la ekstera mondo, dum mia interna mondo restis zorge ŝlosita en mia memo. Kaj ŝi reciprokis malpli regule kaj malpli vortriĉe, per

impresionismaj mesaĝoj plenaj de duonaj raportoj pri diversspecaj aventuroj, aludoj pri ŝiaj grandaj planoj kaj aspiroj, kaj ŝajne ciniketaj komentoj pri la bigoteco kaj hipokrito de aliaj homoj.

Kredeble mi neniam skribis, ke mi volas revidi ŝin, kaj certe ŝi neniam menciis ion similan. Tamen mi preskaŭ certas, ke mi esprimis admiron al la bela Budapeŝto, menciante, ke mi volonte iam revenus tien.

Ofte ŝiaj leteroj konfuzis min. Kiel mi ekzemple interpretu la mencion, ke ŝi devis ĉesigi siajn studojn ĉe la drama altlernejo? Antaŭe ŝajnis al mi, ke la teatro plej gravas en ŝia vivo, sed nun ŝi ŝajne indiferece, preskaŭ senŝarĝigite raportis, ke tio estas finita. Kaj kial? Laŭ duonaj frazoj kaj aludoj mi povis elekti kredi, ke tion kaŭzis vundita piedo, politika diskriminado aŭ ŝia nesufiĉe morala konduto.

Eble temis pri la lasta el tiuj eblaj klarigoj, ĉar poste venis en rapida sinsekvo informoj pri ŝia edziniĝo kaj nasko de filo.

Feliĉe troviĝas en la mondo uloj pli entreprenemaj ol mi, alie la homaro eble ŝrumpus... Feliĉe? Nu. Feliĉo ne estis la plej proksima sento, kiu invadis min, kiam elfalis el ŝia letereto la geedziĝa foto. Mi ne gurdus la jam kliŝan baladon pri ponardo enbruste. Sed kion pri sitelo da glacia akvo sur la kapon? Tro milda. Piedbato de ĉevalo? Tro rapida. Daŭris kelkajn sekundojn sorbi la aferon. Ĝi estis tute malverŝajna, do mi baldaŭ komprenis, ke ĝi estas vera kaj neŝanĝebla. Kompreninte tion, mi sentis iun venenon kvazaŭ injektiĝi kaj penetri en mian korpon pecon post peco, iom post iom paralizante ĝin. Nu, evidente la mondo estas tiel saĝe farita, ke ĉiam troviĝas volontula leterkolombeto preta oferti sian helpon, kiam iu bezonas paralizan injekton.

Mi studis ŝian edzon laŭ la foto. Li ŝajnis juna atleto kun egale glataj frizaĵo, frunto kaj kolumo. En la letero ŝi priparolis

lin sufiĉe ironie. Sed kion kredi? Eĉ ŝia propra figuro laŭ la foto estis iom ŝanĝita aŭ retuŝita. La nazo estis malpli pinta, la vangoj malpli rondaj. La korpo ne vidiĝis, ĉar ne estis tutfigura foto, kio post monato ricevis sian klarigon per la anonco pri alveno de ŝia filo Imre.

Ni interŝanĝis pluajn leterojn pli kaj pli maloftajn, pli kaj pli neŭtralajn. Baldaŭ ili ĉesis.

Post ses jaroj mi revidis ŝin en iu Esperanto-renkontiĝo, kie mi ĉeestis kun Karina. Sed tiam min okupis aliaj aferoj, kaj mi eĉ ne notis, ĉu Kati estis tie sola aŭ kun iu ulo.

Ne, tio ne veras. Ja mi notis, eĉ plie, mi observis ŝin kaŝe. Tamen mi ne sukcesis elpensi, ĉu la viro akompananta ŝin estas la edzo, iom maljuniĝinta kaj ne plu fotografe retuŝita, aŭ nova ulo, aŭ eble eĉ nura amiko. Kaj kompreneble mi ne demandis ŝin.

Kaj poste do pasis ankoraŭ ses jaroj. Iutage mi jen kaj jen fluglegis la novan liston de Pasporta Servo. Ridetis pri gastiganto, kiu akceptas nur geedzajn parojn, aŭ preferas vegetarajn malkrokodilojn, ofertas matenmanĝon kontraŭ agrikultura laboro, aŭ kiu havas nur unu liton kaj do akceptas nur gastinojn. Miris pri la teksto "Ne krokodilu. Mia edzino ne parolas Esperanton." Alivorte: ne klaĉu kun mia ino!

Subite miaj okuloj ekhaltis sub la urbo Kopenhago ĉe nomo ne tre Kopenhago – Kati Kisfaludy. Ja ne povis ekzisti en Esperantio du virinoj kun tiu nomo? Sed kial do en Kopenhago!?

Du semajnojn mi bezonis por mense prepariĝi, sed fine mi klavis la telefonan numeron indikitan. Respondis virina voĉo – ĉu la ŝia? – danlingve:

"Atendu momenton..."

Sekvis paŭzo, dum kiu mi fone aŭdis la voĉon – jes, tutcerte

ĝi estas *sia* voĉo – rapide diri ion hungare, kaj infanan voĉon respondi. Kaj jen ŝi reaperis:

”Ĉe Kati.”

”Saluton! Parolas Peter... Peter Sjöstrand el Svedio...”

”Saluton, Peĉjo!” Ŝi pronancis tion *Peĉo*. Tiel ŝi kutime – antaŭ dek du jaroj – nomadis min. ”Ĉu vi estas en Kopenhago?”

”Ne, ne... Mi telefonas el Svedio... Mi trovis vin per Pasporta Servo...”

”Bone. Kiam vi volas tranokti ĉi tie? Ĉu venontan semajnfino?”

Mi konstatis, ke prepariĝi dum du semajnoj por paroli kun Kati tamen ne sufiĉis. Per du frazoj ŝi jam sukcesis konsterni min. Glutinte dufoje nenion, mi balbutis:

”Je-jes. Tio konvenas. Do... mi alvenos...”

”Ĉu vendrede vespere?”

”Nu, tio eble ne eblas. Pli bone sabate matene. Per nokta trajno.”

”Bone. Mi loĝas urbocentre. Vi povos promeni aŭ iri taksie.”

Efektive mi jam planis fari ion tute alian kun tute alia virino, sed aŭdante ŝian voĉon mi trovis neniun kaŭzon ne viziti la ĉarman ĉefurbon de Danio. Jen do la unua vojaĝo per nokta trajno trans la Sundon.

Pro kiuj nekonataj kapricoj de la sorto ŝi nun vivis en Kopenhago, mi neniam eksciis. Kvankam ŝi telefone ne diris tion eksplicite, mi deduktis, ke ŝi jam divorcis kaj vivas sola kun du infanoj.

Kati akceptis min tre amike, kaj mi apenaŭ povis imagi, ke efektive pasis dek du jaroj de niaj someraj tagoj ĉe Danubo. Sed

eĉ nun ne estis facile alproksimiĝi al ŝi. Tiu sama moka sinteno, kvazaŭ nenio vere gravus. Kvazaŭ *mi* neniel gravus. Ja mi jam eĉ tro bone konsciis, ke mi estas malgrava homo. Sed kion do ŝi volis kun mi? Ĉu nur moki?

La unuan nokton en Kopenhago mi pasigis sur matraco surplanka en la dormoĉambro de Kati. Trans iuj seĝoj kaj tablo ŝi mem sola luksis enlite. Malantaŭ fermita pordo, en la dua ĉambro, dormis la infanoj.

”Ĉu ĉio en ordo? Ĉu la matraco ne tro malmolas al vi?” ŝia voĉo flustris de la supozeble molega kaj varma lito.

Kion respondi? Kiel interpreti la demandon? Ja ĝi ŝajnis evidenta invito, tamen... Eble ŝi tiel demandas al ĉiuj gastoj per Pasporta Servo? Sur ĉi tiu matraco sendube ili ĉiuj dormas, se ne en ŝia lito. Aŭ eble ŝi estas tio, kion la knaboj en mia adoleska aĝo nomis ”logobirdo” – knabino kiu ŝatas ardigi knabon, sed poste rifuzas ĉion pluan.

Kaj ĉu ne estas io maltrankviliga pri virino, kiu iniciatas? Ŝi devus atendi la invitojn, ŝajnis al mi. Kompreneble, se temis pri invito de mi, la atendado povus iĝi longa. En ĉi tiu kazo temis pri dek du jaroj. Eble ne ĉiuj tiel pacienas.

Ĉu respondi, ke jes, la matraco maldikas? Ĉu kanti, ke *la planko duras, sed vi molas*? Tio tamen ja ŝajnus iom tro persone sentema, ĉu ne? Kvazaŭ mi estus ia reĝidino sur pizo!

Finfine mi respondis:

”Ne, ne. Nenia problemo. Mi sendube bone dormos ĉi tie.”

”Do, bonan nokton, Peĉo! Dormu dolĉe, songu sorĉel!”

Ŝia voĉo definitive havis mokan nuancon. Ĉu io alia eblus?

Longe mi kuŝis sendorma malbenante mian ŝajne malsanecan mankon de kuraĝo, aŭskultante la regulan, ŝajne senemocian dormspiradon de Kati, kvazaŭ la ronronadon de

kato post musoĉaso. Fine la dormo tamen komptis ankaŭ min kaj akceptis min en sian sinon, pli dorlotan kaj malpli defian ol tiu de virino. Kaj en la posta mateno ĉio jam ŝanĝiĝis en neklarigebla maniero. Tre facile Kati kaj mi tiam interrilatis, babilis, revokis memorojn el nia unua renkontiĝo ĉe Danubo, interŝanĝis malicajn prijuĝojn pri Esperantio, disputetis pri ĉiutagaĵoj kiel du enamiĝintoj. Kaj vespere post botelo da ruĝa vino mi preskaŭ senhezite brakumis kaj kisis ŝin, kaj tiunokte neniu el ni eĉ pensis pri la matraco de hieraŭ. Montriĝis, ke ŝia lito efektive molas, kaj ke ĝi tute sufiĉas *kaj* al ŝi, *kaj* al gasto per Pasporta Servo.

Finfine mi do venkis la nevenkeblan ĝenon. Kaj de tiam ni vivis feliĉe ĝis... Nu, ĝis kiam?



”Viroj amoras kiel ili kondukas aŭton.”

Kia komento! Sendube ŝi trovis tion amuza, sed mi ne povis vidi la humuron en tiu prijuĝo. Ĉu ŝi sciis, ke mi ne havas kondukpermeson? Mi devus rapide respondi per ia reciproka spritaĵo, sed kion do? Virinoj amoras kiel... Nu, kiel do? Mi neniam pensis tiel. Certe mi notis diferencojn, malsamajn kondutojn, sed ĉu ili rilatis al la cetera sinteno en aliaj situacioj? Neniam mi konstatis tian ligon. Eble mi ĉiam tro koncentriĝis al mia propra konduto? Kvazaŭ aŭtokondukanto, kiu ankoraŭ lernadas... Nu, cetere, ĉu malbonas eterne lernadi? Ĉu ne estus pli domaĝe, se oni jam fiksiĝus en fina neŝanĝebla kliŝo?

Mi respondis:

”Hmm. Interese. Ĉu vi jam multe aŭtis?”

Ŝi streĉis la brakojn kaj dorson kiel kontenta katino. Laŭ ŝia mieno kaj teniĝo oni ne povis kredi, ke ŝi ĵus tro malkomforte veturis. Ŝi ne rekte respondis mian demandon, sed diris:

”Mi preferas profesiajn ŝoforojn, kiuj konas la metion.”

Je diablo, kiel kompreni tion? Sendube refoje humuraĵo. Sed kiel returni ĝin? Se mi dirus ion similan pri virinoj, tio verŝajne ne estus tre simpatia ŝerco. Cetere mi sciis nenion pri profesiulinoj.

Do, mi evitis la problemon per ia nebula komento pri amatoroj kaj profesiuloj ĝenerale. Kion mi timis? Ĉu ekscii, ke ŝi efektive klopodas atingi min, tuŝi min, provoki min? Jen eble la kerno de la afero: mi neniam sciis, kiom ŝiaj vortoj koncernas ĝuste min, direktiĝas al mi specife.

Krome mi ne sentis, ke ŝi vere dediĉas sian atenton al mi. Ja ni estis kune, sed mia sento estis, ke mi ne vere gravas al ŝi. Kio gravis al ŝi? Ĉu gravis nur la impresado de persona integreco, sendependeco, kiun ŝi nepre devis fari al ĉiuj homoj?

Sendube tio estas malĵusta interpreto. Oni povus same bone supozi, ke ŝi de infanaĝo portis enorman ŝarĝon de nesufiĉa memestimo, kiun ŝi dum jaroj devis kaŝi sub masko de indiferento, memsufiĉo, nezorgo. Se tiel estis, kial mi ne povis esti tiu, kiu helpus ŝin malŝarĝiĝi de tiu balasto? Kial mi ne povus deŝiri la maskon? Vana revo. Por tia tasko mi estis multe tro nematura. Kati kaj mi estis samaĝaj, tamen je ĉiuj niaj renkontiĝoj, en la komenco, mezo kaj fino de l’ junaĝo, mi bezonus eble kroman jardekon da vivospertoj por vere serioze sieĝi ŝian fortikaĵon el ŝajnigita monduma indiferento.

Kaj tiuj blankaj haroj! Ĉiufoje, kiam mi senvestiĝis ĉe Kati, ĵetante la vestaĵojn pelmele sur seĝon, Abba venis kuŝiĝi sur ili. Eble ŝi ŝatis la odoron. Precipe plaĉis al ŝi mia ĝinzo, kaj Kati iufoje diris:

”Bone, ke vi portas ĝinzon. Sur tiu ne tre vidiĝas la haroj. Mia antaŭa amanto kutime portis malhelan pantalonon, kaj li ĉiam ege domaĝis ĝin. Li kutimis pendigi ĝin alte sur la ŝrankosupro. Kompreneble li timis, ke lia edzino trovu blankajn

harojn de Abba sur lia pantalono.”

Jen sendube necesas klarigi, ke Abba estis la katino de Kati, aŭ pli ĝuste de ŝia okjara filino Ilona. Ŝi estis enorma tutblanka monstro – tio estas la katino, ne la filino – kiu ĉie lasis harojn, kaj kvazaŭ tio ne sufiĉus, ŝi havis unu flavan kaj unu helbluan okulon. Jen la kaŭzo, ke ĉi tiuj hungaraj Kopenhagoj honoris ŝin per la sveda simbola nomo Abba.

Sed kial Kati devis paroli al mi pri sia antaŭa amanto? Ja mi neniam demandis pri li! Kaj kial krome menciis, ke li havis edzinon? Ĉu pro tio, ke ŝi ion suspektis pri mia konduto? Mi preferis ne demandi.



Du inoj samtempe. Jen la revo de ĉiu vera viro, laŭdire. Prefere ne nur du paralelaj amrilatoj, sed vere du sammomente, samlite. Oni parolas pri penisa envio de virinoj, sed ĉu ne ŝajnas, ke ankaŭ ni viroj envias... posedi duan? Por povi duoble amori. Atendante tiun korpe ĝisdatigitan version – Viro 2.0 – oni revas, kaj okaze eĉ praktikas aliajn metodojn amori samtempe kun duopo.

Ĉe mi tamen ne temis pri samlite. Eĉ ne samurbe aŭ samlande. Kaj tamen tio kaŭzis al mi egan animan malpacon. Hejme, miaurbe, mi klopodis konstrui trankvilan gevivon kun Anita. Ĉu mi amis ŝin? Mi volis ami ŝin. Mi vere faris ĉion por enamiĝi. Kaj tio ankaŭ prosperis al mi sufiĉe bone. Mi ŝatis esti kun ŝi. Postlabore tagmanĝi ĉe mi. Vekiĝinte matenmanĝi ĉe ŝi. Arbare ekskursi. Trinkeje bierumi. Bicikle manifestacii kontraŭ venenado de la medio. Dume mi vere ne multe pensis pri Kati. Preskaŭ neniom. Tre skrupule mi zorgadis ne pensi pri ŝi. Mi estis sufiĉe kontenta pri la ĉiutaga feliĉo. Preskaŭ tute kontenta.

Tamen mi rezervis lokon en la nokta trajno al Kopenhago.

Anita nenion demandis. Eble ŝi timis ekscii. Antaŭ la minaca alternativo responde ricevi vundan veron aŭ amaran mensogon, ŝi elektis nenion demandi.

Do, mi ekiris. Eĉ iom dormis sur la skuata kuŝvagona lito. Vekiĝis pro eterna ŝovado tien-reen de la vagono ĉe la pramo. Sentis leĝeran marmalsanon inter la havenoj de Helsingburgo kaj Elsinoro. Reendormiĝis ŝajne nur kvin minutojn antaŭ la alveno en Kopenhago. Ĵusvekite promenis kelkcent metrojn ĝis Brolæggerstræde, kie atendis duŝo, gelito kaj matenmanĝo, laŭ la dirita vicordo.

Poste sekvis promeno kun la infanoj, eble en la Reĝa Ĝardeno, sekvata de tagmanĝo en ĉina restoracio. Pri kio ni parolis? Ĉiutagaĵoj, pliparte. Ankoraŭ ni ne tre proksimiĝis unu al la alia. Por mi eble la hejme atendanta Anita signifis obstaklon malfermi pordon al intimaj konfidencoj kun Kati. Kaj por ŝi? Mi ne scias. Mi demandas min, ĉu eble ŝi ne volis dividi kun mi pli multe. Aŭ ne kuraĝis. Aŭ tutsimple ŝi atendis, ke mi faru la unuan paŝon.

Kiam do mi finfine komprenis, ke ne eblas tiel plui? Post nelonge, efektive. Ŝajnis al mi, ke mi longe pendoladis per tiu nokta trajno interskandinava, sed se sobre kalkuli la vojaĝojn, ĉu vere temis pri pli ol tri aŭ kvar? Ĉu pli ol kvarfoje ni promenis laŭ la gruzaj vojetoj de la Reĝa Ĝardeno? Ĉar jen la sabata rutino. Dimanĉe ni vizitadis muzeon aŭ preĝejan koncerton, parkinte la infanojn ĉe iliaj amikoj. Post la muzeo iom da vino. Post konvena kvanto da vino, jen tempo por la lito, nun en pli granda libero ol sabatmatene, kiam necesis zorgi ne embarasi la infanojn.

Jes, mi scias, kiam mi komprenis. Tio okazis, kiam mi sentis, ke malgraŭ vino, malgraŭ seninfaneco, mi enlite ne duopas kun Kati. Tute klare estis, ke ankaŭ Anita iel ĉeestas. Mi rimarkis ŝin, kaj pere de mi, sendube ankaŭ Kati sentis, ke io misas. Ĉar mi tute klare ne estis tia viro, kiu kapablas amori kun

du inoj samtempe en la lito. Eĉ ne, se unu el ili fizike troviĝas kvincent kilometrojn for. Jen la momento, kiam mi komprenis la ŝajne evidentan devon elekti. Kaj mi devis mem fari tion. Kati nenion diris, ŝajnis nenion rimarki. Ĉu ne zorgis, ĉu indiferentis? Aŭ ĉu ne kuraĝis rimarki? Mi ne scias. Mi ne kuraĝis demandi.

Sed kiel do elekti? Kiel mi eĉ kuraĝu elekti?

Ĉu eblas kompari amojn? Kiel mezuri ilin? Povas esti, ke iufoje tio eblas. Sed miaj sentoj al Kati kaj Anita ne estis intermezureblaj. Ŝajnis elekti inter tago kaj nokto, inter pano kaj kuko, inter biciklo kaj internacia trajno. Eblas ami ambaŭ, tamen ne eblas havi ambaŭ samtempe.

Do la nokta trajno al Kopenhago perdis klienton. Potenciale fidela vojaĝanto, same fidela al la danaj kiel al la svedaj fervojoj, decidis rompi la rilaton kun ili. Dum kelka tempo poste mi investis miajn emociojn en perbicikla amo. Ja biciklante mi ne povis legi, promeni aŭ viziti restoracian vagonon, tamen tio ne tre gravis. La horaro ĉiuokaze estis favora.

– ... *Mi survojas hejmen de festeno, irante per aŭtobuso. La buso iras laŭ granda urba aleo. Kunvojaĝanto atentigas, ke kato transiras la straton. Tra la fenestro dekstre mi vidas neniun katon, sed infano ekiras sur la straton tuj antaŭ la buso, tiel ke la ŝoforo devas bremsi ĝin. Post nelonge tri junulinoj oblikve transiras la straton, devigante la ŝoforon denove bremsi kaj ŝanĝi koridoron. Pli fore maljuna paro trankvile promenas surstrate, kaj la buso devas tre malrapide preterpasi ilin kun du radoj sur la trotuaro. La ŝoforo demandas sin, kiaj homoj estas tiuj. Mi sidas plej antaŭe dekstre kaj respondas, ke ili aspektas kiel homoj venintaj de iu festivalo. Kiam ni atingas ponton trans riveron, mi vidas, ke vere okazas festivalo aŭ surstrata festeno. Aspektas kiel antaŭkristnaska foiro kun amaso da vendo-budoj.*

La buso turniĝas kaj ĉirkaŭiras la festivalejon. Apudrivere mi vidas lokon, kie aro da kandeloj lumas en la nokto. Iu diras ion pri memorparko por la mortintoj de la ŝipo Estonia kaj por Olof Palme. Poste la voĉo diras: "Ili pli kaj pli multiĝas." Mi ekvidas memorŝtonon kun ĉizitaj nomoj de viktimoj. Plimultiĝas tiuj nomoj senĉese.

Ni jam alvenis urbocentre kaj forlasas la buson. Apud mi staras Kristina, kiu ŝanĝos buslinion ĉi tie. Ŝi montras al aro da belaj, imponaj, malnovaj domoj en diversaj strangaj stiloj trans larĝa akvo, dirante: "Imagu, ke iam situis banejo ĉi tie." Ŝi montras al iu domo dirante: "Jen la iama bandomo." Mi kontraŭas: "Ne, estas tiu kun la blanka kupolo." Ŝi diras: "Ĝi similas preĝejon." Mi memoras, ke vizitante la banejon, mi kutimis ĉiam komenci per salto de plej alte sub la kupolo, suben en la naĝbasenon. Mi tre malĝojas, ke la domo nun estas for, malkonstruita. Mi kolapsas sur la teron, plorante pro ĉio bona kaj bela, kio iam ekzistis, kaj kion mi neniam rehavos. Mi kuŝas surtere, malhelpante al ĉiuj homoj preterpasi, kaj singultas pro la malaperinta bandomo kaj ĉio alia.

Subite mi sentas, ke mia kapo efektive ne kliniĝas al la tero, sed kontraŭ la malvarma fenestrolaco de aŭtobuso, survoje hejmen de vizito al Marja. La akvogutoj sur mia vango do ne estas larmoj, sed kondensaĵo de la fenestro, ĉu? La sento de malĝojo pro ĉio perdita tamen restas, kvankam mi tuj ekkonscias, ke tio estis nura sonĝo. Stranga sonĝo! Kial Kristina jen entrudiĝis? Kaj Olof Palme? Kaj tiu bandomo, kiu ŝajnis tute reala, kvankam ĝi estis nur memoro. Imagita memoro en sonĝo! Ĉu io povas esti pli malreala ol tio? Ĝi similis nenion en mia vera vivo, kaj tamen mi ankoraŭ bedaŭras ĝin! La homa cerbo estas vere stranga teksaĵo, eĉ pli stranga ol la tekstitaj tukoj kaj tapiŝoj de Marja.

Kaj kial aperas la perejo de Estonia en mia sonĝo? Ĝi ja okazis antaŭ deko da jaroj, kaj mi konis neniun el la pereintoj. Nu, eble tamen... Ja estis iu esperantisto, kiu vojaĝis inter Estonio kaj Svedio. Sed kial tiu afero nun revenas? Jam de jaroj mi ne pensis pri tiu katastrofo! Kaj kion signifas, ke la viktimoj plimultiĝas? Ĉu eble tion, ke mi mem ĵus grundis kaj nun subakviĝas?

Ekster la buso, la reala buso, ĉio nigras. Neniuj kandeloj lumigas la realan nokton. Nur de temp' al tempo lumfasko de renkontata aŭto sur la ŝoseo. Oni povus facile imagi, ke ekzistas nur ĉi tiu vojo, ĉi tiu mallarĝa kurba linio tra la senluma universo. Kia linio ĝi estas? Ĉu mia vivovojo? Ĉu la vojo tien-reen, laŭ kiu mi pro ia malbeno devas eterne pendoli? Mi gvatas en la mallumon. Jen vidiĝas vojtabulo. Kion ĝi diras? Aha. Avertu pri mallarĝigonta ŝoseo... –

12. Librojn legu la verkisto

”Iu diris min, ke vi skribas librojn. Ĉu tio estas vere?”

”Nu, jes, mi iomete verkas.”

”Bonege, bonege! Estas tre bona, ke eksistas librojn en Esperanto, ĉar tiam oni komprenas, ke ĝi estas tre bona afero!”

”Eble. Ĉu vi eventuale ŝatus aĉeti iun el miaj verkoj?”

”Bedaŭrinde mi ĝuste nun tre mankas tempon. Sed vi devas multe pli fari reklamon por viaj libroj. Se la homoj komprenas, ke Esperanto estas facila lingvo, kio ĉiuj povas lerni, vi povas vendi multaj, multaj...”

”Aha. Kaj kiajn librojn vi mem preferas legi?”

”Fakte nuntempe ne tre multe. Sed kiam mi lernis Esperanton, kvindek jaroj antaŭe, mi legis La Verda Koro. De Julio Baghy. Tre bona esperantisto.”

”Jes, vi sendube pravas pri tio.”

”Ĉu vi konas ĉi tiun version de Baghy: *Verda stelo sur la brusto iom pala pro la rusto; mi ne estas purigisto, sed mi estas esperantisto*. Tre amusa!”

”Jes, mi konas. Ĝi estas sufiĉe amuza. *Librojn legu la verkisto; estas mi esperantisto!*”

”Ha ha ha! Jes, jes, tre amusa! Julio Baghy estis tre bona esperantisto!”



Estis nenio aparta pri tiu Esperanto-aranĝo. Ĝi sendube similis mil pli fruajn diversloke tra la mondo, de Bulonjo-ĉe-marĝo ĝis

Adelajdo. Oni aplaŭdis tedajn prelegojn, oni kantis *En la mondon venis kaj Esperanto estas la lingvo por ni por ni*, kaj oni diskutis kiel antaŭenigi nian karan lingvon. Ĉio estis kiel kutime, kiel rutine. Ĉion kaj ĉiujn oni rekonis, nenio estis nova aŭ timiga, ĉio estis bone konata kaj sekura. Kaj fine oni disiris, ĉiu al sia normala vivo.

Poste mi eĉ ne sciis, kial mi entute vojaĝis plurajn horojn por partopreni en tiu renkontiĝo. Kion mi antaŭe esperis? Kaj pri kio mi efektive elreviĝis? Ja mi delonge sciis, kion mi renkontos. Homojn iom malpraktikajn, kiuj ne plene mastras la vivon en moderna socio. Naivulojn kun iom fiksjaj ideoj. Revulojn. Preskaŭ ĉiuj do sufiĉe similaj al mi mem. Pluraj el ili cetere estos tre simpatiaj. Aliaj lasos min relative indiferenta, kaj esceptokaze mi eble trafos iun veran fiulon. Tia ja estas la homaro. Ĉi tie mi ĉiuokaze evitos homojn danĝerajn, potenculojn, homojn kiuj marŝas antaŭen sur kadavroj. Esperantistoj estas bonuloj, almenaŭ en tiu senco, ke ili tre malofte kaŭzas grandan katastrofon aŭ plenumas agojn vere malbonajn. Ankaŭ ne la malon, cetere. Entute sendanĝeraj, malefikaj ventkapuloj. Proksimume kiel mi.

Kio eble ĝenas min plej multe, estas la persistemo de ilia supozo, ke ĉiuj aliaj esperantoparolantoj devus kundividi la samajn bizarajn ideojn. Nu, kelkaj opinioj vere estas sufiĉe disvastigitaj. Ke ĉia uzado de Esperanto bonas. Ke ĉia uzado de la angla lingvo malbonas, almenaŭ internacie. Prefere tute ne komuniki, ol komuniki angle. Ke pli facilas kompreni mizeran Esperanton ol bonegan nacian lingvon. Ke ni estas la saĝaj esceptuloj, dum la tuta cetera mondo frenezas. Ke ĉion, kion iu faras en Esperanto, li aŭ ŝi nepre faras nur por utili al nia kara lingvo – negrave ĉu temas pri verki romanon aŭ krei insultojn al ano de alia lingva skolo.

Mi eble estis la sola en ĉi tiu Esperanto-aranĝo, kiu ne konsentis kun tiuj aksiomoj. Kaj same sola mi sentis min, kiam

temis pri la ĉiama deziro varbi novajn anojn. Ja mi tute ne volas varbi. Ja mi dubas pri la valoro varbi iun ajn al io ajn! Kaj ĉiuokaze mi persone absolute senkapblas iel ajn varbi.

Nu, ĉion ĉi mi ja sciis jam longe antaŭ ĉi tiu kunveno. Kio do nun aparte elĉerpis mian paciencon?

Kredeble estis tiu diskuto. La temo estis... Nu, kio ĝi estis? Ĉu *Esperanto kiel pacportanto en nova jarmilo*? Aŭ ĉu *Esperanto por nova Eŭropa identeco*? Aŭ ĉu *Esperanto en la...*

Efektive ne gravas. La titolo ne influis la realan diskutadon pli multe ol balotkampanja promeso influas la realan politikan praktikon. Oni pli kaj pli profunde fosis siajn sulkojn jam delonge fositajn. Oni semis kaj semis konstante. Duono el la parolantoj proponis, ke oni konvinku la aŭtoritatojn, amaskomunikilojn, lernejestrojn aŭ direktorojn de ŝufabrikoj enkonduki Esperanton, permesi uzadon de Esperanto aŭ almenaŭ diri ion favoran pri Esperanto. La alia duono aŭguris gloran estontecon al Esperanto, se la esperantistoj nur revenus al la Fundamenta radikaro, enkondukus la sufikson *-iĉ-* aŭ forigus la supersignojn. La diskutado daŭris longe, la salono estis nesufiĉe aerumita, la murmurado maŝinenue monotonis...

Miaj pensoj komencis vagi. Mi ekpensis pri kelkaj el la esperantistoj, kiujn mi dum la paso de jaroj renkontis. Multajn strangulojn mi vane klopodis eviti, tamen nun mi ne pensis pri la evidentaj ĝenuloj, sed pri la ŝajne normalaj, eĉ simpatiaj, kiuj tamen ofte kondutas iel maldelikate. Homoj, kiuj jaron post jaro klopodadas konvinki – ne la eksterulojn, sed aliajn esperantistojn – pri la boneco de Esperanto. Kial? Ĉu efektive sin mem ili vane provas konvinkadi? Mi pensis pri tiuj, kiuj regurdas la facilecon de Esperanto, sed dum kvindeko da jaroj ne sukcesis atingi eĉ mezan nivelon de tiu facila lingvo. Pri la kongresanoj, kiuj gaje kaj amike babilas kun alilandaj esperantistoj, tiel konsumataj de siaj propraj diroj, ke ili eĉ ne rimarkas la senĉesajn miskomprenojn inter si. Kaj poste ili

proponas tiun lingvon kiel universalan komunikilon en diplomatio kaj aviada trafiko! Timiga perspektivo! Ja eĉ sen tio jam okazas tro da internaciaj konfliktoj kaj aviadilaj akcidentoj. Mi pensis pri tiu stranga malĝentileco, tiu manko de kapablo socie glate interrilati, kiun mi tiel ofte renkontis ĉe esperantistoj. Kiomfoje oni petis de mi servon, kiun mi per iom da laboro plenumis, kaj poste mi eĉ ne rikoltis simplan ”dankon”? Kiomfoje mi mem petis informon, ricevante nenian, eĉ ne nean, respondon? Kiom da internaciaj respondkuponoj – ĝuste stampitaj – akaparitis de mi la fama delegita reto, ne respondante al miaj leteraj demandoj?

Ĉu povas esti tiel, ke esperantistoj suferas pro ia psika manko de kapablo komuniki kaj interrilati, sed tiun mankon ili ne konscias ĉe si mem, sed male atribuas al la ĉirkaŭa mondo? Ĉu pro tiu miskompreno ili volas oferti al la mondo ne nur ”la mondan lingvo-problemon”, pri kiu la mondo eĉ nenion konscias, sed krome perfektan solvon de tiu imagita problemo? Ĉu eble ankaŭ mi mem suferas pro simila psika manko, vidante ĝin nur ĉe la aliaj esperantistoj, neniam ĉe mi mem? Ĉu...

Mi vekigis pro tio ke la najbaro, la emerita dommastrino Elsa Bestow perdis sian kapon sur mian ŝultron. Dum terura momento mi ne sciis, kie mi troviĝas, kaj kredis ke la sinjorino ĉe mia maldekstra flanko estas mortinta. Ĉu murdo en Esperantujo? Ne, preskaŭ tuj mi rekonis la ejon, la diskuton kaj la profundan dormspiradon de sinjorino Bestow. Krome mi memoris, ke dum mia propra dormeto, kiu eble daŭris nur minuton, mi spertis songon. Mi songis, ke mi sidas manĝante kun aliaj homoj ĉe longa tablo. Alvenis Spomenka Ŝtimec kaj sidiĝis apud mi. Ni interparolis pri literaturo en Esperanto. Ŝi diris, ke oni devus verki por tiuj, kiuj ne tre bone scias Esperanton. Ĉe mia dekstra flanko tiam ekparolis Giorgio Silfer, dirante ke ĝuste mi ĵus faris grandiozan laboron en tiu kampo. Spomenka rigardis min sen kompreni, do mi devis klarigi, ke

temas pri kelkaj humuraj rakontetoj, kiujn mi facilige tradukis el la dana lingvo. Tio tamen tute ne interesis Spomenkan, kaj ŝi foriris. Subite mi sentis, ke mi freneze amas ŝin, do mi postkuris ŝian foriĝantan postaĵon, bedaŭrinde vane.

Stranga sonĝo! Kial mia kompatinda cerbo sen mia scio aŭ permeso okupiĝis pri tiuj du famuloj? Mi cerbumis. Kion mi volis diri al mi mem uzante ilin kiel mesaĝistojn? Ili ambaŭ ja okupiĝas pri literaturo sed ankaŭ pri Esperanto-movada laboro, dum mi nur diletantas pri la literaturo kaj tute ne aktivigas movade. Ĉu mia subkonscio opiniis, ke ankaŭ mi devus iĝi movadulo? Sed tio ja ne eblas! Mi eĉ ne unu tagon eltenus tion. Ja mi entute ne simpatias al la ideoj de la esperantismo. Ha, jen do! Jen kion la sonĝo celis montri al mi. Mi okupiĝas pri literaturo en Esperanto, kvankam mi ne estas vera esperantisto! Mi portas en mia memo bazan kontraŭdiron. Similas mi monaĥon sen dio, politikiston sen partio aŭ Hamleton sen kranio!

Tiu sonĝo tamen ne ekbatis el klara ĉielo. Jam delonge mi suferis pro regulaj atakoj de malsamideaneco. En ĉiu laŭvica Esperanto-renkontiĝo mi pensis ”jen la lasta”. Ĉiufoje, trovante Esperantogazeton en mia leterkesto, mi sopiris al la jarfino, kiam mi povos ne reboni. Sed pri Esperanto-gazetoj oni neniam scias, kiam ne reboni, pro la ĉiamaj malfruiĝoj.

La sonĝo tamen konvinkis min, ke jam temp’ está malfosi mian sulkon. Mi kabeiĝis. Kaj poste mi atendis. Atendis. Kaj atendadis. Nenio okazis. Neniu delegacioj vizitis min por petegi min reveni al la verda rondo familia. La Esperantogazetoj silentis. Ĉu ili konspiris por cenzuri la veron? La sola reago venis de mia samklubano Andreo, kiu minace skuis Plenán Ilustritan Vortaron antaŭ mia nazo, kvazaŭ li volus mortigi min per unu bato, dirante:

”Oni ne kabeiĝas! Laŭ PIV oni kabeas! Lernu la lingvon, stultulo! Vi ne povas forlasi ĝin, se vi ankoraŭ eĉ ne scias paroli ĝin!”

Do, mi kabeis. Sed eĉ tio vekis neniajn reagojn. Tiam mi decidis enigi anonceton en Heroldo. Mi sidiĝis por ellabori ĝin. "KABEIĜO". Aŭ ĉu necesas diri "KABEO"? Stulte. En Esperantio oni eĉ ne povas ekŝiĝi sen trafi en lingvan disputon. La skolo de kabeantoj furioze kondamnas la kabeiĝantojn, kaj reciproke.

Eble mi skribu "MI KABEAS". Aŭ eble pli precize "MI KABEIS". Sed tiam oni sendube demandos, kiel mi povas anonceti en Heroldo, se mi jam kabeis. Ĉiuj homoj anoncantaj en Heroldo, sendepende de la celo, ja estas esperantistoj laŭ la Bulonja deklaro. Aŭ eble nun jam laŭ la manifesto de Raŭmo. Do, "MI KABEOS". Sed kiam? Nu, bone, mi aldonos daton. "Ekde la 1-a de oktobro mi kabeos. Post 50 esperantaj jaroj mi jam finesperis. Mi solene rezignas ĉiujn rajtojn kaj devojn de esperantisto kaj promesas neniam plu..." Nu, tio tamen eble estas tro forta. "...promesas ĝisplue ne paroli Esperanton. (Almenaŭ ne maldormante. Pri miaj sonĝoj mi ne povas garantii.) Esperante, ke mia decido estos respektata, mi salutas ĉiujn ekssamideanojn. Ĝis la fina venko!"

Mia ĉefa problemo estis sub kiun rubrikon en Heroldo mi enigu la anonceton. Ĉu eble sub *Ni kondolencas kaj funebras?* "En oktobro forlasis nin, post longa malesperado, en sia plej bona aĝo, postlasante filon kaj du orfajn biciklojn, la konata..." Nu, tio ŝajnas iom malmodesta. "...la ne sufiĉe konata paca batalanto..."

Ne. La tuta ideo pri kabea anonceto evidente estis stultaĵo. Se oni kabeas, oni kabeu ankaŭ de anoncetoj.

Do, mi silente forlasis Esperantion, tamen gazetoj ja daŭre faladis en mian leterkeston. Kaj la Esperanta mondo ŝajnis pluvivi feliĉe sen mi. Ŝajne ĝi eĉ ne rimarkis, ke mi mankas. Tio, mi konfesas, estis sufiĉe amara sperto. Sendube mi eĉ preferus, se oni aplaŭdis mian eliron. Se oni gratulus sin pro tio, ke oni finfine liberiĝis de tiu kibica tedulo. Tio ja almenaŭ estus ia

reago. Sed nun – nenio. Ŝajne mi neniam ekzistis. Plej aĉe estis, ke mi povis dividi tiun sperton kun nenio. Aliaj elmigrintoj havas siajn societojn, kie ili renkontiĝas, babilas en sia origina lingvo, kantas la popolkantojn de sia hejmlando, trinkas vinon el la amata hejma tero, dancas la tradiciajn dancojn, portas la naciajn kostumojn. Sed ni kabeintoj havas nenion. Aliaj rifuĝantoj povas revii pri sia lando, eĉ malamante ĝian reĝimon, kaj plani la nacian liberigon. Sed ni, rifuĝintoj el Esperantio, eĉ ne konas unu la alian!

Jen do mia tasko! Mi devas fondi asocion. *Federacio de Esperantaj Kabeintoj*. Aŭ eble alia nomo pli konvenus. *Federacio Internacia de Kabe...* Nu, la nomo ne gravas. Ni fondu fakan asocion, se eble en konsultaj rilatoj kun UEA, kaj kompreneble ni havu nian gazeton – La Paliĝinta Stelo. Ni organizos renkontiĝojn kie ni prezentos prelegojn kun diapozitivaj, dancos la *Bamba'n*, kantos *Esperanto estis la lingvo por ni por ni*, kaj...

Sed kiel mi trovu la estontajn anojn de tiu FEK aŭ FIK aŭ kiel ajn ĝi nomiĝos? Kredeble ne utilis enigi anonceton en Heroldo. Eble se oni povus atingi la membroregistron de UEA por vidi, kiuj ne realiĝis – tio estas: kiuj ne re-al-iĝis. Sed kiel sukcesi pri tio? Kredeble UEA ne volonte lasos al mi tiajn informojn. Mi funde cerbumis pri ĉi tiu problemo, sed la sola solvo, kiun mi trovis, estis volontuli en la Centra Oficejo de Roterdamo. Sed tio signifus, ke mi devas tuj malkabei, eĉ antaŭ ol oni rimarkos, ke mi kabeis. Tio tamen ne tre plaĉis al mi, kaj pro tio la tuta grandioza projekto de kabea organizo velkis, kaj mi devis plu-kabei en plena soleco.

– ... Oj! Ĉu mi denove endormiĝis? Kie ni estas? Ĉie estas nigre kiel en la fektruo de kamenpurigisto. Kvarono post la oka. Restas preskaŭ duono de la vojo. Do ni devas esti ie inter... Baf! Inter unu piceo kaj alia en la nigrejo. Ha, jes, tie briletas iu lumo. Iuj loĝas tie. Kompatinduloj. Aŭ eble nur somerdometo kun aŭtomata horloĝe regata lampo por fortimigi la ŝtelistojn. Mi dubas ĉu iu ŝtelisto kuraĝus iri ĉi tiel longe for. Ha! Tiun vojmontrilon mi rekonas. Gråkärhythm 6 km. Ĉu ne proksime de ĉi tie kutime komenciĝas tre kurboriĉa parto de la vojo?

Ĉi tio estas la plej aĉa parto de la vojaĝado – la vojo hejmen. Veturi al ŝi estas agrable, ekiri reen estas en ordo, alveni hejmen signifas ripozon, sed ĉi tiu longa vojo reen estas torturo. Kial ĉi tiu buso devas tiel limaki? La pensoj nun flugas malpacience, senripoze, sencele kiel vespoj. Kaj same neblas forviŝi ilin. Kion do signifas ŝiaj vortoj? Kion ŝi volas kun mi? Kaj kion mi volas kun ŝi? Eble ŝi pravas, ke ni devas iom pripensadi. Sed ĉu indas pensi, kiam la pensoj tiel kapricas kaj kapriolas? Nu, ni vidu venontfoje. Venontfoje estos pli bone.

Mi ne komprenas, kial ĉi tiu busŝoforo tiel flegme trenadas nin antaŭen. Ĉu li timas alveni tro frue? Stultaĵo! Per ĉi tiu rapideco la vojaĝo ja daŭros eterne...

Ĉu mi tro malpacienas? Ne! Certe ne! Male, eĉ, mi jam delonge laciĝis de ĉi tiu senfina ĉasado al io nova, io pli bona. Al io nova, io pli bona... Cetere, mi neniam ĉasadis iun novan. Preskaŭ neniam. Kutime ja ili forlasis min, kaj nur tiam mi komencis serĉi iun alian. Novulinon. Do ne mi malpacienas, sed ili! Ne estis mi, kiu ne eltenis, sed ili, kiuj ne eltenis min! Ĉu mi vere estas tia ĝenulo? Aŭ ĉu mi ne sufiĉe luktis? Ĉu mi tro frue kaj tro facile cedis?

Nu, ĉi-foje mi tamen eltenos, kaj mi ne cedos. Ja mi montris tion, ĉu ne, kun tiu ŝia poeto. Nu... Ĉiokaze, mi intencis tion

montri. Ja mi ne povis scii, ke li... Ĉi-foje mi tamen luktos. Mi ne cedos, ne lasos ŝin. Ŝi bezonas pripensi. Bone, do, ŝi pensu. Sed mi montros al ŝi, ke mi ne cedos. Mi ne forlasos ŝin. Ĉi-foje mi paciencie eltenos...

Se nur ĉi tiu buso iam atingos ien. Diable, kiel malrapide ni nun iras. Mi neniam hejmenvenos. Kio baras? Ia antikva skarabo, kiu misvagas sur la ŝoseon. Sendube kun maljunulo ĉe la stirilo. Tremmana, miopa kiel talpo. Sed kion do atendas la ŝoforo? Preteriru, je kukolo! Nu, finfine li akcelas. Post horo, aŭ iom pli ol horo mi... Ne, ne! La kamiono! Ĉi tio ne... Dekstren! Deks... –

13. Dis!

Hiacintoj! Mi abomenas hiacintojn! Kaj plej aĉa el ĉio estas *blankaj* hiacintoj. Kiu kreteno altrenis ĉi tien blankajn hiacintojn? Kia loko estas ĉi tio, cetere? Ne diru, ke... Jes ja, certe estas. Mi devus kompreni tion. Mi devintus iam skribi testamenton. Kvankam, ĉu tio helpus? Dube. Kiel mi povu nun efektiviĝi miajn decidojn? Ili faros laŭplaĉe. Tion ili cetere ĉiam faradis. Do, kion atendi, krom la kremaciejo? Plej facila kaj malmultekosta. Higiena kaj praktika. Kaj poste mi sendube povas antaŭvidi la memoran valetan. Racia kaj bona. Al infero! Ne, ne... Ne tiel. Ne en laŭlitera senco. Mi ne kredas je tiaj aferoj. Ne kredis. Cetere, kion mi faraĉas ĉi tie? Ja mi ne kredas je ĉi tio! Senmorta animo. Transa vivo. Renaskiĝo. Fantomoj kaj mil diabloj. Devas esti iluzio. Kredeble ĉi tio estas nura halucino en la morto-momento. Ja mi ĉiam aŭdis, ke tiam la tuta vivo revuas. Sed ĉi tio estas vere teda revuo. Mi preferus ŝanĝi kanalon, sed kie trovi la teleregilon?

Morto-momento. Kio efektive okazis? Ne diru, ke tiu idiota ŝoforo provis preteriri la skarabon! En plena mallumo! Sur tiu mallarĝa, kurba ŝoseo! Kie veturadas tiaj lignotrunkaj transportkamionoj! Frenezulo! Mi esperas ke li... Jes, kredeble li elflugis apud mi. Mi memoras, ke mi ĵetiĝis kiel obuso tra la frontglaco. Sed mi neniam surteriĝis. Nu... sendube mi ie kaj iam surteriĝis. Sed tiam mi ne plu ĉeestis...

Mi scivolos, ĉu mia korpo estis tre damaĝita. Nu, kompreneble ĝi estis, sed ĉu tio multe vidiĝas laŭ la ekstera aperaĵo? Ja ne gravas, efektive. Ĉe ni oni ja ne elmontras la kadavron en malfermita ĉerko. Tamen, mi preferus aspekti iom bonorde. En unu peco, se tiel diri.

Nun alvenas iuj homoj. La funebrantoj, kompreneble. Jen Erik. Do li tamen alveturis. La knabego! Mi sentas kvazaŭ...

sentiĝas iel strange. Kvazaŭ miaj okuloj larmus. Tio ja ne eblas. Mi estas mortinta. Bravaj mortintoj ne ploras. Kiu staras apud li? Ĉu lia lasta koramikino? Ĝis nun lasta... Sendube ŝi estas la eta anserino, kiu altrenis hiacintojn. Tute laŭ la normala konduto de tiaj anemiaj virinetoj. Nepojn ili ne kapablas elŝuti, sed hiacintojn ili alportaĉas, tute kontraŭ la lasta volo de la forpasinto!

Sed kie estas mia... Ĉu ŝi ne alvenis? Ja estas iom longa vojaĝo, tamen... Eble ŝi ne volas iri per tiu aŭtobuso? Nu, tion mi povas kompreni. Kun tiaj ŝoforoj. Mi mem intencas neniam plu iri per ĝi! Ha, tamen! Jen ŝi alvenas, iomete malfrue, kiel kutime. Efektive ŝi iom ŝanceliĝas paŝante. Ĉu pro mi? Sed kiu viraĉo nun apogas ŝin? Ne diru, ke... Diable! La poeto! La bonulo Ragnar, el trans la lago. Nu, kiam kato promenas... Aĉ! Tiel ŝi tamen ne devus duonsveni, ke ŝi pli-malpli kuŝas en liaj brakoj!

Kaj kia ulo estas tiu? Ne... ne... Jes. Mi rekonas lin. Kaj la insignon, kiu iom palas pro la rusto. Diable! Mi devintus verki testamenton! Ja devas esti eraro! Li misvenis. Ja mi ne estas ano. Ne *estis* ano. Mi delonge kabeis. Ĉu vere prezidanto de Esperanto-societo rajtas entombigi malsamideanojn? Mi devas protesti. Ĉu ne eblas ie apelacii? Peti arbitracion? Ne. Li ŝajnigas nenion rimarki. Cetere neniu iam ajn zorgis, kion mi pensas kaj opinias.

Nun li eĉ ekparolas. Kion tia ulo volas diri? Li parolas pri mi. Ne diru, ke li priplukis miajn amikojn je tiklaj detaloj! Ne, kompreneble ne. Ja ĉi tio ne estas geedziĝo. Cetere mi ne havis amikojn. Kion li nun diris? ”Malkvieta homo. Fine rajtas ripozi”? Jen la plej stulta, kion mi iam aŭdis. Tipa projekcio, laŭ Freud. Se li nur scius, kiom da tempo mi pasigis nenifarante. Mi vere ne trokonsumis la korpon. Nek la spiriton. Ripozu? La vero estas, ke mi neniam antaŭe tiel maltrankvilis, kiel nun!

Kion? ”Grave kontribuis al la homa interkompreniĝo”? Nun

tiu finvenkulo evidente trovis eraran helpslipon. Ja mi neniam vere komprenis aliajn homojn, kaj ĉiam sentis, ke komprenas min neni. Nek mi mem, cetere. Efektive mi ne komprenas tiajn naivajn hipokritulojn, kaj je mil diabloj mi eĉ ne *volas*... Ne, nun mi devas iomete trankviliĝi. Ne estas bone tiel ekscitiĝi. Tio eble havos fatalan finon. Tio eble *havis* fatalan finon.

Nun mi klopodos iom ripozi. Mi lasu ilin babili sensencaĵojn. Kiom tio gravos post jarcento? Kiom tio *nun* gravas? Ili babilu kaj kantu. Ne ĝenos, eĉ se ili iomete ploros. Sed plej multe mi preferus, se ili pensus pri mi dum gaja ridego. Ĉu ne? Do, tamen eta silenta rideto, eble? Aha. Ankaŭ ne. Bone, mi komprenas. Sendube sufiĉas al ili la propraj aferoj. Amortizoj kaj geedziĝaj problemoj. Aŭtopaneo kaj impotento. Restas tro multe da monato je la fino de la salajro. Kaj kiel mustardo post la manĝo venos fakturo de la funebra firmao. Tiam facilas ne ridi.

Ne, nun ĉio ĉi jam komencas tedi min. Pri kio nun babilas tiu ulo? "El la tero"? Fek! Se li almenaŭ dirus "el la akvo"! Vi revenos en la akvon, el kiu vi estas prenita. Jen mia aspiro. Sed ili ne intencas demandi pri tiu. Kial ili farus tion? Neniu demandis pri mia opinio de post... nu, de post kiam? Mi ne memoras. Ĉu entute iu demandis, ĉu mi origine volis surteriĝi ĉi tien? Ne, reveni en la akvon ne efektiviĝos. Fajron ili planis. Sed mi ne toleras varmon!! Kial ne almenaŭ frostigi min? Ne, tute ne. Iom da seka, varmega cindro mi estiĝos. Oportuna kaj facile traktebla. Kaj jen oni ĵetos la cindron for sub iun herbotufon, kaj poste platigos perpiede. Dis! Eks! La urnon oni iom lavos por reuzi alifoje. Avaruloj!

Nun sendube jam venas la lasta punkto de la tagordo. Solena fermo. Ne, male – solena malfermo de la forna klapo. Jen ili enŝovas min. Al infero, kia varmego! Akvon! Nur guton da akvo, mi petas...

Glosaro

En la suba glosaro aperas ne-PIVaj vortoj (kaj signifoj) aperantaj en ĉi tiu libro, kune kun aro da vortoj troveblaj en PIV aŭ foje eĉ en Plena Vortaro, kies signifo tamen povas esti ne vaste konata. Ĉe la fontindikoj mi ofte notis nur la plej ”gravan”, do se iu vorto aperas en PIV aŭ PV, mi kutime ne notis krome, ke ĝi troviĝas ankaŭ en aliaj vortaroj. La ĉi-subaj difinoj ne laŭvorte paŭzas la koncernajn vortarojn.

PV Plena Vortaro, 1934.

PIV Plena Ilustrita Vortaro, 1981.

PIV-S Suplemento de PIV, 1987.

z Zamenhofa.

* Oficiala

AC André Cherpillod: NePIVaj vortoj, 1988.

EDK Erich-Dieter Krause: Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 1999.

EV Ebbe Vilborg: Ordbok Svenska-Esperanto, 1992.

HV Henri Vatré: Neologisma Glosaro, 1989.

JL Jouko Lindstedt: Hejma Vortaro, 1999.

JLG Sam Owen Jansson, Fritz Lindén, Birger Gerdman: Svensk-Esperantisk ordbok, 1934.

RC Renato Corsetti: Knedu min, sinjorino.

WP Wouter Pilger: Provizora Privata Listo de komunlingvaj nomoj de plantoj de nord-okcidenta Eŭropo, 1982.

Alando ^{EDK EV JLG}	(<i>Åland</i>) Aŭtonomia insularo inter Finnlando kaj Svedio
alternativo *	1) ^{PIV} Necesa elekto inter du ebloj 2) Unu el du aŭ pluraj ebloj
amnia membrano ^{PIV}	Membrano ĉirkaŭanta la feton en la utero
anheli ^{PV}	Spiregi
baf ^{RC}	Interjekcio por esprimi malkontentan rezignacion
bi-bio	(Infanlingvaĵe) Birdeto
bonifiko ^{PIV}	Ekstra gajno krom la normala
bovsango el Eger	Hungara ruĝa vino

bradipo ^{PIV z}	<i>Bradypus</i> Malrapidega pende arbogrimpanta mamulo
Canal Grande cezara operacio ^{PIV}	Ĉefkanalo en Venecio Eligo de infano per tranĉo de la patrino ventro kaj utero
despero ^{AC HV} dilui ^{PV} diskanto ^{PIV} dompasero ^{PIV} doso ^{AC}	Malesperego Maldensigi per likvaĵo Altfrekvenca tono <i>Passer domesticus</i> Griza birdeto Cilindra metalskatolo, precipe por trinkaĵo aŭ manĝaĵo
dura ^{PIV} ekzogamio ^{PIV} Elsinoro ^{PIV z}	Malmola Geedziĝado ekster la propra grupo (<i>Helsinggr</i>) Dana urbo norde de Kopenhago
endogamio ^{PIV} Esperantio espreso ^{PIV-S}	Geedziĝado en la propra grupo Esperantujo ^{PIV} Forta kafo, preparita per varmega akvo sub premo
está fadi ^{PV} feta akvo filero ^{EDK AC HV} forfikiĝi ^{RC} fragila ^{PIV} gefilo geja ^{AC EDK EV} Gotenburgo ^{EDK EV JLG}	(Praesperante) Estas Malfortiĝi kaj malaperi Amnia likvaĵo Centono de hungara forinto (Slange, sakre) Foriri Malfortika, facile rompebla Filo aŭ filino Samseksama (<i>Göteborg</i>) Havenurbo en sudokcidenta Svedio
gvati ^{PIV} ĝii ĝinzo ^{JL} hasti ^{PIV} Helsingburgo	Kaŝe, atende observi Priparoli ion/iun per <i>ĝi</i> Pantalono el drelika ŝtofo Rapidigi sin (<i>Helsingborg</i>) Havenurbo en suda

	Svedio
hidrooptero	Motorsledo pelata de aera helico, veturpova sur glacio kaj akvo
hipio ^{PIV-S}	Iam alternative vivanta junulo en la 1960aj jaroj
humida ^{PIV *}	Malseketa
-iĉ-	Iam proponita sufikso kun signifo: virseksa
iglo ^{PIV}	Kupolforma kabano el neĝblokoj
iksodo ^{PIV}	<i>Ixodes</i> Sango-suĉanta insekto
intui ^{PIV}	Intuicie senti
itinero ^{PIV}	Vojo inter elirpunkto kaj celo
kabei ^{PIV}	Subite forlasi Esperanton
kaco ^{PIV}	(Triviale) Penis
kafeterio ^{PIV}	Memserva restoracio
kanalo ^{JL}	Televida aŭ radia programaro dissendata per certa frekvenco (^{PIV} = tiu frekvenco mem)
kasedilo ^{JL}	Aparato por aŭdigi sonkasedojn
kibico ^{PIV}	Neinvitito, ĝena sintrudulo
kolao ^{JL}	Bruna gastrinkaĵo kun ekstrakto el kolanuksoj
komentari ^{PV}	Komentarii
Kopakabano	Fama plaĝo en Riodejaneiro
kramfo ^{PV}	Spasma kuntiriĝo de muskolo
kriketo ^{PIV}	Brita ludo per pilko kaj plataj lignaj frapiloj
kuglofloro ^{WP}	<i>Trollius europaeus</i> Trolio ^{PIV} Flava globforma floro
lanta ^{PIV}	Malrapida
lesba ^{PIV}	(Pri virino) Samseksama
liva ^{PIV}	Maldekstra
loĝkomunumo	Aro da homoj ne parencaj dividantaj loĝejon

mafio ^{EDK EV}	Krima organizaĵo, kiu efektivas proprajn ”leĝojn”
marĉa rubuso ^{EDK EV}	<i>Rubus chamaemorus</i> Flavbera rubuso
melhundo ^{PIV}	Vertago, longa malaltkrura hundo
merdo ^{PIV}	Fekaĵo
Meteo-servo	Meteorologia informservo
metronomo ^{PV *}	Aparato por indiki muzikan rapidecon
motelo ^{PIV}	Apudŝosea hotelo
motorsledo	Neĝoskotero, malgranda veturilo kun antaŭaj glitiloj kaj posta raŭpo por irado sur neĝo
mutacio ^{PIV}	Subita ŝanĝiĝo en geno
naso ^{PV *}	Korba fiŝkaptilo
navedo ^{PIV-S HV EDK}	Ilo, kiu tien-reen kondukas vefton inter la varperoj
Neandertalo ^{PIV}	Loko kie oni trovis restaĵojn de prahomo
nupto ^{PIV}	Geedziĝo
Oblomovo	Nenifaranto-meditanto (laŭ romano de Ivan Gonĉarov)
obskura ^{PIV}	Malluma
Olando ^{EDK EV JLG}	<i>(Öland)</i> Insulo kaj provinco en sudorienta Svedio
olda ^{PIV}	Maljuna, malnova
ozona truo	Parto de la atmosfero kun malpli da ozono
parabolo ^{PV *}	Moralinstrua metafora rakonto
pedofilo	Plenkreskulo, kies seksa impulso direktiĝas al infano
pico ^{PIV-S}	Italdevena panplato bakita kun garnaĵoj
piranĵo ^{PIV}	<i>Serrasalmo piraya</i> Akradenta sudamerika rabfiŝo
pleŭronekto ^{PV *}	<i>Pleuronectes rhombus</i> Platfiŝo

pneŭo ^{PIV}	Pneŭmatiko
polui ^{PIV-S}	Malpurigi la medion
projekcio	Psika atribuado al alia persono de io, kion oni ne konscias ĉe si mem
psikodramo ^{PIV}	Dramforma psikoterapio
psikosomata ^{PIV}	Korpa efiko de psika faktoro
rapidumo ^{PIV}	Unu el pluraj elekteblaj transmisiaj kvocientoj de aŭto
recikli	Sisteme reutiligi
ritardando	Malrapidiĝo en muzika verko
saboti ^{PV}	Intence difekti por malutili al iu
SEJU ^{EDK}	Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo
separi ^{PV}	Provizore leĝe disigi geedzojn
setli ^{PIV-S}	Ekloĝi en nova loko
simultana ^{PIV}	Sammomente okazanta
skani ^{PIV-S}	Sisteme ekzameni surfacon aŭ enhavon
Skanio ^{AC EDK EV JLG}	(<i>Skåne</i>) La plej suda provinco de Svedio
skarabo	Aŭto Volkswagen de tradicia modelo
sketi ^{PIV}	Glitkuri
Smolando ^{EDK EV JLG}	(<i>Småland</i>) Provinco en suda Svedio
spoto ^{PIV}	Lumĵetilo faranta luman makulon sur scenejo
Sundo ^{PIV z}	Markolo inter Svedio kaj Danio
ŝero ^{PIV z}	Pli-malpli nuda insuleto
tajgo ^{PIV}	Siberia arbarego
taluso ^{PIV}	Artefarita altaĵo sur kiu iras vojo
teleregilo ^{JL}	Sendrata aparateto mane tenata por regi aparaton
telfero ^{PIV}	Transportilo por transporti homojn aŭ varojn trenatajn aŭ pendantajn de kablo
tempesto ^{PIV}	Ŝtormego

tohuvaĉohuo ^{PIV}	Malordego
torfbero ^{WP EDK}	<i>Oxycoccus</i> Oksikoko ^{PIV} Ruĝa acida bero
vaĉo ^{PIV}	Garda aŭ labora deĵoro
varfo ^{PV}	Havena ponto, kiu elstaras de kajo
varpo ^{PV}	Teks-baza fadenaro
vato ^{PV EDK EV JLG}	Vatto ^{PIV} Unuo de elektra povo, simbolo W
vefto ^{PV}	Fadenoj enteksataj transverse inter la varperojn
zipo ^{PIV}	Fulmofermilo, rubandparo kiu interkroĉiĝas per dentaroj
zoo-parko	Zoologia ĝardeno